

# IL POPOLO CINIO

中國新聞

5 1988



VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

# EVENKOJ EN PRAARBARO

Fotoj de DU DJANŬEN

Intimeco



Profunde de la granda Ŝing'an-montaro en la plej norda parto de Ĉinio estas la evenka aŭtonoma vilaĝo Aŭluguja sub la gubernio Ergune Zŭoĉi. Plejparto de la tieaj pli ol 200 evenkoj loĝas en novaj domoj konstruitaj de la ŝtato, sed malmultaj el ili vivas en arbaro, okupiĝante pri ĉasado kaj alkobredado. La nacieco estas la unika en bredado kaj servigo de alkoj.

La evenkoj vivas ankoraŭ laŭ la tradicia kutimo. Dum ĉasado ili loĝas en facile starigeblaj konusaj tendoj el pinaj branĉoj, betula ŝelo kaj alka felo. Iliaj kestoj, korboj, luliloj kaj iuj aliaj bezonaĵoj estas faritaj senescepte el betula ŝelo. Kiam ili transloĝiĝas, la alkoj transportas la tutan ŝarĝon.

Transloĝiĝo





Tendumejo de  
evenkoj





Sekigo de viando de ĉasiĵaj bestoj

Evenka maljunulino

FOTO DE SUN JONGSŬE





### ENHAVO

#### SUR LA KOVRILO:

Ji-a knabino

Foto de **ŜJŬE ĈAŬ**

#### VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Evenkoj en praarbaro

Fotoj de **DU DJANŬEN**

#### SUR LA DORSKOVRILO:

[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]

Moskeo Fazd en Irano

de **EBRAHIM BAHRAMJ** (Irano)

Parko en la urbo Strömsnäsbruk,  
Svedio

de **Malte Markheden** (Svedio)

- 2 Gŭan Gŭangmej luis butikojn
- 4 Enkonduko de alilanda investo en Ĉinion
- 7 Kion la reformo portis al la oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio?
- 54 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (17): Geĝoŭba — la unua  
baraĵo sur Jangzi-rivero
- 13 La evoluo de la Gŭangdong-a E-movado
- 16 Esperanto altiras ilin
- 17 Ĉu denaskismo, kial ne?
- 65 ESP-NOVAĴOJ
- 21 POR KOMENCANTOJ: Flugiloj de ansero
- 19 Nova etapo de edukado pri profesia tekniko en Ĉinio
- 24 Vigla maljunulo en sporto
- 27 Novaj sukcesoj de la ĉina farmacio
- 29 ĈINA MEDICINO: Kuracaj principoj de la tradicia ĉina  
medicino
- 40 NOVELO: La lanterna butiko de Ŝen
- 45 ĈINA LITERATURO:  
Granda realisma poeto Baj Ĝjuji  
Elektitaj poemoj de Baj Ĝjuji
- 51 Juna esperdona baleta trupo
- 32 ĈINAJ ARTOJ: Argilaj modlaĵoj
- 68 Grava malkovro pri Ŝu-civilizacio
- 63 Tambura turo kaj flora ponto de Dung-nacieco
- 61 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Naciaj muzikiloj de Ĉinio
- 23 ĈINAJ MOROJ: Gongfu-teo
- 38 KURANTAJ AFEROJ
- 22 KORESPONDI DEZIRAS
- 15 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalio	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

# Gŭan Gŭangmej luis butikojn

Gŭan Gŭangmej, entreprena administrantino de la urbo Benŝji, Ljaŭning-provinco, luis laŭ kontrakto 8 butikojn de manĝaĵoj. *Jingji Ribao*, tre influa ĵurnalo de Ĉinio, antaŭ nelonge publikigis diskuton pri tio kaj faris Gŭan, tiun ordinaran virinon, persono atentata de la publika opinio.

## MIRIGAJ SUKCESOJ

Kia homo estas Gŭan Gŭangmej? Ŝi estas 37-jara virino kun mode frizita hararo kaj laceta vizaĝo. Ŝi parolas lakone. Laŭ aspekto ŝi impresas iom pli maljuna, ol ŝi fakte estas.

Gŭan estis vicdirektoro de iu butiko de manĝaĵoj en la urbo Benŝji. Aprile de 1985 ŝi luis tiun butikon laŭ kontrakto kaj en la jarfino la butiko profitis 252 mil jŭanojn, kiuj estis 140% de la profito en 1984. Aprile de 1986 ŝi luis alian butikon de manĝaĵoj, kies defcito estis 65 mil jŭanoj, kaj en la jarfino ŝi ne nur nuligis la defciton daŭrintan 6 jarojn, sed ankaŭ akiris profiton 3-oblan de tiu en la kontrakto. Aŭguste de la sama jaro ŝi luis la butikon Dongming, la plej grandan vendejon de manĝaĵoj en la urbo, kaj profitis 330 mil jŭanojn en 5 monatoj, kiuj egalas al la profito tutjara en 1985. Januare de 1987 ŝi luis aliajn 5 butikojn de manĝaĵoj; kune kun la tri antaŭe luitaj butikoj, ŝi luis entute 8 butikojn, kaj formis ilin en komercan korporacion Dongming kun proksimume mil oficistoj kaj vendistoj kaj ŝi mem funkciis kiel ĝia ĝenerala direktoro. La totala vendosumo konsistigis 1/3 de la totala podetala vendosumo de la manĝaĵoj de la urbo kaj ties profito atingis ĝian duonon.

Gŭan Gŭangmej (maldekstre) kaj administrantoj



## KURAĜAJ PAŜOJ

Funkciante kiel ĝenerala direktoro, Gŭan malpliigis la nombron de la administrantoj. La samranguloj de butika direktoro antaŭe estis 33, sed nun 18. La sekciaj oficistoj antaŭe estis 76, sed nun 40. Ŝi nuligis la 8-gradan salajrosistemon kaj alprenis la rimedon rekompenci laŭ la kontribuoj. Ĉiuj, kiuj plenumis la komisiitajn taskojn, povas ricevi la meritatajn salajron kaj premian monon. Krome ŝi ellaboris ankaŭ detalojn pri puno kaj premio. Iu vendistino donis al kliento varon kun manko de 15 gramoj, pro tio ŝi estis monpunita je 10 jŭanoj. Alia vendistino superpagigis al kliento je 0.1 jŭano, kaj pro tio ŝi estis monpunita je 15 jŭanoj. Tion Gŭan nomis "kompensi dekoble al kliento pro eraro kaj puni centoble la vendiston". Tio celas rigoran observon al la disciplino pri prezo, intensigon de la interna administrado kaj protekton al la interesoj de la konsumantoj.

Song Ŝiĝu funkciis pli ol 20 jarojn kiel estro de butiko de manĝaĵoj. Fakte li estis sentaŭga por la ofico. Gŭan eksigis lin je la ofico kaj taskis al li liveradon de trinkakvo. Antaŭ la luo de butiko vendistino Ĝjang Ŝiŭ'e dum laborhoroj ĉiam babilis kun siaj kolegoj aŭ ĉikanis klientojn. Tuj ĉe sia enoficiĝo Gŭan avertis ŝin, ke ŝi estos severe punata, se ŝi ne korektos sian eraron. Ĝjang tamen tion tute ignoris, dirante: "Ĉiu direktoro tiel avertis ĉe sia enoficiĝo en la pasinteco, sed fakte neniu estis punita." Foje, iu vendisto kverelis kun kliento. En la sekventa tago Gŭan antaŭ ĉio monpunis sin je 20 jŭanoj, monpunis estron de la negoca sekcio kaj estron de negoca grupo ĉiun je 10 jŭanoj kaj monpunis la kverelinton je 50 jŭanoj. La ĝenerala direktoro Gŭan monpunis eĉ la vendiston, kiu silentis antaŭ la kverelo. De tiu tago tute ŝanĝigis la sinteno de Ĝjang Ŝiŭ'e. Ŝi akceptis klientojn ĉiam afable kun rideto. Ŝi volontis vendi cigaredojn popece. Ĉar Ĝjang korektis siajn mankojn, ŝi ĉiam estas multe premiata finance.

## KORVERŜO DE VENDISTINO

Ju Ŝuĉin laboris jam 17 jarojn en la Butiko de Manĝaĵoj Pingŝan. Ŝi diris, ke ŝi eĉ en sonĝo ne imagiŝ, ke ŝi tiel multe ŝanĝis sian opinion pri estro de butiko, de post kiam Gŭan Gŭangmej luis la butikon laŭ la kontrakto.

En ŝia memoro, antaŭe la butiko Pingŝan tre



malofte profitis. En la jaro antaŭ la lupreno, la butikoj serioze malprofitis kaj ĉiu vendisto de la butikoj ricevis nur 25 jŭanojn ĉiumonate. En 1987 post kiam la butikoj estis luita laŭ kontrakto, en la 5 monatoj la butikoj gajnis profiton je 315% pli multe ol tiu en la sama periodo de la lasta jaro. Krom la fiksa salajro la laborantoj povas ricevi premion de kelkdek jŭanoj. La silentema Ju Ŝuĉin nedeteneble skribis leteron al la nekonata Gŭan Gŭangmej. Ŝi diris: "En la 5 monatoj post ŝia lupreno mia vivo estis ne tiel malfacila kiel antaŭe. Mi ne povoscias skribi kaj petis mian edzon skribi en mia nomo al la direktoro Gŭan. Mi volas nenion alian ol esprimi mian koran dankon."

Luinte la butikojn, Gŭan Gŭangmej faris ne malmulte da bonaĵoj por la laborantoj. Por celebri la naskiĝtagon de laborantoj pli-ol-45-jaraj la butikoj donacas al ili torton kun bonaŭgura bildo. Al malfrue geedziĝintaj gejunuloj, la butikoj donas feriojn kaj donacon. La butikoj donacas 5 kilogramojn da kokovoj al ĉiu akuŝinta laborantino kaj pagas por la transloĝiĝo de laborantoj. La komerca korporacio establis legoĉambrojn, amuzejon, infanvartejon kaj banejon.

#### PROFITO KAJ RISKO

La eksterordinara faro de Gŭan vekis diskuton. Iuj diris: "Lupreninte la butikojn, Gŭan senpene profitas kaj ŝia faro portas la karakterizaĵon de ekspluato." Aliaj dubis, ĉu ŝia faro konformas al la socialisma principo. Aŭdinte tiajn dirojn Gŭan ĉiam ekscitiĝe diris: "Mi neniel povas kompreni: La antaŭaj butikoj, kiuj profitis malmulte, aŭ deficitigis, kaj eĉ ne povis salajri, estis socialismaj, sed nun niaj butikoj gajnintaj multan profiton kaj povantaj finance premii estas kapitalismaj. Vere absurde!"

Gŭan Gŭangmej opinias, ke la luado praktikata en la komerca rondo de Ĉinio disigas nur la administrecon for de la posedanteco, kvankam la entreprena administrado estas komisiita al iu korporacio aŭ persono, tamen la entrepreno restas posedata de la ŝtato, ĝia posedanteco restas neŝanĝita. Luado estas nur funkcia formo, kiu povas esti aplikata de kapitalismaj landoj kaj ankaŭ de socialismaj, la diferenco kuŝas nur en la metodo. Foje ŝi humure diris, montrante tason sur tablo: "Kiu povas aserti, ĉu tiu taso estas socialisma aŭ kapitalisma?" Ŝiaj vortoj ridigis la ĉeestantojn.

Iuj diris, ke Gŭan sola enspezas dekojn da miloj da jŭanoj, kiuj egalas al enspezo de kapitalisto. Koncerne tion Gŭan respondis, ke ne la enspezita monsumo decidas la kapitalistecon, same kiel tio, ke unu lando riĉiĝinta ne nepre fariĝas kapitalisma. Lupreninte, ŝi ne plu ricevas fiksan salajron, nek premion, ŝi enspezas laŭ la gajnita profito. Ju pli



Gŭan Gŭangmej (dekstre) kontrolas la kvaliton kaj prezojn de legomoj.

multe ŝi kontribuas al la ŝtato, des pli multe ŝi enspezas. Laŭ la kontraktoj ŝi rajtas enspezi en unu jaro 44 mil jŭanojn, sed fakte ŝi akceptis ne tiel multe. Per 22 mil jŭanoj el sia meritata sumo ŝi premiis la laborantojn kaj helpantojn, donis 15 mil jŭanojn al la komuna fonduso kaj ŝi fakte ricevis nur 7000 jŭanojn, kiuj estas 2.5-oblo de la averaĝa enspezo de la laborantoj.

Fakte la luado estas iagrade riska. Kun garantio de 6 personoj kaj de individua posedaĵo de 25 mil jŭanoj, ŝi sukcesis gajni la luadon de la 8 butikoj en la publika adjudiko, superinte la aliajn je 519 mil jŭanoj. Tiele ŝi prenis sur sin la respondecon pri la kontraktita sumo de profito laŭ la antaŭkondiĉoj: Kiom da kontraktitaj profitoj ŝi ne plenumos, tiom ŝi estos punita.

Certe ĉiu ajn reformo ne estas facila. Kiuj malfaciloj do troviĝas antaŭ Gŭan Gŭangmej kaj kio ŝin ĉagrenas en la laboro? Ŝi diris: "La reformo estas nova afero, kaj la plej granda malhelpo por mi estas la malsamaj opinioj pri la reformo. Krome, mi estas administranto de entreprenoj, sed pli kaj pli multaj homoj petas min fari paroladon pri sperto, kio devigis min agi kiel socia aktivulo. Se mi nur paroladus, kiu zorgus la butikojn?" ■

# Enkonduko de alilanda investo en Ĉinion

Enkonduki investaĵojn de aliaj landoj, precipe kuraĝigi alilandajn entreprenojn investi en Ĉinio estas grava enhavo de la pordmalferma politiko de Ĉinio.

Post kiam la ĉina registaro publikigis la "Leĝo pri la Entreprenejoj Kune Investitaj kaj Administrataj de Ĉinio kaj Aliaj Landoj" en julio 1979, Ĉinio enkondukis investon rekte de alilandaj komercistoj, pere de fondo de entreprenoj, kune investitaj kaj administrataj de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj tiuj sole investitaj de aliaj landoj, kaj kuna prospektorado kaj ekspluato de submara petrolo de Ĉinio k.a. Ĝis


la fino de 1987, Ĉinio jam sankciis fondiĝon de 8 900 entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj kaj subskribis 41 kunlaborajn kontraktojn pri prospektorado kaj ekspluato de la submara petrolo kun alilandaj kompanioj. Laŭ la kontraktoj, la alilandaj komercistoj devas investi 21 miliardojn da usonaj dolaroj, interalie 7.6 miliardoj jam investitaj.

En Ĉinio senĉese grandiĝas la skalo de la enkonduko de la alilanda investo. En ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj fondiĝis entreprenoj investitaj de alilandanoj. En la

delto de Perlo-rivero ĉe la bordo de la Suda Ĉina Maro, jam fundamente formiĝis la ekonomia sistemo pri financa kaj vara merkatoj frontantaj al la mondo. Rapide disvolviĝas la kvar specialaj ekonomiaj distriktoj Ŝenĝen, Ŝjamen, Ŝantoŭ kaj Ĝuhaj. La sudorienta marbordo de Ĉinio jam fariĝis bazloko por enkonduki investon kaj teknikojn de aliaj landoj, kio metis fundamenton por Ĉinio por praktiki la kompletan disvolvan strategion en utiligo de alilandaj kapitaloj.

Alilandaj komercistoj investis al multaj kampoj, ekz. tiuj de malpeza industrio, ŝpin-tekso, petrolo, kemiaĵoj, feroŝtala industrio, karbo-ekspluatado, trafiko, turismo, agrikulturo, forstumo, bruto- kaj fiŝ-bredado. Nemalmultaj entreprenoj investitaj de alilandaj komercistoj, kiaj la Ĝuangdong-a Kune Entreprenata Nukle-elektra Limigita Kompanio, la Ĉina Schindler-a Lifta Limigita Kompanio, la Tjanĝin-a Otis-a Lifta Limigita Kompanio, la Limigita Kompanio de Shanghai-Volkswagen, la Hŭajŭan-a Internacia Elektroprodukta Kompanio kaj la Antajbaŭ-a Subĉiela Karbominejo de Pingŝŭo, Ŝanŝji-provinco, ludas gravan rolon en la disvolviĝo de la nacia ekonomio. Plejparto de la 4 100 funkciantaj entreprenoj akiris pli bonan

En la muntejo de la Hitachi-a Televidila Limigita Kompanio






ekonomian efikon. Internacia administra kaj konsultiĝa kompanio de Usono faris enketon al 70 alilandaj kompanioj, kiuj investis al ĉinaj industrioj. La enketo montris, ke pli ol 90% de la investantoj akiris la deziratan aŭ pli bonan rezulton de investo en Ĉinio kaj volas daŭrigi la investadon, dum 6% de ili opinias, ke ilia investo ne sukcesis.

Enkonduki alilandan investon estas kompleksa laboro. En la lastaj 9 jaroj, oni faris multon por kuraĝigi alilandajn komercistojn investi en Ĉinio, multe ŝanĝiĝis la medioj por investado. En multaj lokoj, precipe en la marbordaj regionoj, aplikante la enlandajn kaj alilandajn investojn en kombiniĝo. Ĉinio konstruis la fundamentajn instalaĵojn de aerodromo, haveno, ŝoseoj, komunikado, akvo- kaj elektro-provizado kaj fabrikservoj, kaj aliajn porvivajn servajn instalaĵojn. Tiutempe la ĉina registaro publikigis pli ol 200 ekonomiajn leĝojn kaj difinojn pri alilanda investo. La "Difinoj de la Ŝtata Konsilantaro pri Kuraĝigo al la Investo de Alilandaj Komercistoj al Ĉinio" publikigita en oktobro, 1986, pliiĝas la favorojn al la tekniko-avangardaj kaj produktaĵo-eksportaj entreprenoj, investitaj de alilandaj komercistoj, ekz. la favorojn pri impostopago, doganopago, teraj ekspluatado kaj uzado kaj profito-ellandiĝo, pli da libero en la salajrado, produktado, administrado kaj financaj aferoj, pli da zorgoj en livero de materialoj kaj energioj kaj produktaĵo-vendo. Ankaŭ la lokaj registaroj faris konformajn rimedojn surbaze de tiuj ĉi difinoj.

Multe progresis ankaŭ la reformo de la administra sistemo por la alilanda investado. Jam komencis stariĝi aŭ perfektigis diversnivela administracioj de alilanda investado, simpliĝis la ekzamena kaj sankcia procedo kaj fondiĝis investo-servaj centroj, kio oportunitigis la investadon de la alilandaj komercistoj. La Fuĝjan-



En laborejo de la Tjanĝin-a Otis-a Lifta Limigita Kompanio

Hitachi-a Televidila Limigita Kompanio, kune investita de Ĉinio kaj Japanio, jam renkontis malfacilon ne povi importi televidilajn pecojn pro manko de fremda valuto. Dank' al la helpo de la ŝtato, tiu ĉi entrepreno rapide venkis la malfacilon. De 1980, ĝi produktis 1 340 mil kolorajn televidilojn kun kvalito internacie avangarda kaj atingis valutan ekvilibron kun favora saldo. Al la kompanio aperis senprecedence bona situacio. Kun pliboniĝo de la medio kaj administra sistemo por investado, la alilandaj komercistoj opinias, ke la nunaj socia kaj ekonomia sistemoj de Ĉinio pli kaj pli konformiĝas al la bezonoj de la entreprenoj kun investo de la alilandaj komercistoj.

Kompreneble, estas ankoraŭ multaj aferoj perfektigendaj en la investa medio de Ĉinio. La

koncernaj departementoj de Ĉinio senĉese prezentis plibonigajn rimedojn en administrado de la entreprenoj kun investo de alilandaj komercistoj, liverado de la materialoj al ili kaj ekvilibro de iliaj fremdaj valutoj k.a.

Unuvorte, Ĉinio jam havis kompare bonan komencon en enkonduko de alilanda investo por la ekonomia disvolviĝo kaj maturiĝas iom post iom. Pli racia estas la investado de la alilandaj komercistoj, rimarkinde multiĝas la entreprenoj produktaĵaj, teknike avangardaj kaj produktaĵo-eksportaj, dum evidente malpliĝas la entreprenoj teknike ordinaraj kaj servaj. Ĉinio komencis rikolti pli bonan sintezan socian efikon en la enkonduko de alilanda investo por pliiĝi la konstruan investon, rapidigi la ekonomian disvolviĝon kaj pliiĝi

la financon enspezon, kio ludas utilan rolon en disvolviĝo de la nacia ekonomio. Ekzemple, aktive enkonduki alilandan investon ja estas unu el la kaŭzoj de la rapida ekonomia disvolviĝo de Gŭangdong-provinco, kies eksporta kvanto okupis la unuan lokon de la tuta lando en la lastaj jaroj. En la "Sesa Kvinjara Plano" (1981-1985) Gŭangdong-provinco ĉiamaniere enkondukis investon de 2.58 miliardoj da usonaj dolaroj, kiuj konsistigis 13% de la samperio investita fiksa kapitalo de la tutpopole proprietaj entreprenoj, pro kio ĝi fariĝis la provinco, kiu plej multe enkondukis alilandan investon.

Enkonduko de alilanda investo ludis pozitivan rolon ankaŭ en bonkvalitigo de la produktaĵoj,

pliigo de la specoj, malfermo de novaj eksportaj kanaloj, plivastigo de la eksporto de produktaĵoj. Laŭ statistiko, en 1987 la entreprenoj kun investo de alilandaj komercistoj eksportis produktaĵojn de miliardo da usonaj dolaroj. Samtempe, iuj entreprenoj produktis ankaŭ surgatojn de importitaj varoj, dank' al kio ili ŝparis fremdajn valutojn por la ŝtato. Havis grandan disvolviĝon precipe la kombiniĝo de alilanda investo kun la ekstera negoco de Ĉinio, la poreksportaj kombinitaj laŭ eksporta bezono kaj partoprenitaj de eksternegocaj kompanioj, industriaj entreprenoj kaj alilandaj investantoj, diversformaj komunaj entreprenado kaj kunlaborado kaj la servo de la

eksternegocaj departementoj en utiligo de alilanda investo por plivastigi la eksteran negocon. Statistiko diras, ke jam aperis pli ol 200 entreprenoj kun alilanda investo kaj kune entreprenataj de alilandaj komercistoj kaj eksternegocaj departementoj de Ĉinio kun alilanda investo de 500 milionoj da usonaj dolaroj, ilia plejparto estas sukcesa.

Ĉinio enkondukas ne nur alilandan kapitalon, sed ankaŭ avangardajn produktaĵajn teknikojn kaj administrajn metodojn de aliaj landoj, kio havas gravan signifon en akcelo de la ekonomiaj reformoj kaj disvolviĝo. Ekzemple, la Dajauan-a Nuklea Elektrostacio en Gŭangdong-provinco ne nur mildigos la elektromankan staton en suda Ĉinio, sed ankaŭ metas fundamenton por konstrui la grandkapacitajn nukleajn elektro-staciojn kaj posedi la koncernajn teknikojn. Dank' al apliko de avangardaj instalaĵoj kaj administraj metodoj la Antajbaŭ-a Subĉiela Karbominejo de Pingŝuo de Ŝanŝji-provinco akiris sperton konstrui en 2 jaroj grandan modernan karbominejon kun jara produktokvanto de 15 milionoj da tunoj da karbo. La programo-regaj centraloj, fabrikitaj de la Ŝanhaja Bell-a Telefonfabrika Limigita Kompanio, estas internacie avangardaj kaj enlande uzataj kaj parte anstataŭis la importitajn.

Multaj entreprenoj kun investo de Ĉinio kaj alilandaj komercistoj laŭ la subskribitaj kontraktoj senĉese akiris novajn teknikojn liveritajn de alilandaj investantoj kaj per tio pliigis sian kapablon fabriki novajn produktaĵojn kaj ekspluati novajn teknikojn. La grandaj industriaj kompanioj en Ĉinio faras la duafojan teknikoncedadon al la kunlaboraj fabrikoj por produkti materialojn kaj maŝinpecojn en Ĉinio, kio levis la nivelon de teknikoj, entreprenado kaj administrado de grandnombraj kunlaboraj fabrikoj. ■

Personaŭtoj "Santana" produktitaj de la Limigita Kompanio de Shanghai-Volkswagen





# *Kion la reformo portis al la oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio?*

Teksto de **DONG ŜJAŬPING**

Foto de **LIŬ SIGONG**

Ekde 1978 Ĉinio praktikas serion da ekonomiaj reformoj. Kian ŝanĝigon tiuj reformoj portis al la vivo de cent milionoj da oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio?

Daj Ĉjüanŝeng laboras en la Pekina Ŝaltilo-fabrika ekde 1958. En 1978 lia monata salajro estis 55.80 jüanoj. En la unuaj 20 jaroj lia monata salajro altiĝis je nur 10 jüanoj.

Depost la ekonomia reformo en 1978, altiĝis lia enspezo ĉiujare. Nuĥ lia monata salajro estas 125.50 jüanoj, plus la monpremio ĉiumonate li enspezas ĉ. 160 jüanojn, preskaŭ duoble pli multe kompare kun tiu antaŭ la reformo. Antaŭ 1978 la enspezo de Daj kaj lia edzino kune estis nur iom pli ol 80 jüanoj. Tiam ĉiumonate ili elspezis 10 jüanojn por subvencii la gepatrojn, 50 por manĝaĵoj, 10 por vestaĵoj kaj 10 por aliaj elspezoj. La enspezo apenaŭ povis kovri la elspezon. Nun la geedza paro monate enspezas 280 jüanojn. Ili elspezas 20 jüanojn por subvencii la gepatrojn kaj 160 por vivtenado, tiel ili ĉiumonate povas ŝpari 100 jüanojn. Antaŭe lia hejmo estis simple meblita: unu lito, unu tableto kaj unu vestokesto. En 1983 li transloĝiĝis en novan apartamenton kaj farigis al si kompletan da mebloj. Nun en lia hejmo estas fridujo, magnetofono kaj liaj. Krome, li planas aĉeti koloran televidilon.

En la lastaj 10 jaroj la enspezo de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj multe pliiĝis. Laŭ la statistiko publikigita de la Ŝtata Statistika Buroo, la meznombra jara enspezo de la ĉinaj oficistoj kaj laboristoj estis 615 jüanoj en 1978, 762 jüanoj en 1980, 1 329 jüanoj en 1986 kaj 1 500 jüanoj en 1987. La meznombra jara salajro en 1987 estis 186.4% de tiu en 1980 kaj restis 142.9% post dekalkulo de la prezo-altiĝa faktoro, la jara meznombra kresko estis 8.2%.

La deponita monsumo de Ĉinio en 1987 unuafoje superis 300 miliardojn da jüanoj kaj atingis 307.531 miliardojn da jüanoj, kiu egalas la totalan deponitan monsumon de 35 jaroj (de 1949 ĝis

1983), la meznombra jara kresko estis 36.2%.

En la pasintaj 10 jaroj granda ŝanĝiĝo okazis al la konsumo strukturo en la familio de ĉinaj oficistoj kaj laboristoj.

En 1982 la ordinaraj familioj elspezis 80% de sia enspezo por manĝaĵoj. La pago por postlabora kultua ĝuo kaj persona intereso kaj ŝato estis tre malgranda. Sed en 1987 la elspezo por manĝaĵoj reduktiĝis al 45% kaj la ordinaraj familioj ja havis monon por riĉigi sian postlaboran vivon kaj altigi la kvaliton de la vivo. Nun la ordinaraj familioj laŭ jena ordo elspezas sian enspezon: por manĝaĵoj, edukado de la gefiloj,

## Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

GMT	Al Regionoj	Ondoj (m)	kHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		32	9365
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30.4	9860
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.4	15385

vestoj, altaklasaj konsumajoj, persona ŝato kaj turismo.

En la pasinteco oni surtabligis plejparte farunaĵon, rizaĵon kaj pladojn el ordinaraĵ legomoj, dum viando, ovoĵ kaj lakto tre malofte vidiĝis surtable. Sed nun sur la tablo ne mankas pladoĵ el freŝaj bonkvalitaj legomoj, viandoĵ kaj ovoĵ.

Krome, ankaŭ fridujoĵ, koloraj televidiloĵ, lavmaŝinoĵ kaj aliaĵ elektroaparatoĵ ekvidiĝis en multaj laboristaj familioĵ en la lastaj 4-5 jaroĵ, kio fariĝis nova normo de la vivnivelo. La Tutlanda Ĝenerala Federacio de Laborsindikatoĵ de Ĉinio faris en 1987 enketon al 122 familioĵ de iu fabriko en la urbo Daljan. Ili posedas 128 televidilojn, inkluzive 63 kolorajn, 106 lavmaŝinojn kaj 21 fridujojn. La enketo montris, ke la vivnivelo de la oficistoj kaj laboristoj de tiu fabriko evidente leviĝis en la lastaj dek jaroĵ.

Junajn oficistojn kaj laboristojn interesas la pli enhavoriĉa kaj bunta vivo. La labormodeloj en la pasinteco plejparte vestis sin modeste. Ĉu viroj ĉu virinoĵ, ĉiuj portis blujajn aŭ grizajn bluzojn, kun serioza mieno. Sed bele

ŝminkita Ĝaŭ Hongbin, laboristino de la Ŝenĵang-a Tria Ilmaŝina Fabriko kaj gajninto de la labora medalo "la Unua de Majo" de 1987, portas striktan pantalonon kaj belajn oreloringojn, kun moda hararo falanta ĝis la ŝultroj. Ŝia aspekto multe diferencas de tiu de la pasintaj labormodeloj. Ŝi diris: "Kial mi portus blujajn vestojn kiel la pasinta labormodelo? Mi ja estas junulino en la okdekaj jaroĵ."

La publiko jam konstatis, ke la reformo jam portis evidentan materian bonon al plejparto de la oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio. Sed ankaŭ troviĝas iuj el ili, kiuj ricevis de la reformo malmulte. En la reformo iuj entreprenoj ne adaptis sin al la novaj kondiĉoj, ilia produktado ne atingis deziratan disvolviĝon kaj eĉ regresis iagrade. Tiaĵ entreprenoj vidiĝas en pluraj lokoj. Iliaj oficistoj kaj laboristoj povas ricevi 70% de sia salajro. Kompreneble, ili ne povas resti senŝanĝaj, la lokaj registaroĵ donas al ili helpon. Ili donas al ili monon, direktas ilian administradon kaj postulas ilin pliboniĝi en limigita tempo. Pluraj entreprenoj en la urbo Ŝenĵang de nordorienta Ĉinio, kiuj preskaŭ

bankrotis, rebonigis sian produktadon, sed ankaŭ troviĝas malmultaj entreprenoj, kiuj bankrotis. La funkciuloĵ de la bankrotintaj entreprenoj devas serĉi por si novan laboron helpate de la registaro.

Estas reformenda ankaŭ la prezo-sistemo kiel grava konsistiganto de la malnova ekonomia sistemo. La prezo-reformo kaŭzis prezaltiĝon de iuj varoj kaj la prezaltiĝo de iuj agrikulturaj produktaĵoj vekis plendon. Ĉe parto de urbanoĵ kaj estigis iajn negativajn influojn. Malgraŭ ke multaj familioĵ havigis al si koloran televidilon, fridujon, magnetofonon kaj eĉ videoaparaton en la pasintaj jaroĵ, la prezo-altiĝo de legomoĵ kaj ĉiutagaj bezonaĵoj vekis plendon ankaŭ ĉe ili. Ili diris: "Antaŭe ni povis aĉeti kilogramojn da tomatoĵ per 0.10 jŭano, sed nun por unu kg. da tomatoĵ ni devas pagi 0.40 jŭanon eĉ en somero." En 1987 la prezoĵ fariĝis preskaŭ plej zorgata problemo. Tial la Ŝtata Konsilantaro decidis stabiligi la prezojn en la tuta lando por garantii la bonon gajnitan de la popolo en la reformo kaj puŝi la reformon pli profunden. ■

La novgeedzoĵ Baj Lej kaj Liŭ Hong (dekstre) en sia komforta hejmo starigita per ilia propra enspezo





Familio en gaja ferio



En foiro

FOTO DE SUN JI





Motorcikloj jam fariĝis trafikilo por parto da junuloj. FOTO DE SUN JI

### Transloĝiĝo





Ĝang Hajtaŭ kaj lia edzino estas laboristoj. Ili dungis vartistinon por prizorgi sian bebon.



Al sketado





Infana amuzejo en laborista dombloko  
FOTO DE SUN JI

Aĉeto de fridujo

FOTO DE ŬANG GŬANMIN





# La evoluo de la Gŭangdong-a E-movado

En Ĉinio la E-movado floris kaj malprosperis sekve de la leviĝo kaj malleviĝo de la progresema pensfluo kaj la prospero kaj malprospero de la popola progresema afero. Tion atestis la Gŭangdong-a E-movado per sia evoluo.

En 1909 ĉina esperantisto Hsu W.K., kiu iam studis en Francio, propagandis Esperanton en Kantono, Gŭangdong-provinco. Li funkciigis kaj gvidis E-kursojn en tri lernejoj. En 1912 li funkciigis en iu mezlernejo vesperan E-kurson, en kiu lernis anarkiisto Sifo, progresemo Wong Kenn kaj aliaj. Dank' al ilia helpo okazis en Kantono kunveno por propagandi Esperanton, kun pli ol 300 partoprenantoj. Post tio ili preparis por fondi la Kantonan E-Asociacion kaj ekrlatis al UEA. Ĉiu numero de la periodaĵo "La Voĉo de la Popolo", kiu propagandis ĉefe anarkiismon, havis 4 krompaĝojn dediĉitajn al Esperanto. Tion laŭdis UEA. Ŝanhajo, lulilo de la ĉina Esperanto-movado, sendis al la Gŭangdong-a E-Asocio leteron, kiu laŭdis, ke la Gŭangdong-a E-movado marŝas plej antaŭe en Ĉinio. Kaj poste la Gŭangdong-a E-movado malvigligiĝis pro la malvenko de la demokratia revolucio.

En 1924 la Gŭangdong-a E-movado ekviglis, kun la grandiĝo de la progresema forto. En 1926 Wong Kenn, Hsu W. K. kaj aliaj instruistoj de Ĝongŝan-universita-

to plenenergie relevis la Gŭangdong-an E-movadon. Ili funkciigis E-kurson en la universitato kaj proponis al la 5-a Eduka Konferenco de Gŭangdong-provinco fondi rapidan E-instituton kaj aldoni E-kurson en la elementkaj mezlernejoj de la provinco por kulturi esperantistojn. La proponoj estis aprobitaj poste. Varme subtenis la E-movadon la estro de la urba Eduka Buroo Wu Ta Kwong, iniciatis la Kantonan Esperanto-Instituton kaj nomumis Wong Kenn ĝia direktoro. Post nelonge Wu Ta Kwong demisiis kaj eklaboris kiel instruisto en la instituto kaj poste kiel ĝia direktoro. La instituto kulturis aron da Esperantaj instruistoj. Dum tiuj 2-3 jaroj, en 23 mez- kaj altlernejoj funkciis E-kurso,

fakultativa E-kurso kaj E-kurso por somera kampado. Sur tiu bazo E-organizoj fondiĝis unuj post aliaj en multaj distriktoj kaj gubernioj de Gŭangdong-provinco. En 1929 la Gŭangdong-a E-Asocio estis oficiale sankciita. Ankaŭ la ĵurnalistoj kaj personoj el la adademiaj rondoj en Kantono fondis siajn proprajn organizojn, kaj Wong Kenn fariĝis delegito de UEA en Kantono.

Post sia fondiĝo la Kantona E-Asocio eldonis "Semajna E-gazeto", "Jara E-gazeto", "Kantona Esperantisto", "Kantona E-gazeto", "Esperanta Gramatiko", "Historio de Esperanto", "Vivo de Zamenhof" kaj "Ĉe-metodo". Krome, ankaŭ la semajna felietono "Verda Floro" kaj la neregula

Esperantaj artikoloj en la periodaĵo "La Voĉo de la Popolo" fondita en 1913





Partoprenantoj de la ekskurso organizita de la Ĝjangmen-a Esperanto-Asocio de Ĝuangdong-provinco en la Zamenhofa Tago de 1987

felietono "Verda Ondo" de "Kantona Ĵurnalo" propagandis Esperanton.

Ankaŭ aliaj Esperantaj aktivadoj akiris grandajn sukcesojn. Menciindas tiu por celebri la 67-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la 15-a decembro 1926. Tage esperantistoj manifestaciis en la urbo veturante per pli ol 30 aŭtoj; vespere okazis festkunveno en la halo de la provinca eduka departemento, kun slogano "Lingvo por Ĉiuj Landoj" sur la pordo. Post la kunveno 500 el la 1 500 partoprenantoj, kun lanterno en mano, paradis en la urbo. Sur la stratoj la verda lanterna lumo kontrastis kun la blanka lunlumo. La manifestaciantoj disdonis flugfoliojn ĉefe por prezenti Esperanton. Tuttage Kantono dronis en la verda maro de paco kaj frateco.

Multaj esperantistoj el Eŭropo, Ameriko kaj Japanio vizitis Ĝuangdong-provincon pro la rimarkindaj sukcesoj de ĝia E-movado. En januaro 1927 Ĝuangdong-aj esperantistoj akceptis iun germanan poeton, vojaĝiston kaj esperantiston. Post tio, la lokon vizitis 3-tage J.R. Soherer, usona esperantisto, kiu travojaĝis pli ol

40 landojn; juna franca esperantisto I. Peirarce faris longan viziton en Kantono; post sia vizito al Pekino, Nankino, Ŝanhajo kaj Suĝou, hungara laboristo-esperantisto Fedoracok venis en Kantonon en 1934, restis tie 3 semajnojn kaj skribis artikolojn pri la kantona E-movado, kiuj aperis en la "Semajna E-gazeto". Esperantisto el Nara de Japanio venis en Kantonon kaj entuziasme partoprenis en mallonga Esperanto-instruado. Tio montris, ke diverslandaj esperantistoj donis

La fondkunveno de la Shaoguan-a Esperanto-Asocio de Ĝuangdong-provinco



atenton al la Ĝuangdong-a E-movado.

En septembro 1931 progresemaj junaj ĉinaj esperantistoj organizis la Ĉinan Proletan Esperantistan Union kaj kombinis sian movadon kun la liberiga batalo de la ĉina popolo. En la sekvanta jaro fondiĝis ĝia publika organizo, la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Ĝi prezentis la programan sloganon "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio" kiu gajnis aprobon de la ĉinaj esperantistoj. Sub tia situacio junaj esperantistoj de Ĝongŝan-universitato fondis la Verdian Societon en Kantono en novembro 1933. La societo eldonis "La Verdemulo", la unuan ĉinan sciencan periodaĵon en Esperanto. Poste, sub la gvido de esperantisto Ĉen Ĵuan, la Ĝuangdong-aj esperantistoj kun la Verda Societo kiel la ĉefa forto aktive disvastigis la E-movadon, kombinante ĝin kun la movado por la ĉina latinalfabeta sistemo kaj la kontraŭjapana nacisava movado. Tio fariĝis nova turnopunkto de la Ĝuangdong-a E-movado en frua tempo.

Printempe de 1938 la internacisma batalantino Verda Majo kaj ŝia edzo atingis Kantonon kaj starigis poste la Esperantan sekcion de la Kantona Internacia Asocio. Ĉen Ĵuan daŭrigis ŝian



laboron, post kiam ŝi estis kaptita kaj elpelita de la reakcia registaro. Li esperantigis kaj eldonis "Kantono sub Bombardo", "Ĉinio en Flamo" kaj "Parolas Japanoj" kaj sendis ilin al alilandaj esperantistoj.

Güangdong estis okupita de japanaj agresantoj, kaj ĝia E-movado suferis perdojn. Sed la diligenta laboro de la pioniroj kreis en Kantono fekundan verdan grundon. Tio ludis gravan rolon por disvastigi Esperanton en Güangdong kaj aliaj ĉinaj lokoj dum la milita periodo kaj por restarigi kaj evoluigi la Güangdong-an E-movadon.

La Güangdong-a E-movado preskaŭ stagnis pro multaj kialoj, precipe pro tio, ke la ĉina revolucio troviĝis en malfavora situacio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝi iam disvolviĝis, sed ne vige. En aŭgusto 1979 la Ĉina


Esperanto-Ligo okazigis la duan ĉinan Esperantan labor-kunvenon. Nur tiam ekviglis la E-movado en Güangdong kaj aliaj ĉinaj provincoj kaj urboj. En decembro 1980 okazis la unua Esperanta labor-kunveno de Güangdong-provinco kaj en januaro 1981 fondiĝis la prepara grupo de la Güangdong-a E-Asocio, kun veterana esperantisto Ĵen Boŝeng, membro de la konsilantaro de ĈEL, kiel estro. Post unujara preparado la E-Asocio de Güangdong-provinco kaj Kantono oficiale fondiĝis en septembro 1982, poste ĝi dividiĝis en la Güangdong-an E-Asociacion kaj la Kantonan E-Asociacion. Nun en Güangdong-provinco 7 urboj kaj gubernioj fondis E-asociojn kaj iuj lokoj estas en preparado. Ĝis la fino de 1987 Güangdong havis 893 membrojn de E-asocioj, el kiuj 241 apartenas al la Kantona E-Asocio. La membroj de la

provinca E-asocio kunvenas unufoje jare.

En 1981 la Kantona E-Asocio funkciigis E-kurson, kiu fariĝis poste la Postlabora E-Lernejo. Ĝis la fino de 1986 la lernejo kulturis jam pli ol 2 400 esperantistojn. En 1983 la fremdlingva fakultato de Ĝĵinan-universitato de Kantono funkciigis E-kursojn nedevigan kaj popularigan daŭrantajn unu jaron. Ankaŭ Ĝongŝan-universitato, la Kantona Konservatorio, la Kantona Instruista Instituto kaj la Kantona Postlabora Universitato iam funkciigis E-kursojn kaj kulturis multajn esperantistojn kun baza aŭ meza lingvonivelo.

En la lastaj jaroj multaj membroj de la Güangdong-a E-Asocio korespondis kun alilandaj esperantistoj. La E-asocioj de la provinco kaj urbo plurfoje akceptis alilandajn esperantistojn kaj esperantistajn grupojn. ■

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Güangdong-provinco    2. Güanghan-gubernio    3. Fuĵjan-provinco    4. Benŝĵi    5. Ĝinŝĵi  
6. Hubej-provinco

# Esperanto altiras ilin



Kunsido de Esperanto-kurso

La rafinejo Ĝinŝji apud Bohajmaro estas moderna petrol-kemia entrepreno en nordorienta Ĉinio. Ĝi estas modela organizo de kultura edukado al laboristoj. En ĝia centra domego okazis diversaj trejnaj kursoj, inkl. Esperanto-kursojn. En la pasinta pli ol unu jaro tie okazis sinsekve du elementaj kursoj de Esperanto. La verda semo jam ĝermis tie, kaj oni esperas, ke ĝi donos sorĉan floron.

Esperanton lernas blank-haraj inĝenieroj, junaj teknikistoj kaj laboristoj. Esperanto estas fremda al ili, sed post nelonge ilin altiras la belsona, facila kaj simpla lingvo. Ili persistas en lernado de Esperanto du vesperojn kaj unu posttagmezon ĉiusemajne. Por akurate ĉeesti la lecionojn, iuj laboristoj iras al la klasĉambro tuj post sia deĵoro sen ŝanĝi la ole-makulajn laborvestojn. Ĉefinĝeniero Ĝeng Ŭanjoŭ estas tre okupita de laboro, sed laŭeble lernas Esperanton kune kun aliaj. Li ofte vojaĝis aliloken pro kunveno kaj petis sian edzinon, kiu lernas Esperanton en la sama kurso, fari detalajn notojn, por ke li ne postrestu. Tiel li finis la elementan kurson kaj ricevis bonan noton en la ekzameno.

Kursano Ĝang Ŝimin estas teknikisto. Por posedi la internacian lingvon, li ofte lernas en sia

laborejo duonhoron antaŭ kaj post la laborado. Iuj kursanoj ofte kunportas lernolibrojn en oficevojaĝo. Ŝjaŭ Gu, gravedulino, neniam ĉesis lerni Esperanton en la kurso.

Dum la intervjuo mi informiĝis, ke Ŝju Mingĝeng kaj lia filo kune lernas Esperanton. Ŝju estas altklasa inĝeniero de la servokompanio sub la fabriko. Maljuna kaj malsana, li iras al la kurso kune kun sia filo. Li fervore respondas la demandojn de la instruistino. Krome li kune kun la filo ankaŭ ekzercas la langon. En la Somera Tendaro la patro kaj la filo kune prezentis Esperantan programeron. Mi demandis lin, kial li lernas Esperanton. Li diris: "Mi havis okazon partopreni en la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazinta en 1986 en Pekino. Mi vidis sciencistojn de diversaj landoj uzi Esperanton por interŝanĝi fakajn spertojn. Tio impresis min profunde. Mi pensas, ke Esperanto vere estas facile lernebla lingvo. Se la tuta mondo uzos ĝin, tio portos al la homaro nemezureblan avantaĝon. Ĉinio havas miliardon da loĝantoj. Se dekonon de ili lernos Esperanton, tio multe kontribuos al E-movado. Kvankam Esperanto naskiĝis en Pollando, tamen Ĉinio devas fari multon por popularigi

ĝin." Mi demandis lin ankaŭ: "Kial vi submetis vian filon al lernado de Esperanto?" Li ridis: "Li lernas nun en mezlernejo kaj tre interesiĝas pri Esperanto. Se ni lernas kune, ni povas helpi unu la alian en ĉiutaga konversacio. Mi opinias, ke ni devas popularigi Esperanton ankaŭ en mezlernejoj."

Dum la intervjuo la kursanoj laŭdis sian instruistinon Ĝjang Ping. Ŝi estis lernantino de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto kaj poste daŭre studis Esperanton en Pekino unu jaron. Ŝi estas fervora kaj aktiva en disvastigo de Esperanto. Ŝiaj lernantoj diris, ke ŝi instruas serioze kaj devokonscie. Ĉiufoje ŝi venas frue al la klasĉambro por klarigi demandojn al la lernantoj. Ŝi ofte kuraĝigas ilin, ke kun persistemo ili certe povas ellerni Esperanton.

La amikeco kaj solidareco de la kursanoj profunde impresas min. Kvankam ili havas malsamajn profesiojn, malsamajn travivaĵojn kaj malsamajn aĝojn, ili vivas harmonie. Ili ne nur helpas unu alian en lernado, sed ankaŭ indulgas unu alian en aliaj flankoj. La instruistino diris al mi, ke nemalmultaj laboristoj en la rafinejo Ĝinŝji interesiĝas pri nia lingvo kaj ili atendas novan elementan kaj mezgradan kursojn. ■



# Ĉu denaskismo, kial ne?

Reage al la artikolo de Tibor Sekelj pri denaska uzo de Esperanto, jen kelkaj faktoj kiuj verŝajne ne estas sufiĉe konataj inter geesperantistoj krom ĉe tiuj kiuj mem praktikas familian Esperanton.

## A) Kial tre malmultaj esperantistoj edukas siajn infanojn denaske en Esperanto?

Laŭ la nuna scio ŝajnas ke komence ne estas pli ol inter 100 kaj 200 familioj en la tuta mondo kiuj tion praktikas. Se oni konsiderus ke estas almenaŭ 10 000 personoj en la mondo kiuj bonege konas la Internacian Lingvon, tiu proporcio estas vere eta. Kial, do, granda plimulto de la esperantistoj ne edukas siajn infanojn denaske krom en la nacia (eventuale du naciaj) lingvo ankaŭ ĉu Esperanto? Laŭ mia kompreno la ĉefa kaŭzo estas psikologia, ĉar por bona esperantisto tio tute ne estas granda problemo paroli al la infano ekde ĝia naskiĝo nur en Esperanto, kaj postuli ke ankaŭ ĝi reciproku. La ĉefa psikologia obstaklo estas tiu ke la gepatroj timas esti rigardataj de la ĉirkaŭa medio kiel stranguloj. Eble en nesufiĉe evoluintaj kaj dogmismaj ŝtatoj oni havus eĉ verajn malagrablojn, ĉar oni ja parolas en iu nekonata, nekontrolebla lingvo. Alian psikologian barieron prezentas tio, ke ofte la medio (kaj la ŝtata kaj la ĉirkaŭfamilia) proklamas la dulingvecon danĝera



Pekina esperantistino Ŝje Jujfeng

por la infana psika evoluo (tion kelkloke asertas eĉ la oficiala "psikologio" kiu servas al la naciismaj intereso, dum la najbaroj kontraŭstaras tion pro ĵaluzo).

Fine, iom strange, kelkaj bonegaj esperantistoj iel subkonscie timas ke iliaj infanoj povus esti iliaj konkurenculoj, kaj tute ne intencas ligi ilin al Esperanto, ofte pravigante tion per "mi ne volas trudi tion al ili, ili mem decidu kiam ili kreskos". Kutime la infanoj lasataj dum la infaneco flanke de la poresperanta agado de la gepatroj, neniam poste decidus lerni la lingvon kaj okupiĝi pri ĝi, ĉar ĝi por ili en la infaneco estis io fremda, io kion ili

abomenis, ĉar ĝi fortiris de ili la gepatrojn.

Tial estas tre malbona fakto, ĉar estas ĉiam pli da tiaj kazoj, ke post la morto de fervoregaj esperantistoj kiuj posedis valoregajn trezorojn el la vidpunkto de Esperanto-historio, iliaj gefiloj rapide neniigas ĉion, forĵetante aŭ forvendante al rubaĵistoj.

## B) Esperante eduki estas tre facila tasko

Kelkaj esperantistoj eble timas ke eduki infanon en Esperanto estas malfacila tasko. Mi povas tuj malkredigi ilin pri tio. La plej simpla maniero estas decidi ke unu el la gepatroj parolu al la infano(j) nur esperante kaj la alia

nacilingve. Poste necesas nur la konsekveneco. Tiu el la gepatroj kiu parolas Esperanton devas absolute konsekvence ĉiam tion fari kaj postuli de la infano ankaŭ reciproki. Se vi bone scias Esperanton, vi absolute ne bezonas timi. Jam post maksimume dumonata uzo de tiu principo, ĝi fariĝos ankaŭ por vi aŭtomatismo. Tute ne pensante, turnante vin al la infano, vi parolos Esperanton—la infano same, eĉ en nekutimaj cirkonstancoj kiam kunestas aliaj homoj kun kiuj vi parolas nacilingve.

Sed krom tiu maniero ekzistas multaj aliaj. Se temas, ekzemple pri internacia paro en kiu oni deziras ke la infano lernu ambaŭ naciajn lingvojn kaj Esperanton kiel la 3-an lingvon, necesas apliki alian sistemon. Oftfoje tiam la patrino parolas, kiam ŝi estas sola kun la infano, sian nacian lingvon, la patro sian, kaj kiam ili ĉiuj estas kune, Esperanton. Ekzistas multaj aliaj kombinoj. Eĉ foje mi aŭdis ke iu el la denaskuloj poste kreskinta deklaris ke dum sia tuta juneco li iel sentis ke Esperanto estas lingvo kiun oni parolas ene, subtegmente. Nome, lia patro parolis al li Esperanton nur hejme. Elirinte eksteren ne plu, timante verŝajne la malbonajn efikojn de la ĉirkaŭa medio. Ĉiuj manieroj estas bonaj nur se ili estas absolute **konsekvencaj**. Do, se vi decidis ke ĝi estu ĉambra lingvo, ĝi **ĉiam estu ĉambra lingvo!**

Kompreneble, sistemoj en kiuj Esperanto estas malpli uzata (evidente "ĉambra lingvo" signifas multe malpli da ĉiutaga praktikado ol la "tutpatra lingvo"), signifas ke la infano ne havos en Esperanto tiom riĉan vorttrezoron kiel en la nacia lingvo, sed la bazajn lingvajn regulojn kaj lingvan fluecon ĝi posedos sambone kiel en la nacia lingvo. Tamen, se la diferenco inter la lingva kono de la du (aŭ tri) lingvoj estas tro granda, la infano klopodos rezisti al tiu

lingvo en kiu ĝi senteble malpli facile esprimas sin. Tio okazos en la 3-a aŭ 4-a jaraĝo kiam la infano konscios ke ankaŭ la gepatroj parolas la nacian lingvon. Tio estas la signo ke vi devas esti pli intense kun la infano kaj dediĉi al ĝi pli da tempo en kiu oni aplikas Esperanton. Post proksimume 6-a aŭ 7-a jaraĝo la ligvoj jam estas tiom enradikiĝintaj ke eĉ se vi tute ĉesos paroli al ili, ili neniam plene forgesos ĝin. Sufiĉas ke la infano post pluraj jaroj estu kelktage en E-medio, ĝi tuj reparolos ĝin.

Tamen okazas ankaŭ, ke Esperanto estas nur lingvo de la patro kiu ne vojaĝas al internaciaj E-aranĝoj en kiuj troviĝas ankaŭ infanoj, sekve la infano havas nur maloftajn kontaktojn kun plenkreskaj alilandaj esperantistoj. Tiuj infanoj, kiuj en sia juneco ne havis okazon uzi la lingvon ankaŭ kun samaĝuloj, en sia konscia vivperiodo komencas negative rilati al Esperanto kaj, neniam trovinte personajn amikojn esperantistojn, ili poste fariĝas eĉ kontraŭuloj de Esperanto.

Sekve, tre gravas rilati tuj kun similaj familioj. En Eŭropo laŭeble kun alilandaj familioj plej proksimaj—en Azio aŭ Ameriko verŝajne estas bona eĉ kontakto kun tia samlanda familio. La plej bona maniero estas se grupo da tiaj familioj (kutime iu el la familioj transprenas la ĉefan iniciatan rolon) organiziĝas kaj unufoje jare organizas 7-10-tagan komunan internacian familian renkontiĝon.

Nun miaj filinoj estas 9- kaj 11-jaraj. Jam tri jarojn mi ne plu parolas Esperanton al ili, nur insistas ke ili regule legu librojn en Esperanto. Sed mi plane ĉiujare havas plurajn kontaktojn kun eksterlandaj amikaj familioj kiuj havas similaĝajn infanojn. Nia familio ĉiujare ĉeestas renkontiĝojn de Esperanto-familioj (7-10-tagajn), 2-3-foje jare vizitas najbarlandajn amikajn familiojn

kaj ni same akceptas 3-4-foje jare iliajn vizitojn. Tio signifas ke niaj infanoj minimume unu monaton jare efektive uzas Esperanton kun samaĝuloj, siaj geamikoj, kaj senprobleme retenas kaj eĉ plivastigadas siajn lingvajn konojn, nature, daŭre havante pozitivan sintenon al tiu lingvo. Ankaŭ al la Movado, ĉar ni edukas ilin ankaŭ pri ĝiaj celoj.

Post du-tri jaroj ili atingos la aĝon de junulinoj kaj mi esperas ke ili volonte aktivos en TEJO.

### C) Infanoj de denaskuloj al lingva nivelo en aziaj landoj

T. Sekelj havas la tezon ke, estus pli da bonaj parolantoj kaj pli da kapablaj homoj ĝuste instrui ĝin, se multaj denaskuloj vivus en aziaj landoj en kiuj Esperanton oni malpli facile elparolas kaj lernas.

Teorie tiu tezo estas bona. Praktike ĝi havas du gravajn mankojn: 1-e, Dum la cent jaroj de Esperanto neniam estis multaj familioj en kiuj oni edukis E-denaskulojn. Sekve estas verŝajne ke ankaŭ estonte ili ne estos multaj kaj ankaŭ tiuj ĉi pledoj de T. Sekelj kaj mi ne ŝanĝos la inertecon kaj la menciitajn psikologiajn barierojn.

2-e, La infanoj lernantaj denaske povas bonege mastri E-on el ĉiuj vidpunktoj, sed fonetike ilia lingvaĵo dependas de la patroj kiuj paroligas ilin. Do, ankaŭ denaskuloj ofte parolas Esperanton kun sentebla nacia akcento uzante sonojn neekzistantajn en la esperanta sonsistemo. Sekve, ĉinaj denaskuloj lernos la lingvon de ĉinaj gepatroj inter kiuj verŝajne nur malmultaj fonetike tre bone mastras la lingvon, kaj do, lernos paroli ĝin kun ĉinaj fonetikaj specialaĵoj.

Malgraŭ tio, mi subtenas la pledon por pli da denaskuloj, ĉar fari tion ne estas malfacile por ĉiu bona esperantisto, kaj se farus tion ĉiuj, ni aŭtomate havus plurajn milojn da bonegaj lingvokonantoj en la postaj generacioj. ■

# Nova etapo de edukado pri profesia tekniko en Ĉinio

Li estas Caj Ĝengdong, vicestro de fiŝbredejo. En la lastaj du jaroj li gvidis fiŝistojn por disvolvi produktadon, tial la pohektara produktokvanto de fiŝoj kreskis de 5 400 al 7 515 kg. kaj naŭobliĝis la totalaj produktokvanto kaj produktovaloro de fiŝoj. La enspezo de ĉiu fiŝista familio superis 20 000 jŭanojn jare. Tial la fiŝbredejo fariĝis avangarda en la provinco Hubej kaj Caj Ĝengdong estas laŭdita de la fiŝistoj.

Caj Ĝengdong diplomitiĝis el la Akvoprodukta Mezlernejo de Honghu en Hubej-provinco. La lernejo situas ĉe la bordo de la bela Honghu-lago. En 7 jaroj post ĝia fondiĝo sume 475 lernantoj diplomitiĝis, inter kiuj malmultaj lernis daŭre en agronomiaj kaj forstokulturaj institutoj, iuj fariĝis teknikistoj de fiŝbredado en urbo aŭ fiŝbredejo aŭ baznivela funkcioj kaj instruistoj, kaj ĉiuj aliaj fariĝis fakuloj de fiŝbredado. Je mencio de la lernejo, oni do laŭdis, ke ĝi funkcias bone.

En la lastaj jaroj la profesiaj lernejoj, kiel la Akvoprodukta Mezlernejo de Honghu, rapide multiĝis en diversaj lokoj de Ĉinio, por elkulturi pli multe da diversfakaj talentuloj al la ŝtato kaj malfermi novan vojon al labordonado por geĵunuloj en mallonga tempo. Laŭ la statistiko de rilata departemento, en 1987 en la tuta lando troviĝis 8 381 agronomiaj kaj profesiaj mezlernejoj, kompare kun tiu de la antaŭa jaro la nombro pliiĝis 194; ili varbis 1.132 milionojn da lernantoj, kiuj pliiĝis 4.5%,

kompare kun tiu de la antaŭa jaro. 5.16 milionoj da lernantoj lernis en diversaspecaj altklasaj profesiaj mezlernejoj. La nombro konsistigis 40% de la lernantoj en altklasaj mezlernejoj, kun pliiĝo de 1.7% kompare kun tiu de la antaŭa jaro; la mezgradaj kolegioj varbis sume 715 000 lernantojn, kiuj pliiĝis 5.7% kompare kun tiuj en la antaŭa jaro kaj la teknikaj lernejoj varbis 420 000 lernantojn, kiuj pliiĝis 16.6% kompare kun tiuj en la antaŭa jaro.

En la lastaj jaroj la rapideco de la disvolviĝado en la ĉina profesia edukado estis nekomparebla al tiu antaŭe. Dum la pli ol 80 jaroj de 1866 ĝis 1949, en la malnova Ĉinio estis nur 3 teknikaj lernejoj, 561 mezgradaj kolegioj kaj la aliaj lernejoj egalaj al

mezgrada kolegio kaj teknika lernejo kun 230 000 lernantoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ĉina registaro metis la disvolvon de profesia kaj teknika eduko sur la saman pozicion paralele al la disvolvo de ĝenerala eduko kaj difinis la principon samtempe disvolvi ĝeneralan edukon kaj edukon pri profesia tekniko. En la unuaj 5 jaroj post la fondiĝo la registaro financis la konstruadon de mezgradaj kolegioj kaj teknikaj lernejoj kun necesaj kondiĉoj kaj elkulturis grandan nombron da mez- kaj element-klasaj teknikistoj kaj alte kvalifikitaj laboristoj por la ekonomia restarigo kaj la disvolvo de diversaj entreprenoj de la nova Ĉinio. Depost 1958 unuj post aliaj

Lernantoj de la elektronika kurso de la Profesia Mezlernejo en Hŭanggu-distrikto de Ŝenjang en praktiko





aperis agronomiaj mezlernejoj kaj alispecaj profesiaj mezlernejoj, kaj ilia nombro en 1960 atingis 30 000 kun 2.96 milionoj da lernantoj. Dum la 10 jaroj de 1966 ĝis 1976 la granda parto de la mezgradaj kolegioj, teknikaj kaj profesiaj lernejoj estis devigite fermita pro la ĥaoso de la kultura revolucio kaj la ĉefaj labor-fortoj, materialoj kaj kapitalo estis uzataj por blinde funkciigi altajn mezlernejojn, tiel ke estiĝis monotona anomalia stato de la strukturo de mezgrada eduko.

En 1978, la tutlanda eduka laborkunveno proponis pligrandigi la procentojn de la lernejoj de profesia tekniko. Poste, koncernaj departementoj de la ŝtato plurfoje dekretis por reformado de la strukturo de mezgrada eduko kaj disvolvo de eduko pri profesia tekniko, kio efike direktis kaj antaŭenpuŝis restariĝon kaj disvolviĝon de la tutlanda eduko pri profesia tekniko.

Ekde 1985, disvolvo de eduko pri profesia tekniko jam estis difinita kiel unu el la gravaj eduk-sistemaj reformoj de Ĉinio. La eduko pri profesia tekniko estos paŝopostapaŝe disvolvita en eduk-sistemon de profesia tekniko, kiu

ampleksas gradojn elementan kaj altan, diversajn profesiojn kaj racian strukturon, kaj ankaŭ interligiĝas kun la ĝenerala eduko. Tio markas, ke la ĉina eduko pri profesia tekniko eniris en novan etapon de sia disvolviĝo.

Por adaptiĝi al la nova situacio, la ĉinaj profesiaj lernejoj havas multajn formojn, multajn gradojn, multajn fakojn kaj multajn elirojn por la diplomitoj. La "multaj formoj" signifas disvolvi la edukon pri profesia tekniko en multaj formoj. Nun la formoj, kiaj mezgrada kolegio, teknika lernejo, profesia mezlernejo, agromia mezlernejo, postlabora lernejo kaj profesia klaso en alta mezlernejo, okupas gravan lokon en la tuta sistemo de eduko pri profesia tekniko. Krome, en Ŝanŝji- kaj Hebej-provincoj funkcias profesiaj lernejoj por kripluloj kaj en Ljaŭning- kaj Gansu-provincoj profesiaj lernejoj por knabinoj.

"Multaj gradoj" signifas funkciigi en diversaj lokoj diversajn altajn, mezajn kaj elementajn profesiajn lernejojn, kiuj formis profesian edukon sistemon el alta, meza kaj elementa klasoj. "Multaj fakoj" signifas por adaptiĝi al la

disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj aliaj aferoj, en la profesiaj lernejoj funkciigi pli ol 50 fakojn pri industrio, agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, fiŝbredado, konstruado, trafiko, eduko, literaturo, arto k.a. "Multaj eliroj" signifas, ke la diplomitoj el la profesiaj lernejoj, escepte tiujn de la mezgradaj kolegioj kaj teknikaj lernejoj enoficigitajn de la ŝtato laŭ bezono, estas akceptitaj de koncernaj departementoj post elekto.

La ĉina eduko pri profesia tekniko ĉefe aludas profesian edukadon kaj kulturadon antaŭ ofikakiro. La 10-jara ĥaoso de la kultura revolucio alportis grandegan perdon al la ĉina eduko, tial perturbiĝis la kulturado de laboruloj kaj aperis inversa fenomeno de la proporcio kaj strukturo de laboruloj superaj, mezgradaj kaj elementaj. Por ŝanĝi la staton la ĉina eduko pri profesia tekniko nuntempe nepre devas preni mezgradan edukon pri profesia tekniko kiel la ĉefan parton.

Nun, la diplomitoj de la mezgradaj profesiaj lernejoj estas tre bonvenaj al diversaj entreprenoj.

En varieteo honore al novvenintoj ĉiuj spektis programerojn, sed gvidanto de la 5-a radiofabriko de Uŝji en Ĝjangsu-provinco retene petegis la estron de la Elektronika Profesia Mezlernejo de la urbo sendi al la fabriko 60 diplomitojn.

Ĉar la diplomitoj el la Elektronika Profesia Mezlernejo faris gravan kontribuon en produktado de la televidila fabriko en la urbo, tial la televidilo kun marko "Hongmei" produktita de la fabriko akiris tri unuajn premiojn kaj unu ŝtatan varbonkvalitan premion en jara aljuĝado de la tutlandaj televidiloj. En la lastaj du jaroj la televidila fabriko akceptis pli ol 150 diplomitojn el la Elektronika

Instruistino konigas al lernantoj de la Hŭangĝŭang-a Profesia Mezlernejo fasonadon de novtipa vesto.



# Flugiloj de ansero

Ansero fiere paŝadis en korto, kun longa kolo kaj levita kapo. Vidinte, ke iu kolombo transflugis ĝin kaj haltis sur tegmento, la ansero disetendis siajnflugilojn kaj forte frapis per ili, laŭte dirante: "Kolombo, kolombo, ni komparu niajnflugilojn."

"Kompreneble, mi ne povas

kompari min kun vi. Viajflugiloj estas multe pli grandaj ol la miaj!" ridis la kolombo.

"Miajflugiloj estas grandaj, multe pli grandaj! La kolombo estas venkita!" La ansero memkontente iris al legom-kampo, kun levita kapo. Subite io malgranda transflugis ĝin kaj haltis sur floro

de legomo. Ĝi estis abelo. Vidinte ĝin, la ansero refoje disetendis siajnflugilojn kaj forte frapadis per ili la teron, ridegante: "Ha, ha, ha! Ĉu tiuj de malgrandaj membranoj sur via dorso estas kalkuleblaj kielflugiloj?"

"Jes, ili estasflugiloj," mallaŭte respondis la abelo kaj flugis de sur

Profesia Mezlernejo. La diplomitoj senditaj al la 5-a radiofabriko estas malpli multaj ol tiuj al la televidila fabriko, kaj tio enviigis la antaŭan, ĉar ili klare vidis, ke la diplomitoj el la Elektronika Profesia Mezlernejo povas rapide adaptiĝi al sia laboro de nova tekniko kaj havas multan scion kaj grandan kapablon facile kompreni ion novan. Enirinte en la fabrikon, plejparto el ili povas preni sur sin gravan teknikan laboron kaj rapide fariĝis ĉefa forto de la fabriko. Do ne estas mirige, ke la 5-a radiofabriko senpacience postulis de la lernejo diplomitojn.

Por disvolvi la edukon pri profesia tekniko, tri rimedoj estas aplikataj en funkciigado de lernejoj en diversaj lokoj: funkciigo de edukaj departementoj mem, funkciigo de entreprenoj kaj kuna funkciigo de ili ambaŭ. La Hŭangĝŭang-a Profesia Alta Mezlernejo de Ŝiĝingŝan-distrikto en Pekino estas funkciigata kune de eduka departemento kaj entrepreno. Tiu profesia lernejo fondiĝis en 1983. La vestofasonado kaj farado de la lernejo estas fame konataj en Pekino per la specifa stilo. En la pekina Ĝanlej-pokala konkurso de mez-

lernejana fasonado okazinta antaŭ nelonge kelkaj vestoj projektitaj kaj faritaj de la lernejo gajnis la unuan, duan kaj trian premiojn. Por kontentigi la socian bezonon, la lernejo funkciigas ankaŭ klason de kosmetiko.

Tamen, al la lernejo mankas instruistoj, teknikoj, mono kaj instalaĵoj. Por solvi la malfacilaĵon, la lernejo iris peti helpon de la Frizosalono de Ĉajŝikoŭ kun lertaj frizistoj, altnivela administrado kaj bona ekonomia efiko kaj prezentis al ili planon pri kuna funkciigo de kurso. Ĝuste tiam la frizosalono serĉis bazon por trejni novajn frizistojn de kosmetiko. Sekve la lernejo fariĝis bazo kaj la frizosalono sendis al ĝi unu teknikiston, kiu respondecas pri teknika direktado kaj komunikado de informoj. Samtempe en la frizosalono unu superklasa teknikisto persone prenis sur sin trejnadon kaj kulturis por la lernejo 6 instruistojn de fakaj lecionoj, tiel ke ili kune funkciigas la duan ĉefan fakon de la Hŭangĝŭang-a Profesia Alta Mezlernejo de frizo kaj kosmetiko.

La eduko pri profesia tekniko en iuj lokoj ne povas konformi al

la bezono de la ekonomia reformo kaj ekonomia disvolviĝo en la kamparo kaj multaj profesiaj lernejoj en la kamparo nur imitas la faron de la urboj. La tutlandaj mezgradaj kolegioj kaj teknikaj lernejoj progresas malrapide kaj ankoraŭ ne sufiĉe multe disvolvis siajn latentajn fortojn; la rolo, kiun devas ludi la mezgradaj kolegioj en kulturado de la mezgradaj teknikaj kapabluloj, ankoraŭ ne estas klare difinita.

Laŭ la celo de la disvolviĝo de eduko pri profesia tekniko difinita en la eduka laborkunveno pri profesia tekniko, antaŭ kaj post 1990, la nombro de lernantoj de la profesiaj lernejoj sur nivelo de alta mezlernejo en plejparto de la tuta lando devos egali al tiu de ordinaraj altaj mezlernejoj. En la venontaj 5 jaroj oni kulturos 8 milionojn da elementaj kaj mezgradaj teknikistoj kaj administrantoj kaj fundamente ŝanĝos la neracian staton de troa malmulteco de elementaj kaj mezgradaj laboruloj, kaj granda parto da diplomitoj el mezlernejoj en la kamparo devos esti trejnita je profesiaj teknikoj en diversaj gradoj, kaj oni establos grupon da ekzemplaj profesiaj lernejoj kaj trejnaj centroj. ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: unu internacia respondkuponon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizaĵoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* Wang Yunjie, 25-jara, dez. kor. kun diversaj ĝeesperantistoj pri geografia, historio, kulturo, moderna vivo de junularo, kolekti bildkartojn kaj interesigi librojn. Respondo garantiata. Adr.: Fenshui Liangguansuo, Tonglu, Hangzhou, Ĉinio.

\* 25-jara teknikisto, kiu interesiĝas pri filatelo, foto, sporto kaj muziko, dez. kor. kun tm. ĝeesperantistoj. Adr.: Zhang Xiaohua, Changzheng Qichechang Dipanfenchang, Xingtai, Hebei, Ĉinio.

\* 25-jara fraŭlo Zhang Yiqun dez. kor. kun ĝeesperantistoj tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: 110 hao 312 shi, Yichuan San Cun, Putuoqu, Shanghai, Ĉinio.

\* 30-j junulo dez. kor. kun diverslan-

daj esperantistoj kaj kolektas bk. k. pm. Helmut Eschen, Helsinkier Str. 83/703, Rostock-22, DDR-2520.

\* 26-j oficistino interesiĝas pri ĉiutaga vivo, muziko, danco. Jikewen, 666-504, Jiefangbeilu, Guangzhou, Ĉinio.

\* 25-j studento Zhang Lanbin dez. kor. kun ĝeesperantistoj el la tuta mondo pri diversaj temoj. Adr.: 5/504, 221 long, Huaihai Xilu, Shanghai, Ĉinio.

\* La geanoj de Esperanto-Rondeto en Benešov serĉas diversajn amikojn en Ĉinio. Bonvolu skribi al s-ro Vaclav Stiburek, J. Franka 1731, CS 25601 Benešov u Prahy, Ĉeĥoslovakio. Respondo garantiata.

\* Pri diverslingva korespondado, kulturaj interŝanĝoj junularaj, tendaroj en Turkio kontaktu nur (IKS) UKS genctürk cad. Mahfil SOK. 20/4, Laleli 34 470 Istanbul.

\* Mi dez. kor. kun ĉinaj gejunuloj kaj interesiĝas pri ĉina kulturo kaj vivo de la ĉinaj junuloj. Adr.: Kaudever Ferenc, 1137 Budapest, Pozsonyi ut 25, Hungario.

\* 13-j komencantino dez. kor. kun ĉinaj knaboj. Adr.: Hegedus Kingo, Nyiregyháza, Tozdi út 24, 4400, Hungario.

\* 17-j junulo dez. kor. Adr.: Jazdan Ebrahimi, Oboor-e-Bala, Lamook-kamarbandy-Ghaemshahr, 47618, Iran.

\* Dez. kor. kun tibetaj esperantistoj por interŝanĝi informojn. Adr.: Augusto Cesar Jardim, Rua Celso Garcia, 185, 14. 300-Batatais -Est.S.Paulo, Brazilo.

\* 35-j s-ino dez. kor. kun ĝeamikoj tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondo certa. Adr.: Alba Estela Rodriguez, Jtuzaingo 2028, 3000 Santa Fe, Respubliko, Argentino.


\* Juna instruistino dez. kor. esperante, angle, germane, ruse, k interesiĝas pri Ĉinio, politiko, muziko, literaturo, etnografia kaj bildkartoj. Adr.: Sylvia Hariwig, Krs. Demmin, Sarow 64, 2031, GDR.

\* Monika Schrage, Augsburg Str. 84, DDR-Dresden, 8021, 42-j dez. kor. pri politiko, historio, pac-mov., literaturo, sporto kaj kolektas bk. prosp. k. suvenirojn.

\* Mi amas librojn, literaturon, arton, filatelon kaj dez. kor. kun ĝeesperantistoj el Ĉinio. Adr.: Mikel Untzilla, San Inazio Auzategia 35-3ezk, 20230 Legazpi (Gipuzkoa), Euskadi, Hispanio.

\* Mi volas havi amikojn en la tuta mondo. Skribu al: S-ro A.J. Dayton, S. Halsmere Road, Camberwell, London S.E.S. 92N, Britio.

\* Dez. ŝanĝi nur uzitajn pm. prefere nordeŭropajn antaŭ 1982. S-ro Gallo Lassere Paolo, Via San Martino 100, 10060 Cantalupa, Italio.



la floro. "Kvankam miaj flugiloj estas tre malgrandaj, tamen per ili mi povas flugi malproksimen. Pardonon, mi devas reveni hejmen kun poleno. Ĉu vi bonvolus flugi kune kun mi por iom da tempo?"


Dirinte tion, la abelo forflugis zumante. La ansero forte movis siajn flugilojn por levi sin en la aeron, sed apenaŭ ĝi levis sin, ĝi falis sur la teron.

Tiam aŭdigis mallaŭta bruo de flugo de la kolombo. La ansero tuj kuntiris siajn grandajn flugilojn kaj eksilentis. ■



# Gongfu-teo

de ŜI ŜJAŬJU



Servico por gongfu-teo

Ĉinoj trinkas teon laŭ malsamaj manieroj, kiuj estas rigardataj kiel elita parto de la ĉinaj moroj. Kaj en diversaj lokoj de Ĉinio oni trinkas malsame. Gongfu-tetrinkado, unu el ili, vidiĝas en iuj lokoj de la provincoj Gŭangdong kaj Fuĝjan.

Gongfu-teo estas infuzata dum longa tempo. Ĝi estas preparata laŭ serio da rigoraj procedoj, kiuj tamen malsamas kun la japana te-ceremonio, komplike farata kaj uzata por prezentado. Gongfu-teo estas preparata kaj trinkata laŭ jena maniero:

Antaŭ ĉio 3 aŭ 4 homoj sidiĝas kutime sur la sidlokoj por la gastiganto kaj gastoj respektive. A. La gastiganto elprenu bon-specan teon kaj konigu al la gastoj ĝiajn karakterizaĵojn kaj pasigas ĝin al la gastoj por flari kaj apreci. B. Verŝu bolantan akvon en la malplenan kruĉon kaj verŝu la akvon el la kruĉo en te-pleton (prefere brun-fajencan). C. Metu tefoliojn en la kruĉon per te-kulero, sed nepre ne per la mano, por ke alia odoro ne enmiksiĝu.

Ĝenerale oni metas tefoliojn je  $\frac{2}{3}$  de la kapacito de la kruĉo kaj eĉ iom pli. Ĉ. Verŝu bolantan akvon en la kruĉon ĝisrande kaj per bambuaj bastonetoj forigu la teŝaŭmon sur la akva surfaco kaj tuj verŝu la teakvon de la kruĉo en la te-pleton aŭ grandan tason. D. Verŝu bolintan (ne bolantan) akvon en la kruĉon. E. Metu la kovrilon sur la kruĉon kaj verŝu bolantan akvon sur la kovrilon, por ke estu egala la temperaturo en kaj ekster la kruĉo. F. Kiam la teo estas infuzata, lavu la tetasetojn per la akvo uzita en la procedoj B kaj Ĉ. (La tetaseto estas pli malgranda ol vintaseto, kaj la te-kruĉo estas nur tiel granda kiel pugno.) G. Kiam la teo estas preparita en la procedo D, movu la kruĉon kelkajn cirklojn laŭ la rando de la te-pleto, por ke la akvo ne gutu en la tetasetojn. Ĝ. Vicigu la lavitajn kaj varmigatajn tetasetojn kaj verŝetu la teakvon en ilin (ne plenigu unufoje la taseton unuan kaj poste la duan por ke la denseco kaj la gusto en la taseto

estu malegalaj) aŭ verŝu la teakvon unue en grandan tason kaj poste reverŝu ĝin en la tasetojn. H. Respekti la maljunulojn kaj cedi reciproke estas tradicia virto de la ĉina popolo. Plej grava estas la unua propono de teo, kiun oni prezentas nepre al la gastoj, okupanta la honoran lokon. Ĥ. Gustumado estas la plej grava el la procedoj. La gustumantoj kun granda intereso aprecas la koloron, guston kaj odoron, ripetade flarante kaj gustumante. La maljunaj maniuloj de gongfu-teo per tri fingroj prenas taseton, movas ĝin inter la nazo kaj lipoj, flaras kaj trinketas laŭplaĉe kun fermitaj okuloj, aspektante kiel ebriuloj ignorantaj ĉion alian. De tio oni ne povas ne admiri la mirigan forton de gongfu-teo.

Por infuzi la gongfu-teon oni preferas uzi la brun-fajencan kruĉon de Jiŝing, Ĝjangsu-provinco, porcelanajn tasetojn de Gingdeĝen, Ĝjangŝji-provinco kaj fontakvon aŭ putakvon se tio mankas, sed neniam kranakvon. ■

# Vigla maljunulo en sporto

En apartamento de Pekino, mi vidis viglan grizharan Ĝuang Janlin. Mi pririgardis lin por konstati, ĉu li vere portas tre maldikan veston en frosta vintro. Tiam la temperaturo estis 6°C sub nulo, tamen la 66-jara maljunulo portis nur eŭropan veston kun ĉemizo ene kaj nesubŝtofitan pantalonon.

Mi demandis: “En tiuj vestoj vi vin ekzercas ekstere, ĉu?” Li kapjesis kaj kun rideto respondis: “Vidante, ke mi en 20 vintroj portas nur tiajn vestojn, oni demandis pri mia saniga sekreto. Kiel respondi? Tio estas ŝuldita

nur al mia longtempa sportado.”

Febla kaj malsanema estis Ĝuang Janlin en la infaneco. Influante de sia patro, li turnis grandan atenton al la sportado kaj iom post iom konis ĝian utilecon. Li ŝatis multajn sportbranĉojn, precipe naĝon. La longtempa sportado sanigis lian korpon kaj vigligis lian energion. Mirindaĵojn li faris de tempo al tempo en sportado.

Post la Printempa Festo de 1986, pro surprizatako de frosta fluo hurlis norda vento en

Hongkong kaj Ĝiulong, la lokanoj portis dikajn vestojn. Tamen Ĝuang Janlin, oficvojaĝante tie, ĉiumatene ĝoje naĝis ĉ. unu horon en la Ŝensujŭan-a Marborda Banejo. Surbordiĝinte, li eĉ diris: “Ne tre malvarmas la marakvo.” Lia frostorezisteco multe mirigis la apudstarantojn.

Plonĝo estas pasie ŝatata de Ĝuang Janlin. 40-jara, li lernis de aliaj plonĝon kaj en 1962 li sukcese plenumis ĉiujn devigajn kaj nedevigajn disciplinojn por unuaklasa sportisto kaj estis titolita kiel duaklasa sportisto. Eĉ hodiaŭ li ankoraŭ povas facile plonĝi en

Ĝuang Janlin (meze) kaj membroj de la trupo de longdistanca kuro




multaj movoj de sur 10-metra turo.

Li multfoje partoprenis maratonon. Lastjare li partoprenis la Unuan Ferhoman Maratonon de Ĉinio, en kiu ĉiu sportisto devis fari 2 000-metran naĝon, 80-kilometran bicikladon kaj 42.195-kilometran kuron. Ĝuang Janlin, la plej aĝa el la 45 sportistoj, plenumis ĉiujn disciplinojn en 12°24'16", dank' al kio li estis admirata.

En dekoj da jaroj, sur diferencaj postenoj Ĝuang Janlin funkciis kiel gvidanto kaj kumulis plurajn oficojn. Li ofte laboris ĝis profunda nokto. Tamen li neniam ĉesigis matenan fizikan ekzercadon. Li daŭrigis kuradon, montogrimpadon kaj naĝadon. Se la kondiĉoj ne permesis, li do sin ekzercis en la loĝĉambro per transkapiĝo, staro sur la manoj kun la kapo malsupren kaj halterlevo. Liaj halteroj estas faritaj antaŭ 20 jaroj, ĉiu kun pezo de 20 kg. Ĉiufoje li etendis kaj levis ilin 300 fojojn.

Kompare kun s-ro Ĝuang, lia edzino estas tute alia. Ŝi estas marasma. Per mallaŭta voĉo mi demandis s-ron Ĝuang: "Kiel vi ne sportigas ŝin?" Li respondis, ke



Ĝuang Janlin en la konkurso de la Unua Ferhoma Maratono

ŝi suferas de hipertensio. Post kelkara fizika ekzerco ŝia sanstato iom pliboniĝis.

S-ro Ĝuang diris, ke fizika ekzerco diferencas de sporta konkurso. Per la lasta oni konkuras laŭ samaj reguloj, kaj per la antaŭa oni konscie ekzercas sian korpon por pli bone lerni kaj labori. Pro la diferencoj inter ŝatoj, metodoj kaj fortecoj de ekzercantoj pri sportado kaj pro malsameco en sanstato, ili ne

devas konkuri unu kontraŭ alia, des malpli blinde imiti unu alian. Sed male, ili devas partopreni en sportado laŭ sia sanstato, interalie, pli grava estas persistemo. Resume, oni devas, laŭ sia sanstato kaj objektivaj kondiĉoj, persiste partopreni en sportado kaj progresi iom post iom tiurilate. Tio estas la sporta koncepto kaj sperto de Ĝuang Janlin pri la sanigo.

Partopreni en sportado estas nemankigeble por Ĝuang Janlin en la vivo. Dum parolado li foje refoje emfazis, ke oni persistas en sportado ne nur por sanigi sin, sed ankaŭ por solidigi sian spiriton. Ĉio ĉi estas la premiso bone labori kaj levi laborefikon por ĉiu homo. Tial, li ĉiam pacience konigas al aliaj la utilecon kaj sperton de la sporto.

Vintra naĝo estas tre rara por la pekinanoj en 1978. Tiam Ĝuang Janlin ofte rekomendis ĝin al la apudstarantoj. Kuraĝigite de li, multaj homoj komencis sin bani per malvarma akvo en printempo kaj aŭtuno, antaŭ ol naĝi en frosta akvo. Nun, li funkcias kiel honora prezidanto de la Pekina Vintronaĝa Klubo kun pli ol 2 000

(Daŭrigo sur p. 67)

Ĝuang Janlin (dekstre) kaj la aŭtoro





## Bildrakontoj de Ĉina Esperanto-Eldonejo



### Songô de Ĝenĝen

Teksto kaj bildoj de Mej Jing, tradukita de Ŭang Ŝijong 46p. 18.4 × 17.2 cm. 88-Es-193P US\$1,70 £0,80

Knabino Ĝenĝen estas tro elektema en manĝado kaj manĝas tre malmulte. Ŝi ofte manĝigas animaletojn per bongustaj manĝaĵoj, kiujn la patrino preparis speciale por ŝi. Iun tagon Ĝenĝen havis strangan songon, en ĝi ŝi fariĝis tre malgranda, ke ŝi povas eĉ rajdi sur la dorso de libelo. Kune kun la libelo Ĝenĝen venis en insektan mondon... Ĉu vi volas scii, kian sperton ŝi havis? Legu la libron.

### Magia Peniko

Adaptita de Han Ŝing, Pentrita de Li Ŝiĝji, Tradukita de Ĝjang Hongĝang. 40p. 18.5 × 21 cm. 88-Es-178P US\$1,30 £0,65

Ma Ljang estis malriĉa sed tre bonkora knabo. Li tre ŝatis pentri, sed li ne havis monon por aĉeti penikon. Tamen li diligente lernis ĉiutage. Li desegnis bildojn per vergo aŭ lignokarbo. Lia diligenteco kortuŝis feon, kiu donacis al li magian penikon. Ĉio pentrita per ĝi povas fariĝi vera. Per la peniko Ma Ljang helpis la malriĉulojn kaj punis la avidajn riĉulojn.

Kun ĉarmaj bildoj, facile komprenebla teksto, la libro estas bona legaĵo taŭga por infanoj aŭ komencantoj.

### Transiro de Ponto

Bildrakontoj de Le Ŝjaŭjing  
20p. 18 × 20 cm. 88-Es-305P US\$1,10 £0,56

En ĝi kolektiĝas 18 grupoj da karikaturaj pri infana vivo, pentritaj de konata ĉina karikaturisto Le Ŝjaŭjing. Plena de humuro ĝi alportos al vi elkoran ridon kaj ĝojon.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Perantoj de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Novaj sukcesoj de la ĉina farmacio

1987 estis jaro, kiam Ĉinio akiris riĉan rikolton en la farmacia kaj higiena laboro. En tiu jaro la Higiena Ministerio de Ĉinio donis premion de scienc-teknika progreso al 120 higienaj scienc-teknikaj fruktoj. Ankaŭ la antaŭ nelonge fondita la Ŝtata Ĉin-Medicina Administra Buroo prezentis 25 gravajn fruktojn de la ĉina farmacio. Ili estas elektitaj el la 730 fruktoj rekomenditaj en la tuta lando.

Kompare kun tiu en 1986, ĉi tiuj du premiadoj pli atentis pri la disvastigo de la fruktoj, iliaj funkcio en prevento kaj kuraco de malsanoj kaj efikoj socia kaj ekonomia. Gvidanto de la Higiena Ministerio opinias, ke la administra formo de higiena scienc-esploro iom post iom ŝanĝiĝas de la antaŭa formo raporto — premio — disvastigo al la nuna raporto — disvastigo — premio.

Inter la 120 premiitaj atingoj la klinikaj esploraj temoj konsistigas pli ol 60%, kaj la ceteraj estas pri la aplika bazteoria esploro, studo pri ekspluato k.a. Krome, oni unufoje donis premiojn al 4 medicinaj administraj scienc-esploraj fruktoj, kia Esploro pri Kurac-servo en la Ĉinaj Urboj.

La veneniĝo pro manĝo de degenerinta sukerkano estas akuta malsano cirkulanta en 8 provincoj de norda Ĉinio. La malsanuloj suferas ĉefe de difektiĝo en la sistemo de la centraj nervoj. La gravaj malsanuloj povas baldaŭ morti, aŭ ilin trafos kripliĝo por la tuta vivo. Dum

multaj jaroj oni ne trovis efikan rimedon por preventi kaj kuraci ĝin kaŭze de nekonado de la kaŭzo de la malsano. Post 5-jara esplorado la Higiena Instituto de Nutro kaj Manĝaĵoj sub la Ĉina Profilaktika Akademio trovis la patogenan kaŭzon kaj unufoje en la mondo publikigis, ke la speciala ŝimo en degenerinta sukerkano — *ĝjeling*-sporo estigas venenaĵon. Ekde la 50-aj jaroj de ĉi jarcento, estis en Ĉinio nur kelkaj esploroj, por vere apartigi patogenajn mikrobojn. La trovo de la kaŭzo pri la venenado ja metis bazon por pli profunda esplorado kaj la fina superregado de la venenado. Nun la atingo estas disvastigata en la produktaj regionoj de sukerkanoj kaj regionoj de cirkulanta degener-sukerkana venenado de 13 provincoj.

La fenomeno de delokiĝo kaj malorda viciĝo de la dentoj estas nomata dent-makzela anomalio en medicino. Ĝi estas buŝa malsano kun granda morbo-kvanto. Laŭ statistiko, ĉ. 49% de la ĉinoj suferas de tiu malsano, inter kiuj ĉ. 5% suferas grave kaj granda parto da suferantoj ne estas ĝustatempe kuracita. La tekniko por kuraci dent-makzelan anomalion per operacio aperis unue en Eŭropo kaj Usono en la meza periodo de la 60-aj jaroj. Ekde 1973 la Stomatologia Instituto sub la Pekina Medicina Universitato disvolvis kompare sisteman esploron pri kirurgia ĝustigo de la anomalio. Laŭ ĝia opinio, la regula kirurgia ĝustigo

devas inkluzivi ĝustigon kaj mezuradon per iks-fotografajo de la kapo antaŭ operacio, antaŭmezuradon pri la efiko de modela kirurgio kaj ĝustigon post operacio. Krom tio, ili la unuaj kreis enlande ankaŭ rimedon rapide praktiki ĝustigon kaj kuracadon por alilokaj suferantoj, kiuj ne havas necesajn kondiĉojn ricevi la ĝustigon antaŭ operacio kaj ne povas esti kuracataj longe en la hospitalo. Nun la hospitalo lerte praktikas pli ol 10 specojn da teknikoj pri kirurgia ĝustigo por kuraci komplikajn anomaliojn de la meza kaj malsupra partoj de la vizaĝo. La frukto ricevis la unuaklasan premion de scienc-teknika progreso.

La ostologia sekcio de la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo sukcese esploris kombinan greftan operacion de libera histo por fari riparon al grandarea hista difekto de membroj kaj per tio akiris la unuaklasan premion de scienc-teknika progreso. Operacianta, oni interligas pli ol du liberajn histojn kun angiaj konektivoj per rimedo kongruigi angiojn, por ke ili formu kombinaĵon kun komuna angia konektivo, kaj transplantas ĝin sur vunditan lokon por fari riparon. La atingo metos bazon por ripari grave vunditajn membrojn.

Inter la premiitaj atingoj multaj estas elstaraj. Ekz., la esplorado pri tekniko de grandarea kultivado de eŭropaj ginsengoj farita de la Riĉfonto-ekspluata Instituto de Oficalaj Plantoj sub la Ĉina

Medicina Akademio donis kompletan da kultivaj teknikoj de eŭropaj ginsengoj aplikeblaj en Ĉinio.

En sia esplorado pri la patogena nitroza amino de ezofaga kancero, la Kancera Instituto sub la Ĉina Medicina Akademio unuafoje trovis, ke la kvanto de nitroza amino en stomaka suko rilatas rekte al la patologia ŝanĝiĝo de ezofaga epitelio kaj trovis ankaŭ, ke krom vitaminoj C kaj E, zinko povas malhelpi la formiĝon de nitroza amino en la korpo, kio prezentis serion da sciencaj atestoj por studi la patogenajn kaŭzojn de ezofaga kancero kaj ĝin preventi.

La Virusologia Instituto sub la Ĉina Profilaktika Akademio kaj la Popola Hospitalo de la Gŭangŝi-a Gŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono faris praktikan esploron de rino-faring-kancera antaŭobservo kaj trovis ĝian frutempan diagnozan rimedon.

La nombro de la aplikaj temoj de la 25 gravaj atingoj publikigitaj de la Ŝtata Ĉin-medicina Administra Buroo atingis 72%, interalie estis nova progreso de scienca esplorado pri akutaj kaj danĝeraj malsanoj kuracataj per ĉin-medicino, ekz., la klinika kaj praktika esplorado de "ŝenfuĉing" (ruĝa ginsengo, akonito kaj oranĝŝelo) por kuraci sinkopon kaŭzitan de eniĝo de patogena viruso.

Sinkopo, t.e., infekta ŝoko, estas unu el la danĝeraj malsanoj ofte vidataj en kliniko. La mortokvanto de la malsanuloj de sinkopo estas 40%-80%. Ŝugŭang-hospitalo sub la Ŝanhaja Ĉin-medicina Instituto kaj aliaj departementoj, konsultante antikvajn receptojn, preparis "ŝenfuĉing"-injektaĵon el la drogherboj ruĝa ginsengo, akonito, oranĝŝelo k.a. post esplorado de medikamenta formo. Per la injektaĵo oni kuracis 104 suferantojn de sinkopa malsano kaŭzita de eniĝo de patogena viruso, inter kiuj la efika proporcio atingis

84.6%. La provado montris, ke "ŝenfuĉing" havas kuracefikojn ordigi dilatiĝon kaj kuntiriĝon de angio, reguligi mikrocirkuladon, sango-koaguliĝon kaj metabolon, stabiligi ĉelan membranon kaj plifortigi miokardian kuntiriĝon. Kaj plie, kiel intravejna injektaĵo, "ŝenfuĉing" ŝanĝis la rutinan vojon preni ĉinan medikamenton. Se nur la sinkopo estas forigita, oni devas tuj ĉesigi la injekton kaj ne iom post iom redukti medikamentokvanton. La atingo ricevis A-gradan premion donitan de la Ŝtata Ĉin-medicina Administra Buroo.

La frakturo en kalkanea artikolo estas malsano ofte vidata, nun en kaj eksterlande ankoraŭ ne troviĝas kontentiga terapio kontraŭ ĝi. Iuj terapioj ne nur bezonas longan tempon, sed ankaŭ kaŭzas al la suferanto doloron dum irado, plilarĝigon kaj eksteren-turniĝon de kalkano, k.a. Gu Jun'u, Ĝang Tjeljang kaj aliaj fakuloj de Tjanĝin-hospitalo, la Tjanĝin-a Instituto pri Kuracado de Frakturo per Ĉin- kaj Eŭropmedicina

Kombinado aplikas en la fermita reduktio la teorion de ostogustigo en kombinado de movo kaj senmovo kaj apartigo antaŭ la kunigo de la tradicia medicino. Ili kombinas tiradon, horizontalan premadon, balancadon kaj turnadon de malsana piedo k.a., por ke la piedo de la suferanto senĉese moviĝu en la tuta procezo. La nova teorio prezentita de ili post 11-jara profunda esplorado altigis la proporciojn de la sukcesigita reduktio de 39% al 96%. Ili explore elfaris ankaŭ novtipan eksterfiksilon kaj ekipaĵon por ekzerci funkcion — kalkane-fiksajn botojn kaj elastan piedradon, kiuj komplete anstataŭis la tradician eksterfiksadon per gipso.

La kalkane-fiksaj botoj ludas fiksrolon per la kontinua kaj centripeta premo al la kalkanaj flankoj tra ambaŭflankaj premkusenoj. La forteco de la premo povas esti reguligata laŭ bezono kaj la movado de la pieda artikolo ne estas limigata. La suferanto povas

Suferantoj de makzela anomalia antaŭ kaj post operacio





# Kuracaj principoj de la tradicia ĉina medicino

de U BOPING\*

La tradicia ĉina medicino emfazas la diagnozon kaj kuracadon laŭ simptomoj. Tio signifas, ke por kuraci malsanon oni devas unue analizi, distingi kaj koni simptomojn kaj poste alpreni taŭgajn kuracmetodojn surbaze de la diagnozo. Simptomo estas ĝenerala manifestiĝo de patogena kaŭzo kaj reakcio de la korpo al malsano. Ĉe malsanuloj en malsamaj sanstatoj, aĝoj kaj medioj montriĝas malsamaj simptomoj de sama malsano kaj povas montriĝi ankaŭ samaj simptomoj de malsamaj malsanoj en ilia

evoluo. Tial oni devas alpreni malsamajn kuracmetodojn por sama malsano kun malsamaj simptomoj, sed oni povas alpreni saman kuracmetodon por malsamaj malsanoj kun samaj simptomoj. Tio estas la kuraca principo de la tradicia ĉina medicino "malsamaj kuracmetodoj por sama malsano kaj sama kuracmetodo por malsamaj malsanoj".

La kuraca principo de la ĉina tradicia medicino estas grava konsistiga parto de la baza teorio

de la tradicia ĉina medicino kaj servas kiel ponto inter la baza teorio kaj klinika praktiko. Ĝi ne nur intime rilatas kun diagnozo kaj kuracado laŭ simptomoj, sed ankaŭ havas sian propran leĝon. En longtempa praktiko la ĉin-medicinaj kuracistoj resumis kompletan da kuracmetodojn. Nun ni konigas al niaj legantoj kelkajn el ili.


## KURACADO KUN LA HOMA ORGANISMO KIEL TUTO

La ĉin-medicinaj kuracistoj ne kuracas sole malsanan korpapar-

ekzerci siajn artikojn per elasta piedrado en la komenco de la malsano. Tio povas resanigi la

vunditan artikon en movado kaj efike preventi piedarkan enkaviĝon kaj kalkanen eksteren-

Prof. Ĝang Ĝenkang (dekstre) kaj esplor-studento de la Stomatologia Instituto sub la Pekina Medicina Universitato studas operacian metodon.



turniĝon. Post la kuracado dum ĉ. 5 semajnoj la suferanto povas iri, apogante sin al lambastono. La tempo de la tuta kuracprocezo mallongiĝis 1/3—1/2 kompare kun la antaŭa. La klinika aplikado dum 8 jaroj montris, ke ankaŭ la frakturaj sekvaĵoj malmultiĝis de 62% ĝis 10%. La atingo estas senprecedenca progreso en la kuracado de kalkanea frakturo.

Krome, estas premiitaj ankaŭ 7 temoj pri akupunkturo, mokso kaj akupunktura anestezo, kiaj studo pri klinika leĝo kaj principo de artemizia mokso sur akupunktura punkto *jin* por ĝustigi fetan pozicion, esplorado de intelektaj modeloj de la akupunktura punkto *šu*, *ĝinglŭo*-oj kaj akupunkturaj punktoj sur la kapo kaj oreloj, esplorado de klinika leĝo de abdomena uterektomio per akupunktura anestezo, ktp. ■

ton, sed faras kuracadon laŭ la principo preni la homan organismon kiel tuton.

Laŭ ili, la homa korpo estas organismo kun visceroj interne kaj haŭto, haroj, muskoloj, okuloj, oreloj, buŝo kaj nazo ekstere. Ili estas interligitaj de *ĝinglŭo*-oj, kaj dank' al tio ili tenas normalajn fiziologiajn funkciojn. Se iu parto malsaniĝas, tio influas la tutan korpon. Tial, dum kuracado oni ne devas ignori la malsanan parton, sed, pli grave, doni atenton al la tuta korpo. Kiam iu suferas obstrukcan vaskulariton, la simptomo vidiĝas ĉe liaj piedoj. Liaj piedfingroj unue ricevas doloron kaj poste nekroziĝas, ulceriĝas kaj eĉ defalas. Se oni fortranĉas parte la nekrozitajn fingropintojn, la malsano plu graviĝas. Ĉin-medicinaj kuracistoj opinias, ke al la suferanto de obstrukca vaskularito mankas *jang*-energio, kaj lia sango-cirkulado estas ne glata kaj fine obstrukcita. Tial ĉin-medicina kuracisto donas al li medikamenton por varmigi lian *jang*-energion kaj vigligi lian sango-cirkuladon. Tio povas resanigi multajn pacientojn, kies membrojn oni decidis fortranĉi.

#### EN KURACADO PATOGENA KAŬZO TROVENDA

En kuracado oni devas trovi pere de simptomoj la patogenan kaŭzon kaj reakcion de la malsano en la homa korpo. Ĉe la ĉin-medicinaj kuracistoj estas la terminoj "fenomeno kaj esenco", kies signifoj estas variaj kaj kies nocioj relativaj. Ekz., la patogena kaŭzo estas esenco kaj la simptomo fenomeno; koncerne malsanan parton, la malsano interne de la korpo estas esenco kaj tiu ekstere estas fenomeno; kaj koncerne la tempon de malsaniĝo, la antaŭa aŭ malnova malsano estas esenco kaj la posta aŭ nova malsano estas fenomeno. Evidente, per la terminoj "fenomeno kaj esenco" ĉin-medicinaj

kuracistoj distingas en diagnozo la ĉefan kaj akcesoran partojn, gravecon kaj negravecon de la malsano, antaŭ ol ellabori principojn kaj metodojn de kuracado.

Ĝenerale, estas tri metodoj por kuraci la esencan kaj fenomenan malsanojn: (A) Oni unue kuracas la esencan malsanon kaj poste la fenomenan. Ekz., pluraj medikamentoj kontraŭ haŭtmalsano ne efikas sur iujn suferantojn de ekzemo. Post ekzameno oni trovis, ke la malsano estas kaŭzita plejofte de dispepsio. Tiam oni devas unue kuraci la esencan malsanon per lienstomak-saniga kaj malsekec-foriga medikamento, antaŭ kuracado de la ekstera ekzemo. Kaj la metodo bone efikas. (B) Se la malsano estas akuta, tiam oni devas unue kuraci la fenomenan. Se ĝi estas kronika, oni devas unue kuraci la esencan. Se la malsano abrupte graviĝas, oni devas unue preni la fenomenan kiel la ĉefan kaj trakti ĝin unue por ne prokrasti la malsanon kaj gardi la vivon de la malsanulo. Ekzemple, ŝoko okazas al suferanto de frakturo. La frakturo estas esenca malsano kaj la ŝoko estas fenomeno, tamen la lasta endanĝerigas la vivon. Oni devas antaŭ ĉio savi la malsanulon el la ŝoko kaj poste kuraci la frakturon. Kompreneble, la kuracmetodo estas uzata portempe. Kaj oni devas kuraci la esencan malsanon, post kiam la fenomena mildiĝas. Kiam la esenca kaj fenomena malsanoj estas samtempe gravaj, oni ne devas kuraci nur la esencan aŭ fenomenan, sed ambaŭ samtempe.

#### MALSAMAJ KURACMETODOJ POR SAMA MALSANO KAJ SAMA KURACMETODO POR MALSAMAJ MALSANOJ

Malsamaj kuracmetodoj estas aplikataj al sama malsano tiam, kiam sama malsano prezentas malsamajn simptomojn. Ekz., astmo iafoje prezentas simptomo-komplekson de eksceso, iafoje simptomo-

komplekson de nesufiĉeco, iafoje malvarman simptomon kaj iafoje varman. Nature, oni devas apliki malsamajn kuracajn metodojn. Eĉ por sama malsanulo oni devas apliki malsamajn kuracmetodojn pro la ŝanĝiĝo de lia sanstato kaj pro lia malsaniĝo en malsamaj sezonoj. En la lastaj jaroj tiu metodo bone efikis por kuraci hepatiton kaj koronarian kormalsanon.

Sama kuracmetodo estas aplikata al malsamaj malsanoj tiam, kiam malsamaj malsanoj prezentas samajn simptomojn. Iu veterana ĉin-medicina kuracisto kuracis tri malsanulojn. Iun el ili forte doloris la kapo kaj sendolorigilo ne efikis sur lin. Alia sendormis dekkelkajn tagojn kaj dormigilo estis senefika por li. La tria suferis astmon kaj ne ricevis efikon post preno de astmokvietigilo. Tamen ili havis samajn simptomojn, kiaj konstipo dum pluraj tagoj, saburo flava, dika kaj seka kaj varmo akumulita kaj stagnanta en la stomako kaj intesto. La kuracisto donis al ili saman laksigan medikamenton. Post preno de la medikamento ili facile fekis kaj ne plu suferas kapdoloron, sendormecon kaj astmon.

La supre menciitaj estas fundamentaj kuracmetodoj de la tradicia ĉina medicino, kiuj enkorpiĝas la tutecon kaj principecon de la ĉin-medicina diagnozo. Kaj krome ĉin-medicinaj kuracistoj havas ankaŭ multajn flekseblajn kuracmetodojn, kiuj ludas pozitivan rolon en klinika praktiko.

En la vivo povas okazi, ke kiam oni verŝas akvon el kruĉo kun kovrilo firme fermita, la akvo ne estas facile ellasebla. Se oni estas iomete malfermita la kovrilon, la akvo facile ellasiĝas. Ĉin-medicinaj kuracistoj estas lertaj apliki inspiron ricevitan en la vivo al la direktado de klinika praktiko. Edifitaj de la fenomeno, ĉin-medicinaj kuracistoj trovis

vojon por kuraci edemon.

Ĝenerale, ĉin-medicinaj kuracistoj uzas diurezigajn drog-herbojn por kuraci edemon. Sed tio ne bone efikas sur gravajn edemulojn. Se oni rigardas la korpon de edemo-suferanto kiel "kruĉon" kaj lian uretron kiel "kruĉo-buŝon", do liaj pulmoj estas kvazaŭ "kovrilo" de la supra parto de la korpo. Tiam ĉin-medicinaj kuracistoj donas preskribon por vigligi lian pulman funkcion kaj ŝvitigi lian tutan korpon por malfermi la "kovrilon". Dank' al tio, la suferanto povas facile urini kaj resaniĝi. La ĉin-medicinaj kuracistoj humure nomas tiun kuracmetodon "preni kruĉon por malfermi ĝian kovrilon".

Laŭ la vidpunkto de la moderna patologio kaj fiziologio, diurezigado celas pliigi la urinellasan kvanton de la urina sistemo kaj lakso apartenas al la afekcio de la dika intesto. Ili estas tute malsamaj. Tamen la ĉin-medicinaj kuracistoj ofte uzas diurezigan metodon por kuraci lakson. Ili opinias, ke lakso estas kaŭzita de pluraj faktoroj, tamen en kliniko lakso plejparte estas kaŭzita de troa patologia malsekeco en la korpo. Malsekeco estas fiziologia kaj patologia termino propra al la tradicia ĉina medicino. Ĝia normala fiziologia funkcio estas malsekigi ĉiujn organojn de la korpo, sed troa malsekeco kaŭzas diversajn mal-

sanojn. Se ĝi estas en muskolo kaj haŭto, do estiĝos edemo; se ĝi estas en la pulmoj, do estiĝos tuso; kaj se ĝi estas en la dika intesto, do estiĝos lakso. Se oni uzas diurezigan medikamenton por forigi la malsekecon en la dika intesto, la lakso estos ĉesigita.

Kaj krome, ĉin-medicinaj kuracistoj ofte aplikas iujn aliajn kuracmetodojn, ekz., por malsano en la supra korp parto oni kuracas la malsupran, kaj por malsano en la malsupra korp parto oni kuracas la supran; oni somere kuracas malsanon kaŭzitan en vintro kaj vintre kuracas malsanon kaŭzitan en somero.

Estas ekzemplo de kuracado de la malsupra korp parto por malsano en la supra korp parto. Astmo troviĝas en la traŭeo kaj pulmoj. Post atenta observado oni trovis, ke la malsano atakas aŭ graviĝas en la tempo, kiam la malsanulo sate manĝas aŭ suferas dispepsion aŭ konstipon. Ne bone efikas nura astmo-kvietigilo kontraŭ tia astmo. Ĉin-medicinaj kuracistoj aplikas tre efikan kuracmetodon faciligi fekadon.

Suferanto de rektumo-ptozo havas malsanon en la malsupra korp parto. Por kuraci ĝin, ĉin-medicinaj kuracistoj plejofte pikas per kuraca pinglo la akupunktur punkton *bajhuj* sur la verto por ricevi bonan efikon.

Iuj maljunaj suferantoj de traŭejo ofte en vintro sentas sin

malbone. Ĉin-medicinaj kuracistoj opinias, ke al la maljunuloj mankas vitala energio, precipe en vintro al ili serioze mankas vitala energio. Tio estas ilia patogena kaŭzo. Tiaokaze, ĉin-medicinaj kuracistoj donas al ili ofte en somero medikamenton tonikan por vitala energio, faras al ili artemizian mokson aŭ algluas al ilia korpo plastojn. Tio povas malgravigi ilian traŭeiton en vintro kaj eĉ resanigi ilin.

En somero iuj homoj suferas malaltan febron, malfortecon, soifon kaj maltrankvilon. Ĉin-medicinaj kuracistoj opinias, ke tio estas simptomo de malforta *jin*-energio. Por reguligi la ekvilibron de *jin*- kaj *jang*-energioj, preventi kaj kuraci febron somere, ĉin-medicinaj kuracistoj proponas, ke la suferantoj prenu vintre medikamenton tonikan por *jin*-energio.

Unuvorte, la kuracaj principoj kaj kuracmetodoj de la tradicia ĉina medicino estas rigoraj kaj flekseblaj, tamen ili ĉiuj observas ĝian bazan teorion. Tial la eminentaj ĉin-medicinaj kuracistoj devas havi multajn solidajn sciojn pri la baza teorio, flekseblan kaj vigan penson en klinika kuracado, nur tiaj kuracistoj povas apliki plej efikajn kuracmetodojn kaj akiri plej bonan kuracefikon. ■

\* La aŭtoro estas esploranto de la Ĉina Instituto de Tradicia Ĉina Medicino.

La aŭtoro



Veterana ĉin-medicina kuracisto diagnozas pacienton en apoteko.





# Argilaj modlaĵoj

de SUN KEJANG

La ĉina argila modlaĵo nomiĝas ankaŭ kolora modlaĵo. Ĝi estas tradicia popola metiartaĵo. Metiistoj enmiksas en argilon malmulte da kotonfibroj kaj knedas ĝin en diversajn homfigurojn. Post kiam la figuroj sekigas, oni ŝmiras ilin per farboj.

La ĉina argila modlarto aperis almenaŭ antaŭ 5 000 jaroj. En la ruino de Hongŝan-kulturo de Niŭheljang en Ĉaŭjang-regiono, Ljaŭning-provinco oni elterigis nemalmultajn delikate modlitajn pecojn de 5-6 argilaj homfiguroj. La plej malgranda el ili estas kiel vera homo kaj la plej granda estas duoble pli alta ol homo. Ili aspektas naturaj, fortaj kaj moviĝantaj. Inter ili troviĝas brilkolora diina kapo. La buŝo, nazo, okuloj kaj oreloj estas faritaj en bona proporcio kaj similaj al tiuj de mongoloj en norda Ĉinio. La antikvuloj de Hongŝan, ne katenate de naturaj fenomenoj kaj adorado al totemo, antaŭenpuŝis la argilan modlarton al la plej alta nivelo de la antaŭhistoria kulturo de norda Ĉinio.

En la sklava socio ĉinaj sklavposedantoj entombigis vivajn homojn kiel viktimojn. En la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) oni entombigis argilajn aŭ terakotajn homfigurojn en grandeco de 10-20 cm. anstataŭ vivajn homojn. La

Argilaj servistinoj en Ĝinci-templo, Ŝanŝji-provinco (Norda Song-dinastio)



terakotaj militistoj kaj ĉevaloj en grandeco de veraj homo kaj ĉevalo elterigitaj el la tombo de la Unua Imperiestro (246-209 a.K.) de Ĉin-dinastio impresas grandioze. Ili estas faritaj laŭ jena maniero. Oni unue modlas argilon en figurojn de homo kaj ĉevalo kaj poste bakas la modlaĵojn. La artaj trajtoj de ili karakteriziĝas per realismo, strikta tekniko, klaraj karakteroj kaj vivecaj mienoj. La argilaj modlaĵoj estas faritaj per teknikoj de modlado, knedado, algluado, skulptado kaj pentrado. Surbaze de rondreliefo modlistoj uzas ankaŭ reliefon kaj anaglifon. La hartubero, rimeneto, zonohoko, krurbendo, botolaĉo, selo k.a. ĉiuj estas subtile faritaj. Dank' al bela skulptado de la okuloj, brovoj, lipoj, lipharoj, vestoj kaj pozoj, oni faris sukcese la figurojn de generaloj kaj militistoj en malsamaj rangoj aspekte bravaj aplombaj, saĝaj kaj majestaj.

En la periodo de Ĉin- kaj Han-dinastioj (221 a.K.-220 p.K.) la argila modlarto rapide disvolviĝis. La terakotaj homfiguroj de la Okcidenta Han-dinastio plejparte estis faritaj per modeliloj. Ili estas prezentitaj lakone per konvena staturato, ĝusta proporcio kaj viveca pozo. Ĝiaj homfiguroj elspiras pli kaj pli densan vivetason ol tiuj de Ĉin-dinastio kaj superis ilin en kreado de pozoj. La artistoj faris ĉion eblan, por ke la figuroj spegulu belecon pli altan ol la vivo en estetiko. Nemalmultaj famaj figuroj de akrobatoj, dancistoj, artistoj k.a. montris, ke la argilfigura arto de Han-dinastio jam sufiĉe maturiĝis. Ni prenu kiel ekzemplon grupon da terakotaj figuroj de akrobatoj kaj muzikistoj elterigitaj el la tombo de la Okcidenta Han-dinastio en Ŝandong-provinco. Sur la rektangula soklo estas 21 homfiguroj: meze 7 artistoj prezentas dancon



Koloraj skulptaĵoj en Dunhūang, Gansu-provinco (Tang-dinastio)





Budhostatuo en la templo Hŭajan en la urbo Datong, Ŝanŝji-provinco (Ljaŭ-dinastio)



Argilaj arhatoj en la templo Ĉjongĝu en Kunming, Junnan-provinco (Ĉing-dinastio)





Argila rakontisto (Han-dinastio)



Argila pupo (Produktaĵo de la urbo Uŝji, Ĝjansu-provinco)



Festa ĝojo (Nuntempa modlaĵo de Ĝeng Juhe)



Figuroj en la klasika romano "Songŝo en Ruĝa Buduaro" modlitaj de Ĝang Ĝingjoŭ



kaj akrobataĵoj, en la malantaŭo ludas orkestro kaj ambaŭflanke 7 rigardantoj, ĉiu kun alta ĉapo kaj larĝa zono. Ili estas modlitaj lakone kolorigitaj brile sed ne troige, la sceno estas gaja kaj varma. La plej graciaj terakotaj figuroj de dancistinoj estas tiuj elterigitaj en Bajĝjakoŭ de Ŝĵi'an. Iliaj supraj staturoj, absorbitaj mienoj, ŝvebantaj manikoj kaj graciaj dancoj donas melodian estetikan senton. Terakota figuro de artisto kun memkontenta mieno elterigita ĉe Tjanhuj-monto en Ĉengdu, kun bastoneto en la dekstra mano malsupren frapanta tamburon, estas patose dancanta kun komika mieno.

En la ŝtonkavernaro de Dunhŭang en Gansu-provinco konserviĝas abundo da valoraj argilaĵoj en la periodo de la Orienta Ĝin-dinastio (317-420) ĝis Ĉing-dinastio (1616-1911). En la konservataj 492 kavernoj troviĝas almenaŭ 5000 koloraj argilaj statuoj, 2415 el ili estas sendifektaj.

La koloraj argilaj modlaĵoj de Dunhŭang estas faritaj surbaze de la lerta argila modlarto de Handinastio, asimilinte fortajn punktojn de la okcidenta kulturo. La argilaj modlaĵoj estas surmuraj, surekranaj, altreliefaj kaj rondreliefaj. Ili estas unuopaj aŭ multopaj. La statuo de budho estas en la centro, ambaŭflanke staras liaj disĉiploj, bodisatvoj, ĉielaj reĝoj kaj forteguloj. Unu grupo konsistas el 2-11 statuoj, la grandaj altas je 33 metroj kaj la malgrandaj je 10 cm. Malsamaj karakteroj de tiuj statuoj estas esprimitaj per troigaj koloroj. La koloroj diferenciĝas laŭ periodo kaj nacia trajto kaj harmonias kun tiuj de konstruaĵoj kaj freskoj. La argilaĵoj plene enkorpiĝas la nacian stilon de la ĉina argila modlarto en kombino de pentrado kaj skulptado.

Kun la socia prospero de Tang-dinastio (618-907) la kolora terakota modlarto multe disvol-

viĝis, aperis aro da artistoj lertaj en modlado kaj pentrado. Ili ofte laboris kolektive, kombinante pentradon kaj skulptadon, kaj perfektigis la ĉinan argilan modlarton.

En Song-dinastio (960-1279) argilfiguraj modlistoj estis nomataj metiistoj. Post kiam la kortego de Song-dinastio translokiĝis suden, nordanoj kunportis argilan modlarton al Hangĝoŭ, la ĉefurbo de la Suda Song-dinastio (1127-1279). En Hangĝoŭ estis Haj'er-strateto, kie oni speciale modlis kaj entreprenis argilajn figurojn, sekve la arto prosperis ankaŭ en la sudo.

En Ĉing-dinastio aperis granda nombro da famaj argilaj modlistoj, kiuj dividiĝis en skolojn sudan kaj nordan. La suda skolo estis kun Hujŝan-argilaĵoj de Uŝĵi, Ĝjangsu-provinco kiel sia reprezentanto kaj la norda kun verkoj de "Argilo-modlisto Ĝang" de Tjanĝin kiel sia reprezentanto.

Hujŝan-argilaĵoj, senĝenaj kaj liberalaj, simplaj kaj sanaj, elspiras densan lokan odoron de la regiono sude de Jangzi-rivero. La lokaj argilaj modlistoj, lerte knedinte rondreliefon kaj reliefon, faris figurojn troigaj en formo, belaj en figuro kaj mieno, brilkoloraj kaj belvestitaj. La argila figuro de "Bebo Afu" de Hujŝan grasa, kun kvietaj kaj eleganta mieno kaj la kapo konsistiganta preskaŭ duonon de la korpo, plej plaĉas al okuloj. La popolanoj rigardas ĝin kiel simbolon de "bonaŭguro kaj bondeziro" kaj "paco de la nacio kaj popolo".

Hujŝan-argilaĵoj plejparte estas homfiguroj en antikvaj vestoj kaj ludiloj, kiaj longvivuloj, feinoj, budhoj, generaloj, infanoj kaj bestoj. Kun ŝanĝiĝo de la epoko, krom la tradiciaj trajtoj, la artistoj senĉese kreis homfigurojn kun epokaj kaj naciecaj trajtoj.

La kolora modlarto de "Argilo-modlisto Ĝang" disvolviĝis en la

posta periodo de Ĉing-dinastio en Tjanĝin. En Ĝang-familio ekde Ĝang Ĉanglin (1826-1906) la arto estas heredita de generacio al generacio. La homfiguroj modlitaj de artistoj Ĝang-oj estas versimilaj en formo, elstaraj en karaktero kaj profunde elmontras sian internan senton kaj spiriton. La koloroj estas simplaj kaj elegantaj, la vestolinioj lakonaj kaj belaj. En stilo la argilaĵoj estas multe influitaj de pentrado kaj skulpturo de Tang-dinastio, precipe la figuroj de belulinoj en antikvaj vestoj. La nuna "Argilo-modlisto Ĝang" kaj liaj disĉiploj heredis la elstaran tradician arton de Ĝang Ĉanglin kaj asimilis la stilon de la ĉinaj popolaj ludiloj kaj la arton de realismo de la Okcidento. Dank' al tio la argilaĵoj de "Argilo-Modlisto Ĝang" havas pli da ĝeneraleco, intereso kaj ornameco kaj iliaj formoj estas originalaj, vivecaj kaj harmoniaj. ■

Kolora argila homo en Ŝuanglin-templo de Pingjaŭ, Ŝanŝji-provinco (Ming-dinastio)





## RIMARKINDA KRESKO DE ŜTALA PRODUKTOKVANTO DE ĈINIO

Ĉinio produktis 158 mil tunojn da ŝtalo en 1949. En januaro ĉijare ĝi produktis 4 939 mil tunojn da ŝtalo, meznombro 159 mil tunojn ĉiutage, kiuj jam superis la jaran produkto-kvanton de ŝtalo en la komenca periodo post la Liberiĝo de Ĉinio.

## URBETAJ ENTREPRENOJ DE ĈINIO EN RAPIDA DISVOLVIĜO

En la pasintaj 9 jaroj la industria produktovaloro de ĉinaj urbetoj kreskis meznombro je 28% ĉiujare, la totala produktovaloro de la ĉinaj urbetoj en 1987 jam atingis 450 miliardojn da jüanoj.

En la pasintaj pluraj jaroj la ĉinaj urbetoj entreprenoj jam akceptis 85 milionojn da superflua laboruloj el la kamparo kaj akumulis fiksan kapitalon de pli ol 170 miliardoj da jüanoj. Antaŭ la fino de la 20-a jc. sufiĉe granda parto de la 400 milionoj da laboruloj de la ĉina kamparo laboros en tiaj entreprenoj, kaj ankaŭ efektiviĝo de la agrikultura modernigo kaj altiĝo de la vivnivelo de la kamparanoj ĉefe dependos de la urbetoj entreprenoj.

Laŭ la ŝtataj planoj, antaŭ 2000 la ĉinaj urbetoj entreprenoj surposteniĝos pli ol 200 milionojn da kamparaj laboruloj kaj ilia produktovaloro atingos 1 500 miliardojn da jüanoj,

kiuj superos 70% de la tiama totala socia produktovaloro de la ĉina kamparo.

## KVAR SPECIALAJ EKONOMIAJ DISTRIKTOJ DE ĈINIO EN PROSPERO

En 1987 la kvar ĉinaj specialaj ekonomiaj distriktoj Ŝenĝen, Ĝuhaj, Ŝantoŭ kaj Ŝjamen, kaptante la favoran ŝancon de ŝanĝiĝo en la internacia merkato, rapidigis siajn paŝojn de ekonomia konstruado aleksterlanda, kombinante industrion kun komerco, kun industrio kiel la ĉefa parto. Dank' al tio, ilia industria kaj agrikultura produkto rapide disvolviĝis, kaj ilia ekonomia forto multe pliiĝis.

Laŭ nekompleta statistiko, la totala industria produktovaloro de la kvar specialaj ekonomiaj distriktoj en 1987 pliiĝis je pli ol 50%, kaj tiu de agrikulturo je 23%, kompare kun tiuj en 1986. Stimulate de la industria kaj agrikultura produktado, la ekonomia merkato estas tre vigla, kaj prosperas ankaŭ komercado, trafiko kaj transportado, konstruado, financo kaj turisma afero. La turisma enspezo en la kvar distriktoj kreskis je 32.5%, la totala sumo de eksportaĵoj duobligis kompare kun tiu en 1986. Tio fariĝis grava marko de la kvar distriktoj en la ekonomia konstruado aleksterlanda.

## LA EKSPORTAĴOJ DE ĈINIO KRESKIS EN 1987

En 1987 la totala sumo de importaj kaj eksportaj varoj de Ĉinio atingis 83.78 miliardojn da usonaj dolaroj, superis je 13.5% tiun en 1986. Interalie, la totala valoro de eksportaĵoj estis 39.92 miliardoj da usonaj dolaroj, superis je 29% tiun en 1986 kaj kreis novan rekordon en la historio. La konsisto de eksportaĵoj fariĝas pli racia.

## LOĜDOMOJ DE 690 MILIONOJ DA KVADRATAJ METROJ KONSTRUITAJ EN 5 JAROJ

En 1983-1987 la totala sumo de investaĵoj de Ĉinio por konstrui loĝdomojn en urboj atingis 120 miliardojn da jüanoj. La nove konstruitaj loĝdomoj havas areon de 690 milionoj da kvadrataj metroj, kaj la loĝareo por ĉiu loĝanto de urboj kaj urbetoj meznombro pliiĝis je ĉ. 3.8 kvadrataj metroj.

## 123 MILIARDOJ DA JÜANOJ DEPONITAJ DE LA ĈINAJ KAMPARANOJ

Kun stabila disvolviĝo de la ĉina kampara ekonomio, ĝenerale altiĝis la enspezo de kamparanoj. En 1987 la diversaj deponitaĵoj en la kamparaj kreditaj kooperativoj atingis 123.9 miliardojn da jüanoj, je 24.18 miliardoj da jüanoj pli multe ol tiu en 1986.


## ĈINIO HAVAS DIPLOMATIAN RILATON KUN 135 ŜTATOJ

La 3-an de februaro ĉijare Ĉinio oficiale starigis diplomatan rilaton kun Urugvajo. Ĝis nun Ĉinio entute starigis diplomatan rilaton kun 135 ŝtatoj.

## VERKO DE DENG ŜJAŬPING ELDONITA EN SOVETUNIO

La Sovetunia Ŝtata Komisiono pri Eldonado, Presado kaj Distribuado antaŭ nelonge eldonis kolekton de verkoj de ĉina gvidanto Deng Ŝjaŭping kun titolo "Pri Fundamentaj Problemoj de la Moderna Ĉinio". Ĝi enhavas 46 artikolojn publikigitajn de Deng Ŝjaŭping en la lastaj jaroj. Ili eksplikas la penson pri konstruado de socialismo kun la ĉinaj trajtoj kaj koncernas politikon, ekonomion, sciencan, teknikon, kulturon, edukadon kaj diplomation.

En la Hangĝoŭ-a Kardana Fabriko



## MULTIĜIS EKSTERLANDAJ TURISTOJ AL TIBETO

La turisma afero de la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio komenĉiĝis en 1980. En 1984 Tibeto akceptis 3 000 eksterlandajn turistojn, sed en 1987 la nombro atingis 30 711. Estonte Tibeto organizos turismajn aktivadojn pri arkeologio, tibetologio, religia esploro kaj aliaj, kaj donos oportunon al turistoj-erudiciuloj en ilia esplorado pri tibeta medicino, arkitekturo, altebenaĵaj malsanoj, bestoj kaj plantoj.

## D-RO GEORGE HATEM PREMIITA DE LA HINDA PREZIDANTO

D-ro George Hatem naskiĝis en Usono en 1910 kaj venis al Ĉinio en 1933. Li laboris por la sano de la ĉina popolo pli ol 50 jarojn. Li estas konsilisto de la Ĉina Higiena Ministerio kaj direktoro de la Ĉina Lepro-Preventa kaj -Kuraca Centro. Antaŭ nelonge la hinda prezidanto premiis lin en Nov-Delĥio per la premio "Internacia Gandhi" pro lia elstara kontribuo en preventado kaj kuracado de lepro.

## "HAN-LINGVA VILAĜO" EN USONO

En Minesoto de Usono oni starigis "han-lingvan vilaĝon". La pordoj de domoj en la vilaĝo surhavis lokajn nomojn en han-lingvo de Ĉinio, kiaj Pekino kaj Hangĝou. La loĝantoj vivas laŭ la kutimoj de ĉinoj: Ili manĝas ĉinajn manĝaĵojn per bastonetoj, portas diversajn ĉinajn vestojn, parolas kaj kantas en la ĉina lingvo. En someraj ferioj ĉiujare centoj da gejunuloj venas tien por partopreni dusemajnan lernadon de han-lingvo. Ĉiujare la vilaĝanoj celebras la Printempan Feston laŭ la ĉina tradicio.

## DEK PLEJ BONAJ SPORTISTOJ DE ĈINIO

Dek plej bonaj ĉinaj sportistoj por 1987 estis elektitaj. Ili estas famaj halterlevisto He Ĝuoĉjang, kiu gajnis la unuan lokon per 248 361 balotiloj, gimnasto Lou Jun, naĝistino Hŭang Ŝjaŭmin, vejĉiisto Nje Ŭejping, volanisto Jang Jang, ĵudistino Gaŭ Fengljan, tablotenisisto Ĝjang Ĝjaljang, volanistino Li Ling'uej, halterlevisto He Jingĉjang kaj piedpilkisto Liŭ Hajĝuang.

## ĈINAJ DANCISTOJ PREMIITAJ EN FRANCIJO

En la 7-a Klasikdanca (balet) Konkurso okazigita antaŭ nelonge en Francio, ĉina dancisto Tong Ŝuseng de knaba grupo (13-15-jaraj knaboj), dancisto U Ŭej de faka grupo kaj dancistaj paroj Ŝi Huj kaj Ĝang Li, Ĝuo Ĉjanping kaj Ĉju Zigjaŭ de duopa danco gajnis la unuan lokon respektive en sia grupo kaj estis premiitaj per ora medalo. Sekve, krom franca dancisto, kiu kune kun Tong Ŝuseng gajnis la unuan lokon de la knaba grupo, la ĉinaj dancistoj gajnis preskaŭ ĉiujn orajn medalojn.

## AKUPUNKTURO DE ĈINIO ANTAŭ 5 000 JAROJ

En la ruino de la primitiva socio ĉe Lingjanghe de Ĝjuŝjan-gubernio, Ŝandong-provinco estis elfositaj lasttempe 5 eĝaj ŝtonaj pingloj. Koncernaj fakuloj konstatis, ke ili estis restaĵo antaŭ 5 000 jaroj. Inter ili tri estas jadaj kaj la aliaj du ŝtonaj. Ili estis delikate faritaj, glataj kun akraj pintoj, iuj longas 10 cm. kaj aliaj 5 cm. Ilia eltrovo pruvis, ke ĉinoj uzis akupunkturon en kuracado jam antaŭ 5 000 jaroj.

## PATENTRAJTO GAJNITA DE 9-JARA KNABINO

9-jara lernantino U Ĉaŭ de la Unua Elementa Lernejo de Uning-urbeto, Dongjang-gubernio, Ĝeĝjang-provinco, inventis oportunan pleton de moskito-forpela incenso, kiu estas malgranda, delikata kaj fermebla. Ŝi gajnis patentrajton donitan de la Ĉina Patentoficejo. Ŝi estas la plej juna gajninto de patentrajto en la nuna Ĉinio.

## RARAJ HOMFIGURAJ MULTFLORAJ POLIGONOJ

Multflora poligono (*Polygonum multiflorum*) estas fama drogherbo. Antaŭ nelonge iu kamparano de Hunan-provinco elfosis paron da poligonoj tre similaj al homfiguroj. La poligonoj estas grandaj, pezaj kaj vertikale staraj. Ili havas ankaŭ "kapon", "membrojn", "sensorganojn", "mamojn" kaj "plandojn".

## TRAFIKAJ AKCIDENTOJ

La 17-an de januaro ĉijare en Hejlongĝjang-provinco, nordorienta


Ĉinio, okazis akcidento: Pasaĝertrajno koliziis kun vartrajno. 90 pasaĝeroj mortis de la akcidento kaj la fervoja trafiko lamis 20 horojn.

En la sekvanta tago pasaĝera aviadilo Il-18 de la Sudokcidenta Civila Aviada Kompanio de Ĉinio fluganta de Pekino al Ĉongĉing, falis nemalproksime de Bajŝiji-flughaveno de la urbo Ĉongĉing. Mortis 98 pasaĝeroj (inkluzive 4 eksterlandanojn) kaj 10 aviadilaj laborantoj.

La 24-an de januaro renversiĝis survoje la ekspresa trajno n-ro 80 de Kunming al Ŝanhajo, 90 pasaĝeroj mortis kaj 66 grave vundiĝis.

La Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio diskutis pri la supre menciitaj trafikaj akcidentoj kaj decidis akcepti la eksigo-peton de Ding Ĝuangen, ministro de la Fervoja Ministerio de Ĉinio, kaj registri grandan kulpon de Hu Jiĝou, direktoro de la Civila Aviada Administracio de Ĉinio.

Multfloraj poligonoj aspektas kiel geviroj.



# La lanterna butikoj de Ŝen

(Novelo)

En la Lanterna Festo\* preskaŭ ĉiuj familioj de la urbo pendigis antaŭ sia domo unu aŭ du lanternojn, kio pliiĝis la festan gajecon. Ĉe la vesperkrepusko ĉiuj stratoj imponiĝis per fluantaj lumoj kaj variantaj ombroj, kaj la konataj konstruaĵoj tute ŝanĝis sian aspekton elvolvante miraklajn vidaĵojn. La lanterno-rigardantoj bonorde vestitaj navetis en la lumoj kaj ombroj juĝante pri la lanternoj aŭ solvante la enigmojn sur la lanternoj. La lanternoj en diversaj koloroj kaj diversaj formoj de floroj, birdoj kaj bestoj, la palacaj lanternoj, la turniĝantaj lanternoj... Kaj pli admirindaj estis lanternoj en formoj de homfiguroj kaj pavilono, kiuj vekis jen kaj jen aklamojn.

Du tagojn antaŭ la festo oni komencis elpendigi lanternojn kaj demetis ilin tri tagojn post la festo. Certe la festa nokto estis tajdo de la lanternfesta aktivado.

Kaj la butikoj ekvendis lanternojn jam en la dua tago de la unua monato laŭ la luna kalendaro. Ilia debito daŭris ĝis la 18-a de la monato.

Kiom da lanternaj butikoj funkciis en la urbo, oni ne nombris. Tamen estis klare, ke la plej fama lanterna butikoj estis tiu de la familio Ŝen.

Tiu estis multjara butikoj fondita de la prapatroj dek generaciojn pli fruaj de la familio. Ĝi rekomencis sian negocon nur kelkajn jarojn antaŭe. Krom lanternoj la butikoj negocis ankaŭ pri kajtoj kaj similaj artaĵoj. La mastro de la butikoj estis 80-jara

Ŝen Gūangĵan kun hararo arĝenta, vizaĝo ŝrumpa, kaj okuloj preskaŭ blinde miopaj. Li ĉiam havis ĉe si lupeon en granda de manplato. Li uzis ĝin en bezono, sed tre malofte. Li jam transdonis la administradon de la butikoj al sia solfilo Ŝjaŭĝing. Ĉe la patro li lernis fari lanternojn dek jarojn kaj povas fari ĉiajn lanternojn. Ŝen Gūangĵan patriĝis en la aĝo de pli ol 40 jaroj kaj lia edzino mortis nelonge post la nasko. Li sola flegis la infanon spertante diversajn malfacilojn. Nun la filo aĝas 35 jarojn kaj la bofilino Ĵuŝĵang helpas la edzon en la administrado de la butikoj. La nepo jam havas ses jarojn kaj la familio vivas en mielo. Al ili ne mankas mono.

La lanternoj de la butikoj de Ŝen plaĉas per la delikateco kaj modera prezo. Kaj ĉetera la butikoj vendas iajn lanternojn kiujn la aliaj butikoj ne povas fari. Ekzemple la gracia vosto de ĝia orfiŝa lanterno povas moviĝi en venteto, kvazaŭ en akvo, ĉar inter la vosto kaj korpo de la fiŝo estas artikoj. La turniĝa lanterno de la butikoj estas subtenata de traborita bambustango. Sur la pinto de la stango estas papera helico, ĉirkaŭ la stango estas paperaj homoj fiksitaj per maldikaj dratoj, kaj sub ĝi brulas kvar kandeloj, kaj la papera helico turniĝadas movate de varma aero. Aliaj butikoj imite faris tiajn lanternojn, sed ili estis malpli bonaj ol tiuj de la butikoj de Ŝen. Tia lanterno estas reprezentaĵo de la butikoj de Ŝen.

La marko por la aŭtentikeco de la famo de la butikoj estas la perla

pagoda lanterno. Tiu lanterno havas framon el maldikaj palisandraj latoj kaj fajnaj gazoj. La trifuta pagodo konsistas el 9 etaĝoj ĉiu kun supren direktita alero delikate ĉizita. En ĉiu etaĝo brulas kvar kandeloj kaj en la suba etaĝo dika kandelo. La varma aero supren leviĝanta turnis la etaĝon. La lanterno ne estis heredita de praaj generacioj, kaj herediĝis nur la elstara tekniko de farado de la lanterno. Kiam la mastro maljuniĝis, li kunvokis siajn posteulojn kaj detale demonstradis al ili la teknikon de lanterna farado, ĝis ili bone memoris la teknikon, tiam li detruis la lanternon kaj liaj posteuloj elfaris la novan. La perla pagoda lanterno estas kara emblemo por la familio kaj neniam vendiĝas. Ekde la dua tago de la unua monato laŭ luna kalendaro ĝi estas pendigita en la plej okulfrapa loko por allogi klientojn.

La nunan perlan pagodan lanternon Ŝen Gūangĵan heredis de sia patro. Post la fino de la kultura revolucio, kiam li refoje malfermis sian butikoj, li jam estis tre maljuna kaj mallertiĝis la manoj, kaj ĉetera la okuloj terure malboniĝis, ke li ne povis instrui al la filo fari la delikatajn artikojn kaj ĉizi diversajn desegnaĵojn kaj homajn figurojn. Li iafoje rakontis al la filo, sed tio estis nur parolo, ne farado, kaj li profunde bedaŭris pro tio. Li jam ne povis elfari novan lanternon por anstataŭigi la malnovan, kaj la malnova fariĝis multe pli valora.

La butikoj de Ŝen situas en la meza strato Pingĝeng. La domo



havas du etaĝojn. La fronta parto de la tera etaĝo estas vendejo, kaj la posta parto dividiĝis en tri partojn: La unua servas kiel salono, kaj meze en la posta muro estas niĉo, kie staras porcelana idolo, dio de riĉeco. Malgraŭ deadmono de la filo kaj bofilino, ĉiutage li preĝis antaŭ la idolo. Sub la niĉo estas altaro, kie estas televidilo anstataŭ incensujo, ĉar la filo kaj bofilino malkonsilis, ke la fumo de incenso damaĝos la televidilon. La dua parto estas dormejo de Ŝen Gŭangĵan, kaj la tria parto estas kuirejo kaj konservejo. La supra etaĝo estas dormoĉambro de la juna paro kaj ilia lanterno-farejo. La perla pagoda lanterno ja pendas en ilia dormoĉambro, volvita en tolo. Ili elpendigis ĝin en la 2-a tago de la unua monato laŭ luna kalendaro, kaj demetis ĝin en la 18-a tago de la unua monato. En la lastaj du jaroj Ŝen Gŭangĵan neniam iris supren, ĉar li ne povis fari lanternojn kaj ne zorgis pri la dommastrumado, kaj cetere li seniliĝis je la membroj kaj la vidado kaj timis ĝeni sian filon per sia okaza falvundiĝo. Ĉiuvespere, post fermo de la butikoj, li televidis kaj enlitiĝis kune kun la nepo. Kiam la nepo estis trijara, Ŝen Gŭangĵan persiste prenis sur sin la flegadon de la infano, kaj li rigardis granda plezuro kaj amuziĝo babiladon kun la nepo antaŭ enlitiĝo. Kelkfoje li aŭdis brueton el la supra etaĝo, kaj li pensis, ke la filo kaj bofilino estas okupitaj de io. Pensante, ke li jam ne povis fari lanternon por heredigi al la posteuloj, li vespiris kaj sendormis dum longa tempo.

Lia plej multe ripetata atentigo al Ŝjaŭĝing kaj Ĵujŝjang estas: "Bone gardu la perlan pagodan lanternon, ĝi estas la trezoro de nia familio!"

Ŝjaŭĝing diris kapjesante: "Paĉjo, mi bone scias tion." "Bone. Mi vivos nelonge, dum vi longe. Memoru, ke la najbaroj respektas nin ĝuste pro la lanterno!"

Kaj tion dirante Ŝen Gŭangĵan ofte havas larmojn en la okuloj. Kvankam la vidado de Ŝen Gŭangĵan malboniĝis, sed la aliaj organoj de la korpo funkcias bone, kio permesas al li manĝi, distri kaj promeni. Cetere, la filo kaj bofilino tre zorgas pri li kaj li ĉiam estas bonhumora. Tage, kun poŝmono li ripozas en tetrinkejo, rigardas pekin-operon aŭ aŭskultas *pingtan*-on, ĝue pasigante la tempon.

Liaj amikoj envie diris: "Mastro Ŝen, vi estas favorata de bona sorto."

Kaj li respondis kun rideto: "Tion mi dankas al nia bona socio."

Via butikoj multe riĉiĝos."

"Ni ĉiuj riĉiĝu!"

...

Refoje estis la dua tago de la unua monato laŭ luna kalendaro.

La butikoj de Ŝen jam estis kolore iluminita. Ambaŭflanke de la pordo oni surgluis ruĝpaperan versparon skribitan de Ŝjaŭĝing: "La familio en prospero; la tuta mondo en brilhelo". Sub la transversa bambua framo pendis lanternoj en diversaj grandoj kaj formoj, kaj inter ili la plej multaj estis orfiŝaj kaj turniĝantaj lanternoj. La aliaj estis lotusaj kaj hortensiaj lanternoj.

Kvankam estis hela tago, sed la butikoj estis iluminita per multaj koloraj lampetoj intermite brilantaj. La perla pagoda lanterno pendis meze en la butikoj, kvankam malnova, tamen gustoplena.

Ŝen Gŭangĵan rigardis foje-refoje, sed fakte li nenion rigardis, ĉar li ne povis vidi klare, cetere li ne volis rigardi tra lupeo, kaj fine li nur kapjesis: "Bone, bone."

Ŝjaŭĝing diris: "Paĉjo, ni zorgu la butikojn, kaj vi iru promeni. Avo Caŭ la Tria ĵus venis por inviti vin apreci pekin-operon."

"Mi timas, ke via negoco estos

tro intensa."

"Vi estu trankvila."

Ŝen Gŭangĵan eklevis la kapon, malpeze tuis, kaj iris al la teatro. Fakte li nur aŭskultis la operon, ĉar li nenion povis vidi klare, eĉ se li havis lokon en la unua vico. Sed li tre ŝatas operon, kaj bone komprenas. Oni diris, ke dum la juneco li estis amatoro de pekin-opero kaj preskaŭ fariĝis aktoro.

Vigleco regis antaŭ la butikoj de Ŝen.

Homamasoj fluadis al la butikoj. Iuj venis por aĉeti, kaj aliaj simple por rigardi. La vakaj lokoj sur la bambua framo estis tuj plenigitaj per pliaj varoj. Ŝjaŭĝing jam ŝvitegis pro la prospera vendo.

"La lanternoj de Ŝen ja meritas la famon!"

"Trafe, ĉu vi ne vidas la pendantan perlan pagodan lanternon?"

En admiro kaj laŭdo multaj lanternoj de la butikoj fluis en la straton.

Ŝjaŭĝing subite diris al Ĵujŝjang:

"Alvenas du fremdlandanoj."

Vere alvenis du fremdlandanoj, sinjoro kaj sinjorino, ambaŭ en la aĝo de ĉ. 50 jaroj; kun blonda hararo, elstara nazo, bluaj okuloj. La sinjoro vestis sin per eŭropa kostumo kaj la sinjorino en drapa jupo kaj longaj botoj.

"Fremdlandaj virinoj ne timas froston, ke ili vestas sin per jupo eĉ en vintro," mallaŭte diris Ĵujŝjang.

"Vi provincanino," Ŝjaŭĝing softe silentigis ŝin, ŝajnigante sin multe spertinta.

La du fremdlandanoj venis en la butikojn, kaj la sinjoro salutis Ŝjaŭĝing kaj Ĵujŝjang levante la kunigitajn manojn antaŭ la brusto. Li diris en rigida ĉina lingvo: "Mi deziras al vi riĉiĝon."

Kaj Ŝjaŭĝing resalutis levante la kunigitajn manojn: "Vi estas bonvenaj al Ĉinio. Feliĉon al vi en la nova jaro."

“Dankon, dankon.”

“Ni volas aĉeti lanternon.”

“Bonvolu elekti.”

La du fremduloj en granda intereso rigardis tien kaj ĉi tien kaj senĉese faris laŭdon.

Subite la sinjorino demandis montrante per la fingro: “Ĉu tiu lanterno povas esti vendata?”

Ŝjaŭging surpriziĝis: Ŝi montris la perlan pagodan lanternon.

Ŝjaŭging ĝentile ridetis kaj diris: “Ĝi estas heredaĵo, kaj la prezo estas tre alta.”

Ankaŭ la sinjoro fiksitis rigardon sur la lanternon kaj diris: Alteco de la prezo ne gravas, mi deziras havi ĝin.”

Ŝjaŭging diris: “Se vi volas ĝin, bonvolu pagi 3 000 jŭanojn!”

“Tiun sumon mi pagos. Sed ni petas vin montri al ni, kio eksterordinara de la lanterno postulas tiun sumon.”

En kaj ekster la butikoj amasiĝis multaj homoj, ĉiuj volis vidi la mirindecon de la lanterno.

Ŝjaŭging staris sur la vendotablo, bruligis la kandeletojn en la pagodo. Jen ekbrilis la tuta pagodo, kaj ĉiu etaĝo ekturniĝis en malsama rapido. Aklamis la ĉeestantoj. Ankaŭ la du fremdlandanoj ekscitiĝis kiel infanoj.

Ili metis dikan stakon da bankbiletoj sur la vendotablon.

Ŝjaŭging elprenis bambuan stangon kaj ligis sur ĝi la lanternon. La du fremdlandanoj ĝoje foriris ŝultre portante la lanternon. Kontraŭ 3 000 jŭanoj vendiĝis la trezoro de la butikoj! Degenerinto de la familio! Spektante la miraklan vendon de la lanterno, oni ekbedaŭris por la butikoj de Ŝen kaj poste indigniĝis. Sen la perla pagoda lanterno, kiel la butikoj povos ĝui plu la famon?

Tagmeze hejmveneris Ŝen Ĝuangjan en ŝanceliĝa paŝo. Forlasante la teatron en ekstazo

pro la bona teatraĵo, li estis informita pri vendiĝo de la lanterno. Kiel tondro en serena tago, li tute perdis la intereson. Avo Caŭ la Tria malŝate ĵetis al li rigardon kaj diris frapante la teron per la bastono: “Filo sen eduko estas azeno.”

Apogate de bonkoraj konatoj, li revenis al la butikoj. Apenaŭ li eniris en la butikon, li skoldis la filon: “Vi bruto, vi vendis la perlan pagodan lanternon?”

Ŝjaŭging respondis trankvile: “Jes, kontraŭ 3 000 jŭanoj, bona prezo!”

“3 000? Eĉ kontraŭ 30 000 mi ne vendus! Kaj cetere vi vendis ĝin al fremdlandanoj. Vi bankrotigos mian butikon.”

Ŝjaŭging konsolis: “Paĉjo, ne maltrankviliĝu...”

“Ne maltrankviliĝu? Kiel mi povos toleri? Vi ne estas mia filo, ne!”

Skoldante li iris en sian dormoĉambron kaj kovris sin per litkovrilo. Fatalo, fatalo! Kiu fidos poste la butikon? Ho, vi dupa bruto!

Efektive malvigliĝis la negoco en la butikoj de Ŝen. La butikoj jam ne havis la perlan pagodan lanternon, do la lanternoj de la aliaj butikoj povas esti kompareblaj kun tiuj de la butikoj de Ŝen.

Sed Ŝjaŭging tute ne estis maltrankvila pri tio. Li frue komencis la servon kaj finis malfrue, kun Ŝjaŭging sidis tuttage



en la butiko. Li volis pli profunde koni kiel la homoj atentis ne pri lia tekniko, sed pri la ekzisto de la perla pagoda lanterno. La lanterno estis nur heredaĵo, kaj ne markis ilian nivelon de la tekniko en lanternofarado.

Avo Caŭ la Tria gravmiene venis kun bastono al la butiko. Li iom levis la kapon, tute ne rigardis al Ŝjaŭging kaj Ĵuŝjang, kolere insultis direktante la bastonon supren: "Kie la perla pagoda lanterno? Vendiĝis! Al fremdlandanoj vi vendis! Fiulo, hejmodetruanto! Vi forvendis la prapatron! Ve, plago trafis la familion." Li kraĉis sur la teron, malestime frapis la vendotablon per la bastono kaj foriris en kolero.

Kaj Ŝjaŭging apatie respondis al li: "Atentu la vojon."

De la 3-a ĝis la 12-a de la unua monato neniu lanterno de la butiko estis vendita.

Ĉiunokte Ŝen Gŭangĵan malvigle sidigis kune kun la nepo en litkovrilo kaj ekscitiĝe parolis ion al la nepo, sed la nepo ne komprenis lin.

"Ni jam ne havas lanternon... Jes, neniun lanternon ni havas."

"Aveto, ni havas multajn lanternojn, jen la tuta ĉambro estas plena de lanternoj orfiŝaj, turniĝantaj, lotusaj."

"Neniu venas aĉeti lanternon, neniu alvenas."

"Mi lernos fari lanternojn estonte."

"Por kio tio taŭgos?"

Ŝen Gŭangĵan sentis sian parolon iom ŝoka kaj premis la nepon al sia sino kaj eklarmis.

Matene de la 13-a, Ĵuŝjang sola malfermis la pordon de la butiko. Ĉi-nokte la tuta urbo estis iluminota de lanternoj.

Ŝen Gŭangĵan demandis al Ĵuŝjang: "Kien forperdiĝis la bruto?"



"Noktomeze li foriris por reaĉeti la lanternon."

Li ne rimarkos la foriron de la filo, ĉar nokte li profunde dormis pro laciĝo. Li demandis en surpriziĝo kaj ĝojo: "Ĉu li sukcesos?"

"Certe!" respondis Ĵuŝjang en plena konfido.

"Ĉu vere?"

"Mi ne mensogas. Eĉ petardojn mi jam pretigis."

"Bone, bone, ke li konsciis la eraron."

Ŝen Gŭangĵan nenien volis iri, sidigis en la butikon kun la nepo sur siaj genuoj por atendi bonan informon.

Ĉirkaŭ tagmezo, ekbruis la eksplodantaj petardoj ĉe ekstremo de la strato: Fronte iris Ŝjaŭging,

kaj lin sekvis du junuloj portante lanternon ŝultre per bambua stango.

Ĵuŝjang haste eksplodigis la petardojn.

Ŝen Gŭangĵan tuj demetis la nepon, stumble eliris el la butikon kaj sin ĵetis al la lanterno, elpoŝigis la lupeon, detale pririgardis la lanternon, kaj fine venis al la konkludo: Ĝi ja estas la originala lanterno!

"Ĝi revenis, ĝi revenis!,"

Ŝen Gŭangĵan murmure movetis la sekajn lipojn kaj respektoplene riverencis al la lanterno.

La perla pagoda lanterno denove pendis en la butikon de Ŝen.

Granda amaso da homoj svarmis en la butikon por aĉeti lanternojn.



“Mi aĉetas orfiŝan lanternon!”

“Donu al mi la turniĝantan!”

Ĉe la vespera krepusko la butikisto de Ŝen elvendis ĉiujn lanternojn.

La familio havis gajan vespermanĝon. Ŝen Gŭangĵan trifoje tostis al la filo per la vino kiun li rezervis tri jarojn. Tute sereniĝis lia vizaĝo.

Post la vespermanĝo la perla lanterno estis lumigita kaj pendigita sub la ŝildo de la butikisto. Ŝen Gŭangĵan vestis sin per novaj vestoj, venis sub la lanternon kaj rigardis ĝin. Nebula kaj mistera lumo tremis sur lia vizaĝo kaj korpo, kaj li nereteneble vokis laŭte: “Ŝjaŭĝing, Ĵujŝjang, rigardu, kiel bona lanterno.”

Multaj rigardantoj admiris la longan historion kaj delikatecon de la lanterno. Ŝen Gŭangĵan dronis en granda plezuro.

Ĉiuj lanternoj sur la strato estis lumigitaj, kaj la perla pagoda lanterno estis la plej brila!

En la 18-a de la monato oni deprenis la lanternojn.

Kiel kutime, la butikisto de Ŝen estis fermita en la 19-a, 20-a kaj 21-a. Post tutjara pena laboro, nun estis la vico de ripozo.

Fruan matenon de la 19-a, kunportante la infanon, Ŝjaŭĝing kaj Ĵujŝjang iris viziti amikojn.

Ŝen Gŭangĵan ĝoje aprobis: “Iru, vi iru, havu plezuran gastadon. Vi ja multe penis dum la pasinta jaro.”

Kiam ili foriris, Ŝen Gŭangĵan tuj riglis la pordon kaj venis en la dormoĉambron de Ŝjaŭĝing. La lanterno staris sur la tablo. Li elpoŝigis la lupeon kaj detale pririgardis la lanternon. Li bone memoras, ke sur la alero de la naŭa etaĝo estas ideogramoj malgrandaj kiel kudrilpinto “Trezora heredaĵo de la lanterna butikisto de Ŝen”, kiujn lia patro gravuris je lia ĉeesto. Li laŭeble proksimigis la okulojn al la lupeo,

kaj kiel eble plej proksime movis la lupeon al la aleroj de la lanterno por serĉi la gravuritajn ideogramojn. Sed li ne trovis. Li atente pririgardis la gazon de la lanterno kaj trovis, ke ĝi estas nova, kaj aspektis kiel malnova pro fumiĝado. Li estis surprizita: Ĝi estis nove farita, farita de Ŝjaŭĝing kaj Ĵujŝjang. Jen klariĝis, ke dum la lastaj du jaroj Ŝjaŭĝing ofte detale demandis al li pri farado de la lanterno, kaj brueto en ilia ĉambro daŭris ofte ĝis noktomezo. Nokte de la 12-a de la unua monato Ŝjaŭĝing ŝajne iris reaĉeti la lanternon, sed fakte li elportis la nove faritan lanternon kaj reportis ĝin. Kia ruzaĵo!

Sed tio ĝojigis Ŝen Gŭangĵan.

Li deĉifris la sekreton, sed li ne volis malkaŝi ĝin kaj pridemandi al la filo kaj bofilino.

La butikisto de Ŝen por ĉiam

havas la perlan pagodan lanternon.

La publiko jam alte taksas tiun arton.

Li devis iel sin amuzi.

Li aŭdis, ke posttagmeze la teatro prezentos bonan pekinoperon. Hieraŭ Avo Caŭ la Tria jam invitis lin al la teatro, laŭdante, ke li “bone edukis la filon”. Ha, interesa mondo.

Li bedaŭris pro sia malboniĝinta vidado; alie, li certe gravurus sur la lanterno de la filo “trezora heredaĵo de la lanterna butikisto de Ŝen”. ■

Esperantigis ŬANG GENCAJ

\* *La Lanterna Festo estas la 15-a tago de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Nokte de tiu tago ĉinoj paradas per diversaj lanternoj. La moro komenciĝis de Tang-dinastio (618-907).*



# Granda realisma poeto

## Baj Ĝjuji

de MEJ ĜI

Baj Ĝjuji (772-846) estis alia fama realisma poeto de Ĉinio post Du Fu. Kvankam lia sukceso en poezio estis malpli granda ol tiu de Du Fu, tamen li havis pli klaran poezian teorion ol Du Fu. Sub lia iniciato leviĝis reformo en poezio, t. e. la movado de nova *Jūefu* kun granda influo en la antikva literatura historio de Ĉinio.

*Jūefu* aperis unue en Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.). Ĝi estas en formo de poezio kantebla. Ĝia elita parto en Han-dinastio estis popolkantoj fidele spegulantaj la popolan mizeron. En ĉiuj dinastioj poetoj lernis en sia verkado la fundamentan spiriton de *Jūefu* por speguli la realon. Tiel formiĝis la realisma *Jūefu*-a tradicio. En la meza epoko de Tang-dinastio nombro da poetoj kun Baj Ĝjuji kiel la ĉefo, fronte al la ĉiam pli putriĝanta socia realo, proponis speguli la popolan mizeron kaj ironii kontraŭ la aktualajo, aplikante la novan poezian stilon de *Jūefu*. Baj Ĝjuji prezentis sian klaran opinion “verki artikolon por speguli aktualajon kaj poemon por speguli okazon”. Li emfazis, ke la poemoj devas speguli la mizeron de la popolo kaj kritiki la damaĝojn de aktualaj politikoj. Liaj proponoj estis rigardataj kiel la celo de la movado de nova *Jūefu*.

Baj Ĝjuji verkis grandan nombron da satiroj laŭ sia poezia teorio. Li kreskis en milita ĥaoso, tial li povis kontakti ordinarajn laborulojn kaj montri simpatian al la popola mizero. Post sia oficistiĝo li havis la ŝancon vidi la putriĝon de la kortego kaj hontindajn kondutojn de la ŝtataj oficistoj. Ĉio ĉi certgrade influis lian poezian verkadon. Jam en siaj junaj jaroj Baj Ĝjuji aspiris savi la popolon, tial post kiam li fariĝis admonisto-kortegano de la imperiestro, li plurfoje proponis al li nuligi la



damaĝajn politikojn kaj verkis pli ol 170 satirojn. Ili vaste spegulas la socian realon, malkaŝas kaj kritikis diversajn aktualajn damaĝojn, interalie, iuj el ili estis kontraŭ la senbrida impostado de la kortego kaj kontraŭ la militemo, aliaj kontraŭ la luksa kaj diboĉa vivo de aristokratoj kaj ankoraŭ aliaj pri plendoj por virinoj. Tiuj poemoj akrastilaj kaj kun klara temo, ĉiu pri aparta afero, bone ekzemplas la poezian teorion. Liaj "Dek Kantoj pri Meza Cin" kaj "50 Novaj Ĵūefu-poemoj" enhavas multajn eminentajn satirojn.

Multaj el la satiroj priskribas la vivon de kamparanoj. Ili spegulas la mizeron de la kamparanoj kaj montras al ili grandan simpation. En la poemo "Rigardo al la Tritika Rikolto" li priskribis diligentajn kamparanojn:

*"Iliajn dorsojn rostas fajra suno  
Kaj la piedojn bakas spiro tera."*

kaj alian malriĉan vilaĝaninon, kiu devis kolekti tritikajn spikojn por ŝtopi la stomakon, ĉar ŝia

*"Havaĵo konsumiĝis de impostoj".*

La poemo "Kolektanto de Remanioj (*Rehmannia glutinosa*)" spegulas pli malbonan vivon de la kamparanoj ol tiu de la brutoj. Ili ne havis manĝaĵon, sed la ĉevaloj de bienuloj havis superfluan furaĝon. La poeto laŭte kriis:

*"Per ĝi mi akiros ĉeval-manĝon,  
Por satigi al mi la stomakon!"*

En la poemo "Maljunulo de Duling", la poeto senkompate vipis la regantan klason, kiu ekspluatis kaj subpremis la popolon, komparante la senbride impostantajn oficistojn kun ŝakaloj:

*"Forrabas de mia korpo vestojn,  
Forprenas panon el mia buŝo,  
Koruptaj oficistoj ja egalas rabobestojn,  
Eĉ sen dentegoj jam al homkarno tuŝo!"*

En la feŭda socio de Ĉinio la sorto de virinoj estis tragika. Baj Ĝjuji havis profundan simpation al ili kaj verkis multajn poemojn pri ili, precipe pri la palacaj knabinoj, kies juneco kaj feliĉo estis arbitre forigitaj. Lia ĉefverko "Blankharulino en la Palaco Ŝangjang" vivece priskribas la virinojn perforte kaptitajn en la palacon, iliajn tragikan sorton, solecan vivon kaj morton en la malpermesita palaco. Ili en sia juneco estis senditaj en la palacon, iuj estis pelitaj en forgesitan lokon antaŭ ol vidi la imperiestron kaj vivis solece dum la vivo. Kelkaj versoj de la poemo legiĝas jene:

*"En vaka ĉambro, longas nokt' aŭtuna,  
Tagiĝo ne vidiĝas en sendorma nokto.  
Frapadas la fenestrojn pluv' subtila,  
La brila lampo lasas ombron sur la muron."*

*Printempa tago ŝajnas jam longa,  
Side atendas oldulin' vesperon en malpacienco.  
Kantad' de orioletoj iĝas enuiga,  
Kaj ŝi ne plu jaluzas pri hirundaj paroj.  
Silentas ĉio post forflug' ilia,  
L' alterno de printempo kaj aŭtun' forlasas l'  
memoron.*

*Mi povas nur rigardi l' lunon helan,  
Aperis ĝi telere jam kvar-kvincent fojojn."*

La poemo harmonie kunfandas rakonton, lirikismon kaj pejzaĝon kaj estas larmige trista.

Baj Ĝjuji malamegis la obskuran socion, montrante, ke la diboĉo de la reganta klaso kaj la damaĝaj politikoj kaŭzis la socian putriĝon. De malsamaj flankoj li malkaŝis kaj kritikis la krimojn de la socia sistemo. En la meza periodo de Tang-dinastio la impostoj estis tre pezaj. La lokaj ŝtataj oficistoj pagigis al la kamparanoj impostojn ne nur oficialajn sed ankaŭ ekstrajn por kontribui al imperiestroj kaj akiri ilian favoron. Tiu damaĝa politiko senigis la popolanojn je ĉio akirita per laboro, ke ili eĉ ne povis vivi plu. La poemo "Pezaĵ Impostoj" rakontas jenan fakton: La kamparanoj baraktas sub pezaj impostoj, sed en la staploj de la imperiestroj

*"La silkaĵoj monte amasiĝas,  
Kaj silkvato altas ĝis plafono."*

De tio la poeto indigne kriis:

*"Forrabas vi de mia korpo varmon,  
Por elaçeti por vi nun favoron.  
Sed la rabaĵoj en la ŝtata staplo,  
Post multaj jaroj, iĝos polvo."*

En siaj poemoj "Sinjoregoj", "Kanto kaj Danco" kaj "Aĉeto de Floroj" la poeto faris malkaŝon al la maljustaĵoj. En "Sinjoregoj" la poeto priskribis, kiel la nobeloj sin satigas per frandaĵoj kaj ebrigas per vino, kaj poste la poeto indigne montris:

*"tiujare regis sude trosekeco,  
En nia Ĉjuĝoŭ homo manĝis homon!"*

En "Aĉeto de Floroj" li malkaŝas, ke palacaj nobeloj aĉetis faskon da belaj floroj je la prezo, kiu egalas al la imposto de dek mezriĉaj familioj.

Similaj poemoj estas "Ŝinfeng-a Oldulo kun Rompita Brako" kaj "La Karbovendisto Maljuna". La antaŭa estas poemo kontraŭ maljusta milito. Per rakontado de maljunulo pri lia sorto, ĝi malkaŝis, ke la maljusta milito de Tang-imperio portis al la popolo pezan mizeron. Tiam ĉefministro Jang Ĝuoĝong faris militon por akiri favoron de la imperiestro per militaj meritoj, rezulte de tio, 200 000 soldatoj estis mortigitaj. La poeto forte riproĉis tion. En la poemo la maljunulo rakontis



historion, kiu okazis en lia aĝo de 24 jaroj:

*“Mi rompis brakon ŝtele per ŝtonego”.*  
por eviti rekrutadon. Malgraŭ tio, ke

*“Eĉ nun en ŝtorma kaj malvarma nokt’ mi sentas  
Doloron, kiu sendormigas min ĝis la tagiĝo,  
Pro la sendormeco, mi ne pentas  
Jam maljunecon ĝisvivinte, mi kontentas.”*

La poemo priŝkribas la tiaman perfortan rekrutadon:

*“Tra l’ tuta vilaĝo korskira ploro,  
Edzinojn adiaŭis edzoj, l’ gepatrojn filoj.  
Dekmil soldatoj iris al la fronto,  
Sed neniu revenis el la viroj.”*

En la meza periodo de Tang-dinastio estis damninda “palaca foiro” aparte starigita por la kortego. La palaco sendis eŭnukojn aĉeti en ĝi, sed fakte ili tie rabis. La popolanoj de la ĉefurbo

Ĉang’an multe suferis de tio. Baj Ĝjuji kuraĝe verkis la poemon “La Karbovendisto Maljuna”, kies lancopinto direktis sin rekte al la imperiestro kaj eŭnukoj. La poemo sukcese modlis la figuron de maljuna lignokarbisto.

*“Sur lian vizaĝon ŝmiradas ŝminkaĉon ĉiutage la  
polvo kaj fumo.  
Kaj fingroj la liaj je karbo similaj; l’tempioj—  
je blanko de prujno.”*

Li deziregis vendi sian karbon je alta prezo:

*“La tromaldikeco de lia vestpeco elvekas  
kompaton nun-hore,  
Sed ne prezo-falon de karbo, ja malon de varm’ li  
preferas tutkore.”*

Sed la rezulto estis

*“Tul-peco tri-klafta, ŝtof-peco silktafta nur  
longa je unu dekfuto,  
Sur kornojn de l’ bovo kroĉitas — jen ŝtofo por  
pagi la karbon en tuto.”*



Tiele lia ĉaro da lignokarbo estis forrabita. En la poemo ne estas riproĉo nek komentario, sed la indigno de la poeto kaj lia simpatio al la laboranta popolo klare esprimiĝas.

Estas menciindaj la du sentimentalaj poemoj de Baj Ĝjuji "Eterna Bedaŭro" kaj "Bivo". Ili estas la plej eminentaj el la verkoj de Baj Ĝjuji. "Eterna Bedaŭro" priskribas la amon inter Li Longĝji (685-762), imperiestro de Tang-dinastio kaj lia favorata edzino Jang Juhŭan. Li Longĝji estis imperiestro dum 50 jaroj en la ĉina historio kaj ankaŭ kaŭzanto de la ribelo de An Luŝan kaj Ŝi Siming en Tang-dinastio. Tial la poemo montras kaj ironion kontraŭ li kaj simpation al li. La unua duono de la poemo senkompate ironias kontraŭ lia diboĉado kaj lia damaĝo al la ŝtato, la unua verso estas:

*"L' imperiestro de Han<sup>1</sup> deziregas belulinon,"*  
poste la poemo diras:

*"En sunleviĝo ili sentas, ke la nokto kurtas,  
De tiam li matene ne plu faras aŭdiencon."*

La dua duono priskribas la fidelan amon inter la imperiestro kaj lia edzino Jang Juhŭan, la profundan bedaŭron kaj sopiron de la imperiestro post kiam Jang Juhŭan estis strangolita en la ribelo. En ĝi legiĝas:

*"Smeraldis la riveroj de Ŝu<sup>2</sup> kaj l' montar'  
safiris.*

*Tagnokte la imperiestro pri l' edzin' sopiris.  
Ĉagrenis lin la lun' vidata en noktej' dum fuĝo,  
Tintad' tjema-a<sup>3</sup> en pluvnokto lian koron ŝiris.*

*Senŝanĝaj trovis li palace, post retrovojaĝo,  
En Tajje<sup>4</sup> lotusflorojn ĉarmajn kiel ŝia vizaĝo  
Kaj salikfoliojn en Ŭejjang<sup>5</sup> similajn al ŝiaj  
brovoj.*

*Kiel li povus ne eklarmi ĉe tia pejzaĝo!*

*Meditis la palac'. Lampiroj flirtis en vespero.  
Maldormis li tutnokte sola ĉe lum' de kandelo.  
Longlongis nokt', malhaste sonis sonoril',  
tamburo<sup>6</sup>.*

*Tagiĝos jam? Ankoraŭ brilis la Argent-rivero<sup>7</sup>."*

La poemo rakontis ankaŭ, ke Jang Juhŭan sopiras la imperiestron siaflanke. En fea lando ŝi estis soleca. Kiam ŝi vidis la senditon de la imperiestro, ŝi ekmemoris sian ĵuron al la imperiestro kaj sentis la eternan bedaŭron ĉe la adiaŭo neforgesebla:

*"Je l' adiaŭo ŝi kun zorgo faris jen parolon,  
En kiu estis ĵuro, kiun sciis nur du koroj:  
'La sepan de l' monato sepa en Longviva Halo,  
Ni en noktmezo amflustrados dum kvietaj horo.  
Ni estu par' de amobirdoj en la firmamento*

*Aŭ branĉoj ame interligaj sur la kontinento.'  
Ja finon havos la ĉielo, same ankaŭ l' tero,  
Neniam finon havos ja ilia bedaŭr-sento!"*

Tiu realisma kaj romantika eposo en brilaj versoj estas spirite viveca kaj intrige animskua. De pli ol mil jaroj ĝi estas multe ŝatata, deklamata kaj adaptita al la teatro por surscenigo.

En 815 p.K. Baj Ĝjuji estis degradita kaj sendita al Ĝjangĝoŭ<sup>8</sup> kiel asistanto de ĝia urbestro. Tiam li kun senlima melankolio verkis la faman eposon "Bivo". Ĝi rakontas: Kantistino de Ĉang'an fama siatempe maljuniĝis kaj kontraŭvole edziniĝis al komercisto kaj ĉie vagis. Ŝiaj bivo-ludo kaj malfeliĉa travivaĵo ekpensis al la poeto lian propran travivaĵon. Li pretervole eligis suspiron:

*"Ni ambaŭ estas malfortunaj homoj en la  
mondo,  
do kial interkonatiĝu nepre ĉe l' renkonto!"*

La poemo brile priskribas la bivan ludon. La priskribo pri la laŭta, adaĝa, morne malgaja kaj grandioza ludo vivece impresis la legantojn, kvazaŭ ili persone aŭskultus la veran ludon. Ĝi vere estas senprecedence bela priskribo pri muzikaĵo.

Post la degradiĝo al Ĝjangĝoŭ, Baj Ĝjuji deprimiĝis, la konfuceanisma dogmo "vivi kontente laŭ la destino", la taoisma dogmo "sen malgloro en kontenteco" kaj la budhisma dogmo "ĉio estas efemera" iom post iom fariĝis liaj gvidaj pensoj. Pro tio liaj poemoj perdis sian batalspiriton. Li verkis tiutempe grandan nombron da senzorgaj kaj sentimentalaj poemoj. En 846 la poeto mortis de malsano en la urbo Lŭojang, Henan-provinco.

Baj Ĝjuji donis grandan atenton al kompilado kaj ordigo de siaj poemoj. Li postlasis pli ol 3 000 poemojn, kiuj cirkulis vaste kaj influis multe. Liaj poemoj estas bone konataj ne nur enlande, sed ankaŭ eksterlande. Ili estas lingve simplaj kaj facile kompreneblaj. Laŭdire, verkinte poemon, li unue voĉlegis ĝin al maljunulinoj kaj kontentiĝis nur kiam ili komprenis ĝin. Kvankam ne tute fidinda, la legendo montras, ke liaj poemoj estas facile legeblaj. ■

1. La poeto ĉi tie aludis pri Li Longĝji.
2. Ŝu estis en la nuna Siĉŭan-provinco.
3. Tjema-o estas tintilo pendanta tegmentrande, kiu tintas en vento.
4. Tajje estas nomo de lageto.
5. Ŭejjang estis la imperiestra palaco de Han-dinastio. La poeto ĉi tie aludis pri tiu de Tang-dinastio.
6. En antikva Ĉinio oni markigis la noktajn horojn per sonorilo kaj tamburo.
7. Argent-rivero — la Laktovojo laŭ ĉina mito.
8. Ĝjangĝoŭ estas la nuna urbo Ĝiŭĝjang de Ĝjangŝji-provinco.

# Elektitaj poemoj de Baj Ĝuji

## La karbovendisto maljuna

La karbovendisto maljuna  
hejtlignon preparas  
kaj karbon elfaras  
sur monto Ĝongnaŝan komuna.

Sur lian vizaĝon  
ŝmiradas ŝminkaĉon  
ĉiutage la polvo kaj fumo.  
Kaj fingroj la liaj —  
je karbo similaj;  
l' tempioj — je blanko de prujno.

Do kion aspiras,  
se monon akiras  
li per sia karbovendado?

Aĉeti vestaĵon  
kaj ian manĝaĵon —  
sin savi el frost' kaj malsato.

La tromaldikeco  
de lia vestpeco  
elvekas kompaton nun-hore,  
sed ne prezo-falon  
de karbo, ja malon  
de varm' li preferas tutkore.

En nokto dekcolan  
de neĝo tavolon  
surtiris sur sin la kamparo,  
karboĉaro lia,  
sur vojo glacia,

matene jam iras kun knaro.  
La suno jam altas,  
la bovo jam fartas  
dormeme, kaj l' maestr' en malsato  
ankoraŭ en-ŝlime  
atendas senfine  
ekster suda la pord' de l' bazar.

Jen par' da rajdantoj  
alflugas, ho dandoj —  
kio estas la du kvazaŭ-feoj?

Sinjoroj palacaj  
eŭnukoj senlacaj  
en flava kaj blanka livreoj.

En man' notoslipoj,  
kaj krio el lipoj:  
"Obeu regnestran la vorton!"

Turninte l' bovĉaron,  
jam hovan paŝfaron  
la viroj direktas en nordon.

Plenplena bovĉaro  
da lignokarb-varo  
ja pezas je pli ol mil ĝinoj<sup>1</sup>,  
ĝin ili forprenas  
palacen; ne penas  
deteni la avo pro timo.

Tul-peco tri-klafta,  
ŝtof-peco silktafta  
nur longa je unu dekfuto,  
sur kornojn de l' bovo  
kroĉitas — jen ŝtofo  
por pagi la karbon en tuto.



## Bivo

Adiaŭ al gasto aŭtunnokte ĉe Ŝjunjang-rivero.  
Susuris fragmitfloroj kaj folioj de acero.  
Mi deĉevalis kaj eniris ŝipon de l' amiko,  
pokalojn ni eklevis taste, sen lud' de muziko.  
La adiaŭĉagreno kreskis en la ebrico,  
la brila luno sin banadis en la river-mezo.  
Subite de sur l' akv' aŭdiĝis biva melodio, la mastro  
kaj la gast' kunrestis pro la biv-ario.  
"Kiu muzikas?" pridemand' mallaŭtis prienkete.  
La ludo ĉesis, sed respondo bremsis sin diskrete.



Ni ŝipe almoviĝis kaj l' ludanton ni invitis,  
aldonis vinon, faris lumon por regalo prete.  
Nur post vokado foj-refoja fine ŝi elvenis,  
ankoraŭ duonvizaĝŝirme ŝi la bivon tenis.  
La agordilojn ŝi turnadis, tonojn prove donis —  
ne en ario ili tamen emocie sonis.

La kordoj mediteme tremis kaj la tonoj ĝemis,  
kvazaŭ pri ies dekadenca kariero temis.  
Kun kap' klinita ŝi ludadis plue laŭ la volo,  
verŝante la senfinan senton tristan el la koro.  
Ŝi milde l' kordojn plukis, plektris kaj lertfingre

pinĉis,

unue Niŝang<sup>2</sup>, poste Liŭjaŭ<sup>2</sup> bive ŝi prezentis.  
La dikaj kordoj bruis kiel forta pluvsusuro,  
la altapitĉaj sonis kiel flustra am-murmuro.  
La dikaj kaj maldikaj faris miksan kunsonadon,  
jen kvazaŭ perloj grandaj etaj falus sur jadpladon.  
Jen kvazaŭ oriolo kantus en floraro trile,  
jen kvazaŭ fonto sub glacio fluus malfacile.

La sonojn, kiel fridan fonton, frosta sento bremsis,  
kaj por momento pro l' obstrukco la muziko ĉesis.  
Senvortan ĉagreniĝon naskis ŝia trista sento,  
pli bone ol muziko ĝin sentigis la silento.

Botel' arĝenta krevis, akvo el ĝi ŝprucis, fulmis,  
kun tint' de glav' kaj lanc' kirasaj viroj rajdaj

sturmis.

Ŝi plektris meze de la pordoj fine de la ludo,  
ekbruis la kvar kordoj kvazaŭ ŝir' de silka tuko.  
En la boatoj voĉ' nenia bruis tra l' aero,  
nur la aŭtuna luno helis meze de l' rivero.

La plektron inter kordojn metis ŝi kun meditemo,  
la vestojn ŝi ordigis, serioziĝis la miemo.

Ŝi diris, ke en la ĉefurbo ŝi antaŭe vivis,  
kaj al la Ŝjamo-Maŭzoleo<sup>3</sup> ŝia dom' proksimis.

Ellernis ŝi bivludon en la aĝo dektrijara,  
kaj membriniĝis al l' Unua Fak' Muzikistara.

Ŝin majstra muzikist' admiris ofte post ario,  
kaj ŝian ĉarmon aprecadis Ĉiŭnjang<sup>4</sup> kun envio.

Junuloj de l' Kvin Maŭzoleoj<sup>5</sup>, pro ari' konkure  
donacis al ŝi silkubandojn ruĝajn senmezure.

Harpinglo kaj kombil' rompiĝis pro taktbat'en

fino,

la jup' karmina makuliĝis pro verŝiĝ' de vino.

Ĝojplenaj jaroj preterpasis pace en plezuroj,  
printempa vent', l' aŭtuna lun' forglitis de l' okuloj.

La frat' aliĝis al armeo kaj l' onklin' forpasis,  
vesperon post vespero ĉarmo ŝia ŝin forlasis.

Al ŝi maloftis rajdaj gastoj post la ĝoj-kulmino,  
ŝi, travivinte l' junon, iĝis komercistedzino.

La monavida komercist' disiĝon ne domaĝis,  
pro te-negoco li du monatojn al Fuljang<sup>6</sup> vojaĝis.

De tiam ŝi restadis sola en la ŝip' malplena,  
ĉe la haveno frostrivera en lunlum' ĉagrena.

En nokt' profunda ŝi subite songis pri l' junaĝo,  
torente fluis ŝiaj larmoj, ruĝis pro l' ŝminkaĵo.



Aŭdinte la muzikon bivan jame mi suspiris;  
post aŭskultado de l' rakonto ree mi ĝemspiris.  
Ni ambaŭ estas malfortunaj homoj en la mondo,  
do kial interkonatigu nepre ĉe l' renkonto!  
Mi pasintjare la ĉefurbon de la imperio  
forlasis, en Ŝjunjang malsanas post malpromocio.  
En l' izolita urbo Ŝjunjang mankas ja muziko,  
tujjare ne aŭdiĝas flut' aŭ bivo en praktiko.  
Mi loĝas vale de Penĝjang en malseka zono,  
fragmitoj kaj bambuoj kreskas ĉirkaŭ mia

domo.

Aŭdiĝas ĉe mi tutatage preskaŭ ja nenio  
krom kukuado kaj blekado trista de simio.

En luna nokto de aŭtuno aŭ printempo flora,  
mi ofte prenas vinbotelon kaj drinkadas sola.

Ĉu ne aŭdiĝas popolkantoj aŭ arioj flutaj?  
La malagordaj tonoj estas orelpike krudaj.

Mi aŭdis en ĉi nokto vian bivo-poezion,  
akriĝis la oreloj kvazaŭ aŭdus fe-arion.

Bonvolu residiĝi, ludu unu pecon plian,  
mi verkos por vi jam eposan bivo-historion.

Ŝi kortuŝiĝis de la vortoj, staris longmomente,  
sidiĝis ree, kordojn pinĉis, haste kaj kresĉende.

Alie sonis la muzik' de trista sentimento,  
ĝin aŭskultante l' ĉeestantoj larmis pro kunsento.

Kiu el ni tiam verŝis larmojn ja plej multe?

Sima<sup>7</sup> de Ĝjangĝou en malseka rob' en evidento.

Esperantigis LAŬLUM

1. ĝino = 1/2 kilogramo.

2. Niŝang kaj Liŭjaŭ estas famaj dancmuzikaĵoj.

3. Ŝjamo-Maŭzoleo situis sudoriente de la ĉefurbo Ĉang'an; tie loĝis kantistinoj.

4. Ĉiŭnjang estis populara nomo de kantistinoj en Tang-dinastio.

5. La Kvin Maŭzoleoj — kvin maŭzoleoj de Han-dinastio, kie loĝis nobeloj kaj riĉuloj.

6. Fuljang — gubernio de Ĝjangŝji-provinco kun vigla teokomerco.

7. Sima — malaltranga oficisto en Tang-dinastio. Sima' de Ĝjangĝou — la poeto mem.

## *Juna esperdona baleta trupo*

Tre juna estas la Ĉina Centra Baleta Trupo, kompare kun la famaj baletaj trupoj en la mondo. Ĝi estas nur 25-jara, depost 1959, kiam ekestis ĝia antaŭa formo la Praktika Baleta Trupo sub la Pekina Danca Lernejo.

Tamen, ĝi estas rapide progresanta kaj esperdona. En februaro 1986, ĝi turneis 47 seancojn en 11 usonaj urboj kaj faris sensacion per sia prezentado. Usonaj ĵurnaloj raportis, ke ĝi estas progresanta unuaklasa baleta trupo.

Mi intervjuis la trupon lastatempe. Pri ĝia pozicio en la mondo, s-ino Baj Ŝuŝjang, ĝia vicestro kaj fama baletistino, senemocie diris: "Eble ĝi povas enviciĝi inter famaj trupoj en la mondo." Tio estas diskreta kaj objektiva memtakso.


La trupo havas eminentajn geaktorojn, perfektan simfonian orkestron kaj kvalifikitajn scenejajn dekoristojn, sume pli ol 400 personojn. Tial ĝi estas la plej granda kaj plej supera ŝtata baleta trupo de Ĉinio.

La trupo prezentis en ĉiuj partoj de la lando baletojn de diversaj temoj, formoj, stiloj kaj skoloj. Ĝi havas intiman rilaton kun la popolo pro sia prezentado por popolanoj en la subaj socitavoloj. Oni ege ŝatas rigardi ĝian prezentadon de "Cigna Lago" k.a., kaj nemalmutaj vicatendis tutan nokton ĉe ĝiĉeto por aĉeti bileton.

En ĝia repertuaro estas la



La baletoj "La Morto de Cigno" prezentata de baletistino de la Ĉina Centra Baleta Trupo



En provprezentado

tradiciaj klasikaj verkoj "Cigna Lago", "Giselle", "La Korsaro", "La Senutila Singardeco", "La Fonto de Bahĉesaraj", "Esmeralda", "Silvia", "La Feinoj" kaj "Donkiĥoto", kaj ankaŭ la ĉinaj naĉistilaj baletoj "Ruĝa Virina Taĉmento", "Blankhara Knabino", "La Knabino de la Maro", "La Novjara Beno" kaj "Lin Dajju". Krom tiuj teatraĵoj, ĝia repertuaro inkluzivas ankaŭ multajn aplaŭdindajn dancojn.

La Centra Baleta Trupo ankaŭ posedas grupon da eminentaj koregrafoj kaj reĝisoroj, kaj unu el ili estas Li Ĉengŝjang, la estro de la trupo. En la lastaj jaroj li klopodis por fondi ĉinan baletan skolon. Li diris: "Unu el la gravaj markoj pri la matureco de la baleta arto estas stariĝo de nacia karaktero. En la mondo estas ortodoksaj rusa kaj franca romantika skoloj, dum ni strebas al fondo de ĉina baleta

skolo."

"Lin Dajju", reĝisorita de Li Ĉengŝjang, povas esti rigardata kiel lia grava provo cele al fondo de ĉina baleta skolo. Lin Dajju estas heroino en la ĉina klasika romano "Songo en Ruĝa Buduaro", rigardata kiel renegato de la feŭdisma moro kaj okupas gravan pozicion en la romano honorita kiel "enciklopedio pri la ĉina feŭdisma socio". Dum multaj jaroj la tragedio de la amo inter Lin Dajju kaj Ĝja Baŭju estas ofte prezentata en la tradiciaj ĉinaj operoj, tamen ĝi prezentiĝis en baletu unuafoje.

En la teatro Li Ĉengŝjang kreis riĉan karakterizan dancan lingvon. Ekzemple, li adaptis graciajn sudajn dancmovojn kaj movojn specifajn en lokaj operoj de Ĉinio al la kutimaj supren-levo, drasta turniĝo kaj kompleksa

pirueto de baletu. Konforme al la historia fono de la teatraĵo, la kompare drastaj movoj aperis nur en la iluzio de Lin Dajju.

Mi ne juĝas pri la sukceso de tiu provado, tamen provo mem sendube havas profundan signifon.

En la lastaj 30 jaroj aperis senĉese elstaraj baletistoj en la trupo. Baj Ŝuŝjang estas baletistino de la unua generacio en Ĉinio kaj fondinto de la ĉina baleta afero. En la 50-aj jaroj ŝi estis elektita de la sovetunia fakulo P.A. Gusev je la unua vido, kiu tiam instruis en la Pekina Danca Lernejo, kaj ekludis kiel la ĉefrolulino en "Cigna Lago" premiere prezentata en Ĉinio. Baj Ŝuŝjang kun granda energio sin ekzercis en baleta arto. En "Cigna Lago" estas malfacilaj movoj, ke la baletistino devas sin levi kaj



mallevi per la pinto kaj plando de unu piedo sur la sama loko, kaj svingadi la alian gambon, por fari 32 turniĝojn de la korpo en 360 gradoj. Por posedi tian malfacilan teknikon, Baj Ŝuŝjang ĉiutage dronis en ekzercado, ĝis sangis ŝiaj piedfingroj kaj defalis piedungoj. Post 4-monata penema ekzercado, ŝi povis ekvilibre sin turni 32 fojojn, kaj iam eĉ pli ol 60 fojojn. Baj Ŝuŝjang fariĝis la unua brila "blanka cigno" sur la ĉina baleta scenejo.

En la lastaj jaroj rapide kreskis la baletistoj de la nova generacio de la trupo, kiuj senĉese sukcesis en la internaciaj baletaj konkursoj. En 1982, en la Jackson-konkurso okazinta en Usono, Ĝang Ŭejĉjang gajnis la kupran medalon. En 1984, en la Kvara Osaka-konkurso okazinta en Japanio, Tang Min kaj Ĝang Ŭejĉjang, Ĝuo Pejhuĵ kaj Ĝaŭ Minhŭa okupis la duan kaj kvaran

lokojn respektive en la konkurso de duopa danco. Samjare, en la Unua Pariza Internacia Danca Konkurso, Ŭang Ĉajĵun kaj Ŭang Ĉifeng de la Ŝanhaja Baleta Trupo gajnis la specialan premion. En 1985, en la Kvina Moskva Internacia Danca Konkurso, Ĝang Ŭejĉjang kaj Ĝaŭ Minhŭa okupis la virajn triajn lokojn respektive en duopa danco kaj solo-danco, kaj Tang Min gajnis la premion por la plej elstara prezentado. En 1986, en la Dekdua Varna Internacia Baleta Konkurso okazinta en Bulgario, Tang Min gajnis la arĝentan medalon en la virina plenaĝula grupo, Baj Lan kaj Ĝang Ĵuofej gajnis honoran mencion por prezentado de duopa danco.

Iu diris, ke la ĉina baleta trupo brile sukcesis dank' al tio, ke la antikva ĉina akupunkturo kaj mokso helpis la ĉinajn gebalet-

istojn venki la graviton de la terglobo. Tio kompreneble estas nur humura laŭdo. Sed estas klare videble, ke ekde 1980 la pordomalforma politiko de Ĉinio portas prosperiĝon al la ĉina baletoj. En la lastaj jaroj la trupo invitis plurajn mondfamajn baletajn majstrojn, kiaj Anton Dolin de Usono, Beryl Grey kaj Alan Hooper de Britio, Lycette Darsonval kaj P. Vincent de Francio k.a. Samtempe, grupo da ĉinaj junaj talentuloj estis sendita al Britio, Francio, Usono kaj Kanado por sin perfektigi en la arto. Tiel, sur la bazo de la rusa skolo la ĉina baletoj lernis fortajn punktojn de la grandaj baletaj skoloj en la mondo. Rezulte de tio, la ĉina baletoj povos havi kaj la durecon de la rusa stilo kaj la delikatecon de la eŭropa stilo. Ĝuste kiel s-ino Baj Ŝuŝjang diris, tio estos utila por la disvolviĝo de la ĉina baletoj kaj la fondiĝo de la ĉina baleta skolo. ■

Baj Ŝuŝjang (la unua de dekstre) kaj junaj gebaletistoj



# Geĝoŭba — la unua baraĵo sur Jangzi-rivero

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de HAJ FENG kaj ŬEJ BO

Kiam nia pasaĝersĥipo forlasis la pasejon Nanĝingŭan ĉe Ŝjiling-gorĝo, ni rimarkis, ke Jangzi-rivero subite larĝiĝas de 300 metroj al pli ol 2 200. Kvankam ambaŭborde kontinuas montetoj, tamen ne plu vidiĝas ĉielskrapan-taj montpintoj kaj altaj krutaj rokmuroj. Kiam nia ŝipo malrapide proksimiĝis al la urbo Jiĉang de Hubej-provinco, okulfrapas grandioza baraĵo. Ĝi estas Geĝoŭba, fama akvoutiliga konstruaĵo sur Jangzi-rivero.

## LA AKVOUTILIGA KONSTRUAĴO GEĜOŬBA

Mi surbordiĝis ĉe Jiĉang por viziti ĝin. Ĝi estas gorĝo inter la provincoj Siĉŭan kaj Hubej kaj la limo de la meza kaj supra Jangzi-rivero, konata kiel “pordo de la

Tri Gorĝoj”. Antaŭ la 50-aj jaroj ĉe la haveno de Jiĉang oni povis ankri nur dekkelkajn 100-tonelajn ŝipojn. Post finkonstruo de la baraĵo Geĝoŭba tien povas trapasi 10 000-tonelaj ŝipoj kaj grandaj pasaĝersĥipoj. La Ĝjaŭzŭo-Ĝiĉeng-a Fervojo konstruita en la lastaj jaroj interligas la urbon kun aliaj lokoj de la lando, kaj la loko fariĝis nodo de akvo- kaj tertrafika vojoj.


La rapida disvolviĝo de Jiĉang estas nedisigebla de la akvoutiliga konstruaĵo Geĝoŭba. en la fino de 1970 la ŝtato decidis konstrui tie baraĵon kaj nomis ĝin Geĝoŭba laŭ la nomo de insuleto en la rivero. La konstruaĵo estas plenumita en du periodoj. La unuaperioda kompletiĝis en la fino de 1980 kaj la duaperioda


baldaŭ finiĝos.

La pluruza akvoutiliga konstruaĵo Geĝoŭba konsistas el riverbaraĵo, hidroelektrejoj, akvoellasa kluzo, ŝipkluzoj kaj sabloforiga kluzo. Ĝi povas produkti elektron, akceli navigadon, ellasi superakvon kaj faciligi irigacion. Post konstruado de la baraĵo la nivelo de la riverakvo supre de la baraĵo leviĝis je pli ol 20 metroj. Tio formis artan lagon povantan rezervi 1 580 milionojn da kubmetroj da akvo. La akvosurfaco de la lago etendiĝas al la supra parto de Jangzi je pli ol cent kilometroj. Tio efike faciligas la navigadon en la Tri Gorĝoj kaj akcelas la disvolviĝon de la navigado sur Jangzi-rivero.

Kun longo de 2 606.5 metroj kaj alto de 47 metroj, la baraĵo surhavas fervojon kaj ŝoseon. Fakte ĝi servas kiel ponto super Jangzi-rivero. Geĝoŭba dividas Jangzi-riveron en tri riverojn, la Unuan, Duan kaj Trian, kaj kuŝas sur ili. La malfacile regebla Jangzi-rivero estas fine subigita.

En la Unua kaj Tria Riveroj konstruiĝis tri ŝipkluzoj. La unua kaj dua kluzoj povas trapasigi 10 000-tonelajn pasaĝer- kaj kargo-ŝipojn kaj la tria 3000-tonelajn ŝipojn. La 27-porda akvoellasa kluzo kaj la 12-porda sabloforiga kluzo povas ellasi 110 000 kubmetrojn da akvo ĉiusekunde.





Parto de la Infana Ĝardeno en Jiĉang

Mi havis ŝancon rigardi pasadon de ŝipoj tra la baraĵo. Antaŭ ilia trapaso malrapide leviĝis movebla tabulo super la tria ŝipkluzo de la Tria Rivero, kiel levponto. Kiam la akvo en la kluzĉambro estis samnivela kun tiu en la supra parto, malrapide malfermiĝis la supra kluzpordo kaj la ŝipoj malrapide veturis en la kluzĉambron. Tiam la supra kluzpordo fermiĝis, la movebla tabulo malleviĝis kaj la ŝipoj troviĝis kvazaŭ en kanjono. Poste oni malfermis la akvoellasan koridoron de la kluzĉambro. Post dekkelkaj minutoj la akvo en la kluzĉambro fariĝis samnivela kun tiu en la malsupra parto, la malsupra kluzpordo malrapide malfermiĝis kaj la ŝipoj veturis el la ŝipĉambro kaj glate trapasis la baraĵon.

Post vizito de la baraĵo mi eniris la hidroelektron de la Dua Rivero. En la alta ferbetona fabrikdomo estas 7 akvoturbinaj generatoroj. La unua kaj dua

generatoroj ĉiu kun kapacito de 170 000 kilovattoj estas la plej grandaj el la samspecaj maŝinoj en Ĉinio. Ĉiu el ili estas 48 metrojn alta. La aliaj 5 generatoroj ĉiu havas kapaciton de 125 000 kilovattoj. Vidinte tiel grandegan fabrikdomon, iuj eksterlandaj amikoj diris: "Vizitu la Grandan Muron por koni la antikvan Ĉinion kaj vizitu Geĝoŭba por koni la modernan Ĉinion!"

Krom la hidroelektron de la Dua Rivero, estas ankaŭ hidroelektron de la Unua Rivero. Ĝi havas 14 generatorojn ĉiu kun kapacito de 125 000 kilovattoj. La du elektronoj havas sume 21 akvoturbinajn generatorojn fabrikitajn de Ĉinio, kun totala kapacito de 2 715 000 kilovattoj kaj jara produktokapablo de 15.7 miliardoj da kilovatthoroj. Ili estas la plej grandaj hidroelektronoj en Ĉinio. Nun 16 generatoroj produktas elektron. Ĝis oktobro 1987 ili produktis sume 42.1 miliardojn da kilovatthoroj

da elektro, alivorte ili ŝparis 25 200 000 tunojn da karbo aŭ 12 600 000 tunojn da nafto, kaj per tio kreis produktovaloron de 2.48 miliardoj da ĵuanoj, egalan al la totala investaĵo por la unuaj-perioda konstruo de Geĝoŭba. En 1989 la totala akumulita produktovaloron povos esti egala al la investaĵo por la tuta konstruo, t.e. post la kompletigo de Geĝoŭba la kapitalo por la tuta investaĵo (ekskluzive la interezon) povos esti reprenita.

#### BREDADO DE ĈINAJ HUZOJ

Mi forlasis Geĝoŭba kaj venis al la Instituto de Jangzi-riveraj Akvoproduktaĵoj. La instituto arte reproduktis junajn ĉinajn huzojn, valorajn fiŝojn en Jangzi-rivero. Respondeculo de la instituto konigis al mi ĉinajn huzojn kaj ilian bredadon. Ili estas grandaj ekonomiaj fiŝoj. Matura huzo longas 4 metrojn kaj pezas 500 kilogramojn. Ĝia karno estas bongusta, ĝia nigra fraĵo estas



valora manĝaĵo kaj el ĝiaj veziko kaj ĥordo oni faras fiŝgluon. Laŭdire, la ĉinaj huzoj havas historion de 130 milionoj da jaroj kaj estas rigardataj kiel vivanta fosilio kun esplora valoro. Ili migras inter rivero kaj maro. Junaj huzoj naĝas al la Orienta Ĉina Maro aŭ la Flava Maro por vivi, kaj post 9-14 jaroj ili maturiĝas kaj naĝas supren laŭ Jangzi-rivero por fraĵi en ĝia supra parto Ĝinŝa, okcidente de Jibin, Sicŭan-provinco.

La hidroelektrejoj de Geĝoŭba baris al ili la vojon. Koncerna departemento provis konstrui vojon por huzoj kaj enriverigi la kaptitajn, sed tio ne bone efikis. Poste oni aplikis novan rimedon kapti huzojn, arte fekundigi ilin kaj poste enriverigi ilin. Ĝis la fino de 1986 oni reproduktis ĉ. milionon da junaj huzoj kaj enmetis sume 4 670 000 junajn huzojn en la riveron. Se ĉi tiuj migras en maron kaj bone kreskas, post dekelkaj jaroj granda fiŝejo aperos ĉe Geĝoŭba.

#### HISTORIAJ RESTAĴOJ EN JIĈANG

Jiĉang estis grava loko probatalata de strategiistoj de la antikva Ĉinio. En la periodo de la Tri Regnoj (220-265) la regnoj Ŭej, Ŝu kaj U batalis pro hegemonio super tiu regiono. Historiaj rakontoj kaj legendoj pri la Tri Regnoj estas konataj de multaj ĉinoj. Unu el ili rakontas, kiel generalo de Ŝu-regno Ĝaŭ Zilong sola savis sian malgrandan mastron rajdante sur ĉevalo. En 208 p.K. Liŭ Bej, la imperiestro de Ŝu-regno, estis ĉirkaŭita ĉe Ĉangbanpo, en Dangjang-gubernio de Jiĉang. Li fiaskis en rezisto kaj fuĝis, trarompinte la sieĝon kaj forlasinte siajn edzinon kaj junan filon. Generalo Ĝaŭ Zilong sepfoje en- kaj eliris la malamikan armeon kaj fine savis Adoŭ, la junan filon de la imperiestro. Nun Ĉangbanpo jam fariĝis parko. Sur verda montodeklivo staras steleo kun vortoj "Heroo ĉe Ĉangbanpo" kaj ĉe la


pordo de la parko sidas statuo de Ĝaŭ Zilong rajdante savanta la junan mastron.

Dangjang estis antikva batalejo. Nun ĝi fariĝis gubernio kun industrioj karba, elektra, kemia, konstrumateriala, tekstila, papera, manĝaĵa k.a. Ĝi havas pli ol 400 000 loĝantojn, 40 000 hektarojn da agroj kaj ĉ. 100 000 hektarojn da montoj kun arbaroj. La pokapa enspezo de la gubernio okupas la duan lokon en Hubej-provinco kaj ĝi estas unu el la gubernioj de la provinco kun plej bona ekonomia efiko.

Mi rigardis ankaŭ la "Kavernon Vizititan de Tri Famuloj", kiu situas ĉe la apikaj rokmuroj de la norda pinto de Ŝjiling-monto, dek km. nordokcidente de Jiĉang. Ĝi estas fama historia restaĵo en okcidenta Hubej. Tie ĉarmas pejzaĝo. En Tang-dinastio (618-907) grandaj ĉinaj literaturistoj Baj Ĝjuji, Baj Ŝingĝjan kaj Jŭan Ĝen kune vizitis la kavernon en 819 kaj tial la kaverno ricevis la nomon. Nemalmultaj postaj literaturistoj vizitis ĝin kaj oni gravuris iliajn poemojn sur muroj de la kaverno.


La kaverno kun profundo de 30 metroj kaj alto de pli ol 6 metroj

La Kaverno Vizitita de Tri Famuloj




havas areon de pli ol 700 kvadrataj metroj. En la kaverno estas diversformaj rokoj. Tri stalaktitaj kolonoj dividas la kavernon en du ĉambrojn, la antaŭan kaj postan. La antaŭa estas hela. En ĝi eksoniĝas kelkaj statuoj de antikvaj ĉinaj literaturistoj. Sur la plafono pendas roko en formo de sonorilo. Kiam oni frapas ĝin per ŝtoneto, oni aŭdas sonon kvazaŭ de sonorilo; kaj kiam la ŝtoneto falas surteren, oni aŭdas sonon kvazaŭ de tamburo.

Oni povas supreniri al la montsupro laŭ la vojeto apud la kaverno. Sur la montsupro staras kiosko 18 metrojn alta, kun flave glazuritaj tegoloj, suprenlevitaj tegmentrandoj kaj ruĝaj kolonoj. En la kiosko oni povas vidi Geĝoŭba. Sur la teraso sur la deklivo kontraŭ la kiosko staras statuo de la tamburanta generalo Ĝang Fej de Ŝu-regno. Legendo diras, ke li trejniis tie sian armeon. Centojn da paŝoj malsupre de la kiosko estas kaverno sur apika roko. La aperturo de la kaverno rigardas al Jangzi-rivero. Tie oni povas vidi la torentan fluon. Kiam la fluo preterfluas la "Kavernon Vizititan de Tri Famuloj", ĝi malrapidiĝas kaj la rivero larĝiĝas. ■




Ŝipo trapasanta kluzon



Specimeno de ĉina huzo






Grandioza baraĵo




Tamburanta Ĝang Fej  
(Skulptaĵo)



Parto de la hidroelektrejo







Panorama de Gezhouba

Jiçang êe la rivero





# Naciaj muzikiloj de Ĉinio

de MAŬ ĜJIZENG kaj NAN ŜAN

En neolitiko de la primitiva socio, en Ĉinio jam aperis plej simplaj muzikiloj. En la ruino de Hemudu-kulturo en Ĝeĝjang-provinco oni trovis fajfilon faritan el meza parto de birda membra osto antaŭ 7 000 jaroj. Ĝi estas la plej frua muzikilo el la ĉinaj arkeologiaj trovaĵoj. La muzikiloj elfositaj en Henan-provinco kaj la notoj skribitaj sur bestaj ostoj certigis, ke en la sklava socio de Jin-dinastio (la 16-a jc.-1066 a.K.) jam ekzistis pli ol 10 specoj da muzikiloj. En Ĝou-dinastio (1066-256 a.K.) 70 specoj da muzikiloj estis registritaj en historiaj literaturoj. En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj tiu de Militantaj Regnoj (770-221 a.K.) sufiĉe altan nivelon havis la muzika kulturo de Ĉinio. En 1978 oni elfosis en Hubej-provinco 124 antikvajn muzikilojn de 8 specoj faritajn antaŭ 2 400 jaroj. Inter ili estas *gong*-grupo el 65 pecoj posedita de markizo Zeng Ji kaj *cing*-grupo el 32 pecoj. Ili estas delikate faritaj kaj taŭgaj por ludi melodion. La skalo de *gong*-grupo estas integra, la diapazono vasta kaj la tembro belsona.

Kun la oftaj intervizitoj inter la naciecoj en la lando kaj la vigligitaj eksteraj interrilatoj, la riĉa okcidenta kulturo enkondukiĝis en Ĉinion en Han- kaj Tang-dinastioj (206 a.K.-907 p.K.), la asimiliĝo kaj akcepto de la eksterlanda muziko plej prosperigis la muzikan kulturon de Tang-dinastio. En la mil jaroj de Song-dinastio (960-1279) ĝis Ĉing-dinastio (1644-1911), laŭ sia nacia

trajto kaj ŝato la ĉina popolo kreive evoluigis la ĉinajn naciajn muzikilojn, kiel ekzemple trikordo, *erhu*-o, *banhu*-o, *junlŭo*-gongaro, kaj enkondukis de ekstere surnaon, zimbalonon k.a. La libro "Ĉinaj Naciaj Muzikiloj" konigas pli ol 600 specojn da muzikiloj originaj por la ĉinaj nacimalplimulto.


Laŭ la inklino de ĉinaj muzikistoj, la ĉinaj naciaj muzikiloj dividiĝas en kvin kategoriojn, nome tubajn blovmuzikilojn, kordomuzikilojn, plukmuzikilojn, perkutajn kordomuzikilojn kaj perkutmuzikilojn.

Estas pli ol 250 specoj de tubaj blovmuzikiloj, kiuj ludas gravan rolon en orkestroj de ĉinaj naciaj muzikiloj. Pro la malsameco de formoj, strukturoj kaj materialoj, tiuj muzikiloj havas malsamajn diapazonojn. Flutoj kun diversaj longoj sonas klare, bele, alte kaj

esprimive; la akuta sono de surnao gajigas la atmosferon; la kvieto kaj gracia sono de *ŝeng*-o pontas inter malsamaj voĉoj. La nacimalplimulto de Ĉinio havas multajn originalajn tubajn blovmuzikilojn, kiel ekzemple diversformaj *luŝeng*-oj vaste uzataj de ji- kaj mjaŭ-naciecoj, *tujen*-o de ĝingpo-nacieco, *ĉjang*-fluto de ĉjang-nacieco kaj *muje*-o de buji-nacieco. Tiuj muzikiloj estas ludataj sur scenejo kaj interesas multe da en- kaj eksterlandaj melomanoj.

Plej multe uzataj el la plukmuzikiloj estas bivo, *liŭĉin*-o, *ĵuanĉin*-o, trikordo, *ĝeng*-o kaj zimbazono. Iliaj sonoj estas klaraj kaj laŭtaj. De antikve bivo estas eminenta muzikilo por solludo. *liŭĉin*-o estas muzikilo de akuta sono, kaj la sono de trikordo estas basa. La tembroj de mezgranda *ĵuanĉin*-o kaj granda *ĵuanĉin*-o estas plaĉaj

Fluto





kaj riĉaj. Multaj popolaj plukmuzikiloj riĉaj je kampara gusto, ekzemple *ĝjajeĉin-o* de kore-nacieco, solkordo de ĝing-nacieco kaj granda trikordo de ji-nacieco, estas tre ŝatataj naciaj muzikiloj.

La kordomuzikiloj ĉefe estas muzikiloj de *huĉin*-familio. Iliaj tembroj estas delikataj, puraj kaj kantecaj. En la kurludo de multaj muzikiloj ili formas la bazon de la sono de orkestro. Estas multaj specoj de *huĉin*-oj pro la specifa tembro. *Erhu*-o havas tembron gracion, *gajhu*-o — klaran kaj imponan kaj *banhu*-o — pasian kaj senkatenan. Krome, ĉevalkapa muzikilo de mongoloj, ĉevalosta muzikilo de ĝuang-oj kaj bovogamba muzikilo de dung-oj estas ŝatataj pro la bela sono.

La perkuta kordomuzikilo estas ludata per maldikaj bambuaj vergetoj. La nuna perkuta kordomuzikilo ofte ludata sur la ĉina scenejo ĉefe estas zimbazono enkondukita de ekstere en Mingdinastio (1368-1644). La tembro

de zimbazono estas milda kaj klara dank' al la anstataŭigo de feraj dratoj per ŝtalaj. La zimbazono estas ludata en solo aŭ kurludo.

Perkutmuzikiloj ĉefe estas gongo, tamburo, cimbaloj kaj *ban*-o. Ili estas la plej laŭtaj membroj de orkestro kaj povas doni tre viglan kaj gajan atmosferon. Dank' al siaj variaj ludmanieroj la ĉinaj naciaj muzikiloj konserviĝis ĝis nun. En la lastaj jaroj kopiaĵoj de kelkaj antikvaj perkutaj muzikiloj *ĝong*-grupo kaj *ĉing*-grupo estis luditaj sur scenejo. Multaj muzikiloj portantaj fortan lokan koloron, ekzemple, *dingtong*-o de linacieco, longa tamburo de kore-nacieco, elefantpieda tamburo kaj *mangljo*-gongo de taj-nacieco, jam suriris la muzikan scenejon de Ĉinio.

La naciaj muzikiloj ĉiam gajigas la popolan vivon. En kantado kaj dancado ili estas nepre necesaj, kaj ili okupas gravan lokon en nupto, festo, religia rito, celebrado kaj


funebro. Ili estas nemalhaveblaj ankaŭ por ĉiutaga vivo, laboro, societado kaj amafero. Estas interesa fenomeno sur la paŝtejo de la Interna Mongolio: Se kamelino ne volas mamnutri sian kamelidon, la paŝtisto ekludas ĉevalkapan kordomuzikilon anstataŭ vipi ĝin. La plaĉa melodio kortuŝas la kamelinon ĝis larmoj, kaj tiu ekvolontas mamsuĉigi la idon. La naciaj muzikiloj de Ĉinio, kiuj posedas vastan terenon de esprimo, havas potencon artan infektemon.

En la lastaj 40 jaroj la ĉinaj muzikistoj faris penan laboron por prezenti la novan vivon per la tradiciaj naciaj muzikiloj. Por tiu celo ili faris multajn fruktodonajn laborojn en la kampo por pligrandigi la diapazonon kaj plibonigi la tembron surbaze de la originaj tembro, formo kaj ludmaniero. Multaj elstaraj sukcesoj de plibonigado estas plivestigataj de ĉinaj nacimuzikilaj orkestroj en muzika praktiko. ■

Bivo



Erhu-o



# Tambura turo kaj flora ponto de Dung- nacieco



Tambura turo

Dung-nacieco estas unu el la ĉinaj nacimalplimulto vivantaj en la sudokcidenta parto de Ĉinio. En la lokoj loĝataj de dungoj plej okulfrapas la tamburaj turoj kaj floraj pontoj kun apartaj stiloj.

La tamburaj turoj alte starantaj en la dung-aj vilaĝoj dividiĝas laŭforme en kategoriojn peristilan, turan, multaleran, portalan, popolloĝejan k.a. Inter ili la multalera estas la plej multaj, kiuj vidiĝas preskaŭ en ĉiuj dung-aj vilaĝoj.

La malsupra parto de la multalera tambura turo similas al kiosko, dum la supra duono al pagodo. Interne kaj ekstere de la malsupra parto staras po kvar kolonoj subtenantaj kvadratan salonon. Ĉirkaŭe estas ĉizitaj balustradoj kaj seĝoj kaj meze de la salono estas ŝtona fajrujo. La supra parto similas al multalera

pagodo 5-, 7-, 9-, 11-, aŭ plimultetaĝa 10-15 metrojn alta. Kutime la pagodforma supro de la tambura turo prenas kvar- aŭ sesangulajn formojn. La anguloj de la aleroj estas direktitaj supren. En la malgranda ĉambro supre de la turo estas leda tamburo, tial oni nomas la konstruaĵon tambura turo. La pinaklo de la turo estis kronita per figuro de trezora kalabaso aŭ miljara gruo, simbollanta bonaŭguron.

La altaj tamburaj turoj estas konstruitaj senescepte el abio, sen najlo. Rigardante supren en la salono, oni vidas bonorde interkrucitajn tabulojn grandajn kaj malgrandajn. La plafono, la aleraj anguloj kaj la protektaj tabuloj de la ĉevronaj ekstremoj estis dekoritaj per skulptitaj aŭ pentritaj bestoj, birdoj, fiŝoj, insektoj, floroj, homoj kaj dung-aj ĝenroj.

La tamburaj turoj estas delikataj arkitekturaj kaj ludas gravan rolon en la vivo de la dungoj. Kutime ĉiu gento de Dung-nacieco devas havi sian propran tamburan turon, kaj iuj vilaĝoj eble havas plurajn tamburajn turojn pro la kunvivo de pluraj gentoj. En la vilaĝo Ĝaŭŝing de Liping-gubernio, Gujĝou-provinco staras kvin tamburaj turoj en malsamaj grandoj kaj formoj. La alto kaj dekoracio de ĉiu turo reprezentas la estetikon, intereson kaj deziron de la koncerna gento. Tial oni fieras pro la imponeco aŭ delikateco de la tambura turo de sia gento.

Interne de la turo ŝtuparo sur dikaj kolonoj kondukas supren. En kriza okazo oni grimpas en la malgrandan ĉambrojn supre de la turo kaj frapadis la tamburon por alarmi. Laŭ la ritmo oni povas juĝi





Flora ponto en Diping-subdistrikto

pri la okazintaĵo, fari necesan preparon kaj kolektiĝi ĉe la turo. Oni kutime okazigas kunvenon ĉe la turo por interkonsiliĝi pri la grandaj aferoj de la gento bezonantaj juĝon de la komunumo. Tial tambura turo estas la politika centro por la membroj de la tuta vilaĝo aŭ de la tuta gento. En ordinaraĵoj tagoj oni ŝatas ripozi en la tambura turo, kaj en festaj tagoj la tuta gento amuziĝas antaŭ la turo ludante *luŝeng*-ojn (bam-bua blovmuzikilo), dancante kaj kantante la tutan nokton.

Same kiel tambura turo, ankaŭ flora ponto estas la distingiga arkitekturaĵo de la dung-oj. La dung-oj konstruas florajn pontojn karakterizitajn per akra nacia stilo super la riveroj fluantaj ĉirkaŭ aŭ tra la vilaĝo. La tuta ponto ĝenerale kun ŝirma koridoro estas abia ĉarpentaĵo sen najlo kaj feraĵo. Sur la ponto estas benkoj oportunaj al pasantoj. Oni nomas

tian ponton kontraŭ-ventoplava ponto aŭ koridora kontraŭ ventoplava ponto, ĉar la pasantoj povas ripozi sur la ponto kaj ŝirmi sin kontraŭ vento kaj pluvo.

Laŭ strukturo la floraj pontoj dividiĝas en du kategoriojn: kioska kaj tura. Pontoj de la antaŭa kategorio surhavas kioskojn, kaj tiaj pontoj estas pli multaj en la dung-aj regionoj. Super larĝaj riveroj, koridoraj pontoj ĝenerale havas 3-5-etaĝan kvarangulan tamburan turon. Tia ponto estas impona tura flora ponto.

Super la bela Nangĵang-rivero en Diping-subdistrikto de Liping-gubernio kuŝas flora ponto, kiu longas 70 metrojn, larĝas 4 metrojn kaj distancas de la akvo 8 metrojn. Sur la ponto staras tri turoj kaj la meza estas 5-metre-alta kvinetaĝa tambura turo kronita per piramida tegmento kun magia kalabaso. Ambaŭ-

flanke de ĝi estas po trietaĝa tambura turo alta je 3 metroj kun Ŝjeŝan-stila tegmento. La alero de la koridora tegmento estas ornamita per bestaj figuroj, kaj la firstoj de la koridora tegmento per argilaj mandarenaj anasoj kaj *feng*-oj\*. Ambaŭflanke interne de la koridoro surhavas freskojn de ĝenroj, floroj, birdoj kaj pejzaĝoj. Norde de la ponto estas sesangula kontraŭventoplava kiosko alta je naŭ metroj. En la kiosko loĝas maljunulo, kiu ĉiam liveras al la pasantoj teon. Sur la pilastroj pendas pajlaj sandaloj senpage donitaj de bonkoraj virinoj, kaj la pasantoj povas preni tiujn ŝuojn en bezono. En vintro la vilaĝanoj laŭvice liveras hejtaĵojn kaj faras fajron, por ke pasantoj povu varmigi sin ĉe la fajro. Tio montras la helpemon kaj gastamon de la dung-oj. ■

\**Feng-o* estas dia birdo en la ĉinaj mitoj.



SCIENCISTOJ ĈINAJ KAJ ALILANDAJ  
ENSKRIBITAJ POR LA 2-A IAKSTE

La 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (IAKSTE) organizita de la Ĉina Akademio de Sciencoj okazos en Pekino de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1988. Ĝis la fino de januaro jam 53 sciencistoj de 12 landoj enskribiĝis por ĝi, kaj la nombro de la enskribitaj ĉinaj sciencistoj atingis 250. Multaj el alilandaj enskribitoj estas eminentuloj aktivaj en la internacia Esperanto-movado de scienco kaj tekniko kaj sciencistoj kaj profesoroj bone konataj en studo kaj instruado pri scienco. Nun la laboro por IAKSTE estas en preparado.

“TUTMONDAJ SCIENCOS KAJ  
TEKNIKOJ” DISTRIBUATA TUTMONDE

La periodaĵo “Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj”, fondita de la Sciencista-Teknikista E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, ricevis lastatempe la sankcion de la Ĉina Informa kaj Eldona Administracio distribui ĝin kaj eksterlande, post dujara proveldonado. Nun ĝi havas legantojn en 40 landoj kaj regionoj.

ESPERANTA FEBRO EN ŜENJANG

En la lastaj du jaroj aperis Esperanta febrego en Ŝenjang, unu el la

La periodaĵo “Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj”



La Esperanta ekspozicio okazigita ĉe la fondiĝo de la Nanĉang-a Junulara E-Asocio

famaj ĉinaj pez-industriaj urboj, en kiu pli ol 30 000 personoj lernas Esperanton. Nun la Ŝenjang-a E-Asocio havas 9 filiojn en fabrikoj, altlernejoj kaj scienc-esploraj institucioj, kiuj ofte okazigas Esperantajn aktivadojn. De aprilo 1987 ĝis januaro 1988 la Ŝenjang-a E-Asocio kaj la Ŝenjang-a Televida Stacio kune organizis E-kurson kun pli ol 6 000 lernantoj. Nedevigaj E-kursoj funkcias ankaŭ en la Ŝenjang-a Universitato, Ŝenjang-a Agronomia Instituto, Ŝenjang-a Normala Instituto, Nordorienta Politekniko kaj Ŝenjang-a Metalurgia Kolegio.

Por disvolvi turismon per Esperanto, la Ŝenjang-a E-Asocio starigis la turisman sekcion por servi al alilandaj esperantistoj, kiuj volas vojaĝi en Ŝenjang kaj aliaj lokoj de Ĉinio. Ĝis nun ĝi akceptis 3 Esperantajn turismajn grupojn. Nun ĝi jam kontaktiĝis kun E-organizoj de Japanio, Usono, Svedio, Aŭstralio, Pollando kaj Francio. Dong Gŭang, respondeculo de la Ŝenjang-a E-Asocio, esprimis, ke ili bonvenigos E-konferencojn ĉinajn kaj alilandajn kaj donos al ili favorajn kondiĉojn.

NOVAJ E-ASOCIOJ FONDITAJ

En decembro 1987 fondiĝis 7 novaj E-Asocioj en Ĉinio: la Donggŭan-a E-Asocio kaj la Ĉjuĝjang-a E-Asocio de

Gŭangdong-provinco, la Nanĉang-a Junulara E-Asocio de Ĝjangŝi-provinco, la Ŝenjang-a Esperantista-Filatelisto Asocio de Ljaŭning-provinco, la Jiĝeng-a E-Asocio de Ĝjangsu-provinco, la Linji-a E-Asocio de Ŝandong-provinco kaj la Jiĉang-a E-Asocio de Hubej-provinco. Laŭ statistiko, fondiĝis 35 E-Asocioj en Ĉinio en 1987.

S-RO TANG ŜJUN'AN FORPASIS

Membro de la societo “Amikoj de Esperanto”, vicprezidanto de la Pekina Veterana Esperantista Asocio kaj membro de la Konstanta Komitato de la Pekina E-Asocio s-ro Tang Ŝjun'an forpasis 77-jara pro malsano en la 30-a de januaro 1988. Li partoprenis en la E-movado jam en sia juneco. En 1929 li, Tikos k.a. kune fondis la Esperantan Asocion en Hankoŭ. Poste li estis unu el la respondeculoj de la filio de la Ĉina Proleta Esperantista Unio en Hankoŭ. En 1937 li venis al Jan'an por sin dediĉi al la revolucia afero de la ĉina popolo. En la lastaj jaroj li aktive partoprenis Esperantajn aktivadojn kaj faris grandan kontribuon al la Pekina E-movado. Al lia restaĵo-adiaŭa ceremonio florkronojn donis partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Ŭan Li, Hŭang Hŭa kaj Ĉu Tunan kaj fama verkisto Ĥakin.



S-ro Tang Ŝjun'an

#### NOVA ESPERANTO-STRATO

Kiel kontribuo al la centjariĝo de Esperanto, la urbo Subotica en norda Jugoslavio nomis unu el siaj centraj stratoj "Strato Esperanto". Laŭ la statistiko publikigita en "Heroldo de Esperanto" ĝi estas la oka urbo en Jugoslavio kun Esperanto- aŭ Zamenhof-strato aŭ placo.

La 13-an de decembro 1987 okazis la inaŭgura solenaĵo. Antaŭ multnombra ĉeestantaro el diversaj urboj de Vojvodino je la nomo de la urbestro parolis d-ro Djordje Sorad kaj la prezidanto de la Esperanto-societo Erdélyi László. Posttagmeze en la

urba biblioteko okazis abunda programo sub la gvido de Tibor Sekelj.

#### ZAMENHOF-MEMORIGTABULO EN LA URBO WEHLEN

Ekde la 5-a de septembro 1987 ankaŭ en la distrikto Dresden en la urbo Wehlen de GDR ekzistas memorigtabulo pri Esperanto kaj ties kreinto d-ro L.L. Zamenhof. La teksto en la germana lingvo montras, ke d-ro L.L. Zamenhof (1859-1917) parolis ĉi tie en 1908 al la partoprenantoj de la IV-a Universala Kongreso de Esperanto.

La solenan inaŭguron partoprenis la prezidanto de GDREA Hans Heinel kaj reprezentantoj de la distrikta, subdistrikta kaj loka estraroj de kulturligo kaj GDREA, la urba estraro kaj ĉirkaŭ 250 esperantistoj kaj ankaŭ gastoj el Pollando kaj Ĉeĥoslovakio.

#### INFORMOJ EL FINNLANDO

1. Aktiva teamo el la Esperanto-Asocio de la urbo Turku aranĝis lastaŭtune Esperanto-ekspozicion en du bibliotekoj por la 100-jara jubileo de Esperanto. Dank' al la gazeto Turun Sanomat la informo disvastiĝis vaste inter ties abonantaro kaj


legantaro en sudokcidenta Finnlando.

2. La 15-an de decembro 1987, la naskiĝtagon de L.L. Zamenhof, reprezentantoj de la Esperanto-Asocio de Turku (Veikko Tikkanen, Leena Tiusanen kaj Anna-Liisa Ali-Simola) donacis al guberniestrino Pirkko Työlājärvi Esperantan Kalevalon. La prezidanto de la asocio Veikko Tikkanen diris: "Dum sia 100-jara ekzisto Esperanto fariĝis riĉa kaj fleksebla esprimilo kaj kulturlingvo. En ĉi tiu evoluo literaturo havas grandan signifon." Kaj guberniestrino Pirkko Työlājärvi diris: "En grandaj internaciaj kongresoj mi ofte deziris havi lingvon, kiun ĉiuj komprenus kaj kiu faciligus recipokan interkomunikiĝon." En amike varma atmosfero ŝi konversaciis kun la ĉeestantoj pri ĉio ebla rilate al tiu mirinda lingvo.

#### LA 36-A KONGRESO DE ESPERANTISTOJ EN KANSAJO

Sub la aŭspicioj de la eduka komisiono kaj la konsilio de kulturaj organizaĵoj en Takatuki, la Takatuki-Esperanto-Societo, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj organizas la 36-an Kongreson de Esperantistoj en Kansajo, kiu okazos la 4-an kaj la 5-an de junio 1988 en la urbana domo de Takatuki, Japanio.

Zamenhof-memorigtabulo en Wehlen



Guberniestrino Pirkko Työlājärvi (la dua de dekstre) kaj prezidanto Veikko Tikkanen (dekstre) kaj aliaj de la Esperanto-Asocio de Turku en interparolo



*Ĉu vi volas koni Tibeton?*

## **BV. LEGI LA NOVE APERINTAN ALBUMON EN ESPERANTO**

# **TIBETO SUR LA MONDA TEGMENTO**



Tibeto, konata kiel mistera loko, allogas multajn personojn en la mondo. Antaŭ nelonge la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la albumon dediĉitan al tiuj, kiuj interesiĝas pri Tibeto.

La albumo fidele kaj detale konigas Tibeton. La aŭtoroj vivis longe en Tibeto kaj havas profundan konon pri ĝiaj pasinteco

kaj nuntempo. Ili fosis en historiaj materialoj, multon spertis kaj faris esplorojn kaj vizitojn tie, kaj tial ili povas bone prezenti en la albumo la pasintan vivon de tibetanoj sur la antikva teritorio kaj ilian rapidan progreson en la nuntempo. La albumo helpas koni la historion, geografion, ekonomion, kulturon, morojn, religian kredon kaj popolan vivon de Tibeto.

*Bindita, 187 × 260 cm., 132 pĝ. kun 72000 ideogramoj kaj 140 koloraj bildoj (85-Es-316D)*

Mendu ĉe: Perantoj de EPĈ  
aŭ: Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

*(Daŭrigo de p. 25)*

membroj. La de li gvidata Longdistanco-kura Trupo Longa Marŝo de Pekino jam havas pli ol 600 membrojn, sed en la komenco en ĝi estis nur 25. La trupo dividiĝas en dekelkajn grupojn, inter kiuj estas tiu de surdamutuloj. En la lastaj jaroj la trupo ĉiujare okazigis printempan kaj aŭtunan konkursojn. Ĝi eĉ sendis siajn membrojn al Japanio por partopreni en la konkurso.

Tiuj aktivadoj forrabis de

Ĝuang Janlin multe da postlaboraj horoj, tamen li ĉiam kun ĝojo faris tion kaj rigardis ĝin sia neforlasebla devo. Li diris, ke signifoplenaj estas tiuj aktivadoj, ĉar la amasaj sportaj aktivadoj en Pekino stimulos tiujn en la tuta lando, kaj ke tiuflanke la maljunuloj povas doni ekzemplon al la gejunuloj kaj infanoj.

Eĉ dum la vizito al alia lando, Ĝuang Janlin neniam forgesis, ke li estas unu el la aktivaj membroj de la sportaj aktivadoj de Pekino.

Iujare, en Pekino okazis longdistanco-kura konkurso de maljunuloj, tiam Ĝuang Janlin faris viziton en Maŭricio. Tio tamen ne malhelpis lin "partopreni en la konkurso." Ankaŭ li startis al kurado en la korto de la ĉina ambasadorejo en la momento, kiam la pistolo en Pekino donis startosignalon. Li kuris 100 cirklojn laŭ la gazono de la ĝardeno de la ambasadorejo, kiuj egalas ĝuste al 30 000 metroj, la distanco de la kurado.



# Grava malkovro pri Ŝu-civilizacio

Teksto de CAŬ BAJLONG

Fotoj de ĜJANG CONG

En la lasta duono de 1986, ĉinaj arkeologoj prifosis du kultajn kavojn antaŭ la 11-a jc. a.K., en Sanŝingduj, Gŭanghan-gubernio, Siĉŭan-provinco. Elteriĝis senprecedence valoraj objektoj, kiaj grandaj bronzaĵoj, ora sceptro, bronzaĵoj, kapstatuoj, vinujoj kaj armiloj, jadaĵoj, ritajoj k.a. Tiuj objektoj apartenis al la civilizacio de la antikva Ŝu-regno, kies civilizacio ekzistis en la regiono, kun Ĉengdu, la nuna ĉefurbo de Siĉŭan-provinco, kiel la centro, de la nuna Hanjŭan-gubernio en la okcidento ĝis la Tri Gorgoj de Jangzi-rivero en la oriento kaj norde ĝis la nunaj urboj Hanĝong kaj Baŭĝji en Ŝenŝji-provinco. Dum la lasta periodo en sia evoluo, Ŝu-civilizacio etendiĝis ĝis regionoj de la nunaj provincoj Junnan, Gujĝou, Hunan kaj Hubej. Laŭ kroniko, en la okcidenta parto de Siĉŭan-provinco siatempe vivis antikvaj Ŝu-regnantoj. La malkovro de la Sanŝingduj-ruino datis la originon de Ŝu-civilizacio pli frua je ĉirkaŭ 2 000 jaroj ol la jam konstatitaj periodo de Printempo

kaj Aŭtuno (770—476 a.K.) kaj periodo de la Militantaj Regnoj (475—221 a.K.).

Estas originala la bronza homstatuo elfosita el la kavo n-ro 2. La homo altas je 1.72 m. Kun 0.9-metra soklo. La statuo kaj ties soklo estis kune muldita kaj la totala alto estas 2.62 m. Ĝi kun robo sur la korpo kaj krono sur la kapo staras kviete en facila pozo. Ĝi havas brilajn okulojn, nudajn piedojn kaj manojn tenitajn en cirkla formo. Fakuloj konjektis, ke la bronza statuo probable prezentas sorĉiston en prezidado de kulto aŭ iun reĝon de Ŝu-regno. La nubiformaj strioj sur la robo iel similas al tiuj de Ŝang-civilizacio (17-a jc. — 11-a jc. a.K.) en la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero. Tio montris la civilizacian rilaton inter Ŝu kaj la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero.


Elfositaj samtempe kun la statuo estas multaj bronzaĵoj homkapoj en diversaj dimensioj, la plej granda altas je 1 m. kaj pezas je dekoj da kg. Krome,

elfositaj ankaŭ bronza "di-arbo" kun alto de kelkaj metroj, eburpecoj kaj bronzaĵoj vinujoj. El tio oni povas imagi, kiel impona estis la tiama kulta ceremonio.

Ankaŭ ora sceptro, elfosita el la kavo n-ro 1, estas originala. Ĝi, orplakita, longas je 142 cm. kaj pezas je 780 g. Ĝia ligna interno jam forputris. Sur ĝia meza parto estis ĉizitaj tri identaj homkapoj kun ronda vizaĝo, longaj okuloj, krono sur la kapo, nubiformaj desegnoj kaj orelornamaĵoj sur la oreloj. Sur la kapoj estas simetrie ĉizitaj birdkapoj, impresantaj kiel totemo. La sceptro probable estis grava ritaĵo kun speciala signifo, kiu simbolis la rangon kaj rajton de suvereno siatempe.


Samtempe elfositaj kun la sceptro estis ankaŭ dekelkaj bronzaĵoj statuoj de homkapoj. Ili estas tiel grandaj kiel veraj homkapoj. La malsupra parto de kelkaj kapoj estas en formoj de renversitaj trianguloj. Klare vidiĝas la ĉapo, harplekto kaj kolumo. El ili iuj entenas konkojn, aliaj eburpecojn. Estas mirinde, ke ili ĉiuj estis bruligitaj. Laŭ esploro de arkeologoj, ili eble estis anstataŭaĵoj de "homofero". "Homofero" estis ofero al dioj per mortigitaj homoj, kio vidiĝis en la sklava socio antaŭ tri mil jaroj en Ĉinio. Bruligo de oferaĵo estis solena rito en la ĉina primitiva religia aktivado. En antikvaj ĉinaj literaturoj estas tia noto: "Oni kultas la ĉielon per bruligo de lignoj." Tiam oni kultis la ĉielon, teron, montojn, riverojn kaj aliajn naturajn diaĵojn. La objektoj elterigitaj en Sanŝingduj liveris novajn materialojn por esplori la ĉinan historion pri belarto, metalurgio kaj primitivaj religioj.

Bronzaĵoj homkapoj





Bronza kapo



Bronza kapo



1.72-metre-alta bronza statuo sur soklo kun alteco de 0.9 metro





Bronza masko kun larĝo de 1.38 metroj kaj alto de 64.5 centimetroj




Bronza birdo





Bronza statuo genuanta

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



Moskeo Fard en Irano  
de **EBRAHIM BAHRAMJ (IRANO)**



Parko en la urbo Strömsnäsbruk, Svedio  
de **MALTE MARKHEDEN (SVEDIO)**